

FIA LUDO

Manuel de Pedrolo

FIA LUDO

romano de

Manuel de Pedrolo

Kopirajto © Heredintoj de Manuel de Pedrolo

Originala Titolo: *Joc brut*

Tradukinto: Guillem Portell

Oni rajtas publikigi ĉi tiun romanon en la esperanta traduko de Guillem Portell nur senpage kaj PDF-e.

ENHAVO

Enkonduko _____ p. 4

FIA LUDO

La plano

0 _____ p. 7

1 _____ p. 8

2 _____ p. 15

3 _____ p. 26

4 _____ p. 36

5 _____ p. 47

6 _____ p. 57

La agoj

7 _____ p. 76

8 _____ p. 83

9 _____ p. 94

La serĉado

10 _____ p. 104

11 _____ p. 117

12 _____ p. 126

13 _____ p. 133

14 _____ p.150

La klarigoj

15 _____ p. 168

ENKONDUKO

Manuel de Pedrolo (1918-1990) naskiĝis en la vilaĝo L'Aranyó kaj mortis en Barcelono. Ido de antikva nobela familio, li studis en la gimnazio de la kataluna urbeto Tàrrrega kaj ne povis daŭrigi la studadon pro la interna milito de Hispanio (1936-1939) en kiu li partoprenis kiel artileria soldato ĉe la venkita flanko. Post la milito li transloĝiĝis al Barcelono, kie li vivtenis sin per multaj manieroj, sed precipe li laboris kiel privata detektivo kaj tradukisto. Lia ĉefa pasio estis la verkado, li kulturis ĉiujn ĝenrojn sed precipe la rakontan prozon, tiel ke li fariĝis unu el la plej legataj verkistoj en Katalunio.

La romano *Joc brut* aperis en 1965, dek jarojn antaŭ la finiĝo de la diktaturo, kiu regis Hispanion de 1939 ĝis 1975. Ĉi tiu reĝimo forigis la demokratiajn liberecojn, malpermesis kaj persekutis politikajn partiojn, nuligis la aŭtonomian statuton de Katalunio, kaj klopodis apartigi la katalunajn lingvon kaj kulturon el la publika sceno. Ĉiun ajn signon pri rezisto estis energie subpremita.

En la 1960aj jaroj la ekonomio pliboniĝis pro moderniĝo de agrokulturo kaj kresko de industrio. La loĝantaro de Barcelono plimultiĝis pro alveno de homoj el aliaj regionoj de Katalunio kaj amasa enmigrado el diversaj partoj de Hispanio. Dum ĉi tiu sama jardeko en la kataluna literaturo hegemoniis la historia realismo, ĉefe manifestita pere de poezio, kaj ĝiaj ĉefaj trajtoj estis la evidentigo de la sociaj maljustaĵoj kaj la volo de verkistoj interveni sur la evoluon de la historio.

La romano kiun oni prezentas nun tradukita ne estis disdividita en la originalo je 15 ĉapitroj, sed je kvar partoj: “La plano” (ĉapitroj 0-6), “La agoj” (ĉapitroj 7-9), “La serĉado” (ĉapitroj 10-14) kaj “La klarigoj” (ĉapitro 15).

La intrigo havas lokon precipe en Barcelono (publikaj transportoj, stratoj, placoj, kafejoj) sed ankaŭ oni trairas kelkajn stratojn de najbaraj urboj Badalona, Santa Coloma de Gramenet kaj en malproksima vilaĝo. La spaco de la romano estas do klare urba. Kelkajn loknomojn estas esperantigitaj (inter krampoj mi indikas la originalan nomon): Avenuo Diagonala [Avinguda Diagonal], Placo de Katalunio [Plaça de Catalunya], Parko de la Citadelo [Parc de la Ciutadella], Stacidomo de Francio [Estació de França], Placo de la Universitato [Plaça de la Universitat], Avenuo de la Respubliko Argentina [Avinguda de la República Argentina] kaj en Badalona estas la Avenuo de Alfonso la 13a [Avinguda d'Alfons XIII] kaj la Strato de la Kruco [Carrer de la Creu]. La aliaj restas en la originala formo sed estas tradukita la nomo de la speco de loko (strato, avenuo, placo ktp).

FIA LUDO

0

Se mi ne estus vidinta ŝiajn gambojn, nenio estus okazinta. Aŭ eble jes. Sed tiam la sorto estus trafinta alian viron. Kaj oni povus legi raporton pri la okazintaĵo en la ĵurnalo.

Ŝi sidis sur benko antaŭ la bushaltejo kaj, kun krucigitaj gamboj, skuis ŝuon pro enirinta sablero kiu ĝenis ŝin.

Iam ajn antaŭe mi ne vidis tiom mirindajn gambojn. Ankaŭ ne genuojn samgrade belajn.

Poste, kiam ŝi stariĝis, mi povis certiĝi ke mi ne miskalkulis ŝian belecon.

Ŝi estis vestita per minijupo, iom strikta, kaj la cetera korpo indis je la ekstremaĵoj kiujn ŝi tiom malavare montris. Ŝia ventro estis glata, adoleska, kaj tio reliefigis ŝiajn rondajn gluteojn kiuj, post longiĝo de la gamboj en femuroj kiuj insinuiĝis longaj kaj nervaj, finiĝis en mallarĝa talio. Pli supre, la mamoj ŝveligis blankan bluzon, kiu kontrastis kun bruna vizaĝo prilumita de grandaj kaj malicaj okuloj.

Verŝajne mi gapis, sed ŝi ne ridetis al mi ĝis la momento kiam la buso alvenis. Mi eniris la veturilon malantaŭ ŝi, kun la okuloj fiksitaj en ŝian sunbrunigitan nukon sub la kalkulite malkombitaj haroj, laŭ la sama maniero kiel tiam postulis la modo.

Ni staris unu apud la alia, ĉar en la buso ne restis liberaj sidlokoj, kaj sen tiu bruska bremsa kiu ĵetis ŝin kontraŭ min, eble mi ankoraŭ ne estus sukcesinta

sennoce. Ĉar la vero estas ke mi ne sciis, kiel ekparoli al ŝi. Ŝi fakte impresis min tre forte.

Ŝia korpo premiĝis al mia brusto kaj, alturniĝinte, ŝi diris:

– Pardonu...

Mi jam havis la kutimon alfronti homojn. En mia lasta laborloko, en agentejo pri reklama asistado, kiun mi akiris ĝuste tial, ĉar sinjoro Sorribes, la estro, opiniis ke mi kapablas esprimi min facile kaj senĝene, kaj ke mi elradias memkonfidon. Sed ŝajnis ke ĉio ĉi nun ne utilis eĉ iomete. Mi balbutis:

– Ne... Ne gravas.

Bonŝance, la ŝoforo favoris min, ĉar post du stratoj li preskaŭ devis surgrimpi la trotuaron pro kamioneto kies manovroj li ne rimarkis ĝustatempe. Tiam mi kaptis la ŝancon por pretigi min.

Sed eĉ tiele la vortoj venintaj al mia kapo estis tre banalaj:

– Ĉi ulo verŝajne ĵus venis de la vilaĝo – mi diris.

Denove ŝi ridetis al mi kun profunda rigardo kaj kun buŝo, kian ŝi ankoraŭ ne montris sufiĉe, tenera kaj kun karnaj lipoj; sed ŝi ne respondis.

– Kompreneble ili stiras freneze ĉar ili devas atingi lokon en difinita horo – mi aldonis, sen pli da inspiritaj vortoj.

Ŝi movis la kapon, daŭre silente, kaj ni ankoraŭ

staris. De tempo al tempo la fenestra vitro malheliĝis kiam la buson apudis alia veturilo, kaj tiam, pro spegula efekto, mi povis rigardi ŝian vizaĝon. Ankaŭ ŝi rigardis min, nek amike nek malamike, sed indiferente kiel antaŭvideble.

Malantaŭ ni, homo sin levis de la sidloko kontraŭ kiu mi apogis min, kaj mi trafis la okazon por diri al ŝi kelkajn vortojn:

– Ĉu vi deziras sidi?

– Dankon. Sed mi ne bezonas...

– Se vi ne vojaĝos malproksimen...

Tamen ŝi sidiĝis. La jupo supreniĝis tra ŝiaj femuroj, kaj denove mi povis kontempli ŝiajn krurojn, kaj, ĉi-foje, la komencon de la femuroj. La bluzo loziĝis iomete, montrante profuntan dekolton finiĝantan inter la mamoj. Mi preskaŭ ne aŭdis ŝian demandon:

– Kioma horo estas?

Mi montris al ŝi mian horloĝon, samtempe dirante:

– Restas malmultaj minutoj ĝis la kvina.

– Dankon.

Ŝi turnis la vizaĝon al la fenestro, kaj tiel ŝi restis rigardante al la strato. Sed de tempo al tempo ŝi ĵetis al mi scivolajn rigardojn. Mi volis kredi, ke mi interesas ŝin, sed post sep minutoj tiu supozo ne staris

tiom firma, kiam ŝi stariĝis kaj pretiĝis por elbusiĝi.

– Mi rimarkis ke ni estas najbaroj... – mi diris. Ŝi turniĝis dum la buso reprenis sian marŝon, kaj nun ŝi ridetis ironie.

– Vi loĝas ĉi tie, ĉu?

– Ne – ŝi diris –. Ĉu vi?

Tiam mi ridis sincere.

– Ankaŭ ne mi.

– Kial do vi forlasis la buson?

Ŝi staris fronte al mi kaj ne havis la timigitan sintenon de multaj knabinoj kiuj ekdeziras forkuri se al ili viro dediĉas kelkajn vortojn. Sed la tono de ŝia voĉo estis iom malmilda.

– Pro vi – mi diris.

Mi reakiris la stabilecon emocian. Mi daŭre gapis pri ŝia beleco. Mi ankoraŭ ne estis alkutimiĝinta, kaj eble mi neniam povus alkutimiĝi, ĉar virinojn, kia ŝi estas, oni vidas malofte. Tiun efekton kaŭzis ne nur la gamboj, estis ankaŭ speco de brilo preterpasanta ŝian fizikan aspekton, ĝi estis mistera kvalito kiu, subite, povas elmergiĝi en gesto aŭ en okula esprimo.

– Mi ŝatus akompani vin.

– Tio ne povas esti – ŝi diris serioze –. Mi petas, ke vi forlasu min.

– Ĉu vin atendas iu?

– Jes. Ŝi klinis iom la kapon, kaj sin forturnis, sed kiam ankoraŭ ne estis farinta la unuan paŝon, tiam mi demandis:

– Kial vi ridetis?

Ŝi dementis nenion, nek eĉ foreskapis respondinte per silento, ĉar ŝi denove rigardis min; ŝi haltis.

– Mi ne scias –ŝi agnoskis–. Eble mi ridis pro la maniero kiel vi ridetis al mi.

Mi humidigis miajn lipojn.

– Kaj tiu persono, kun kiu vi devas renkontiĝi, ĉu ne povas atendi momenton?

– Ne. Pardonu, sed vi malŝparas la tempon. Mi bedaŭras pro mia rideto, se vi komprenis ĝin tiel.

Mi ignoris ŝiajn vortojn:

– Kiam ni povos renkontiĝi?

– Vi estas persistema, ĉu ne?

– Ne... –nun estas mi, kiu diras:

– Pardonu, sed... –mi restis senvorte–. Kial do vi restis tie?

– Ĉu mi restis?

– Jes, ĉi tie, kiam mi turnis al vi la parolon. Vi ne estas ordinara knabino. Komprenu...

Ŝi skuis la kapon, ĉiam kun serioza mieno, sed funde de ŝiaj okuloj brilis mokema lumeto. Ŝi diris:

– Ne. Fartu bone.

Kaj ŝi denove sin deturnis, eble kun pli firma rezoluteco ol antaŭe; ŝi faris du paŝojn. Kaj farante la trian, mi jam estis apud ŝi.

–Mi scias ke mi komencas esti malagraba, sed mi ne povas... Aŭskultu, mi ne kutimas trudi min al virinoj sur la strato.

–Kion do vi faras nun? –ŝi haltigis min.

–Mi ja scias... Tio estas tiom bruska por mi kiom por vi. Mi ne volas ĝeni, mi volas... Ne estas tiom terure renkontiĝi unu fojon, eĉ se nur unu fojon, ĉu?

Ŝi mallevis la kapon, kaj ankoraŭ faris tri aŭ kvar paŝojn plu sur la avenuo, direkte al la ŝtuparetoj kondukantaj al la suba strato, post trairi la mallongajn ĝardenojn. Tiam ŝi diris:

–Kion vi deziras?

–Ni povus renkontiĝi iun vesperon, paroli...

–Pri kio?

Denove ni staris haltintaj, nun apud la benko el kiu tri olduloj rigardis nin dum sunbanado.

–Mi ne scias... Pri vi, pri mi... Pri simplaj temoj de babilado... Estas ridinde! –mi ekridis subite–. Kiel mi sciu, pri kio ni parolos?

Ankaŭ ŝi ekridis, kaj ŝiaj okuloj malgrandiĝis, ne transformante ŝian vizaĝon, tamen. Mia rigardo estis fiksita sur ŝia buŝo.

– Vi estas ŝercema.

Ŝi ekrigardis miajn okulojn kaj tuj deviis la rigardon al la montetoj kiuj videblis en la fono.

Mi ripetis:

– Ĉu ni renkontiĝos?

La okuloj malvolvis la vojon, sed nun ili estis malsimilaj, ironiaj, vere ironiaj. Ili ŝajne kontraŭdiris ŝiajn vortojn:

– Ĉiusabate, je la sama horo, mi prenas la buson.

Ŝi sin deturnis kaj foriris malproksimen, nun inter la arboj. Mi ne postsekvis ŝin, ŝi estis meze de la ŝtuparo, kiam mi kriis:

– Ĝis sabato!...

Ĝis poste mi ne konsciis ke mi ne scias eĉ ŝian nomon. Sed tiam ŝi jam estis tro malproksime, sur la suba strato, kaj mi preskaŭ ĉe la ponto, kiu estis super la strato.

De supre, ŝirmate de kolono, mi distingis ŝian silueton, lante marŝantan antaŭen kun harmonia paŝado. Antaŭ ol transiri al la alia trotuaro, ŝi turniĝis, sed mi rimarkis ke ŝi rigardas al la ŝtuparoj. Tuj poste ŝi sin metis en la trian domon el vico de kvar konstruaĵoj, tre proksime al vendejoj kaj magazenoj de malalta konstruo. Venis al mi en la kapon la supozo, spite al ŝiaj asertoj, ke ŝi loĝas tie.

La sekvan sabaton mi eksciis ke ŝi ne loĝas tie.

Unue, vidante ŝin iranta tra la avenuo, mi preskaŭ ne rekonis ŝin. Ŝiaj haroj estis kombitaj laŭ alia stilo, nun la livaj bukloj falis sur la okulojn. Ankaŭ la lipoj ne ŝajnis la samaj, ĉar la karminan koloron de la antaŭa fojo anstataŭis purpuro, kiu donis al ŝi ekzotikan aspekton. Ŝi surportis jupon, kiel en la alia okazo, sed nun ŝi estis vestita per ĵerzo kiu videbligis pli detale formon de la mamoj.

Ŝia rideto forbalais subite, ne lasante spuron, la kapdolorojn de la laboro kiuj estis min turmentintaj dum la tuta semajno, kaj precipe tiun matenon, kiam sinjoro Sorribes, pro brila ideo sendis min al unu el la publikaj lavejoj ankoraŭ restantaj en la urbo. La marko de la detergantoj ne sukcesis vendi la produkton kaj, anstataŭ pensi ke oni produktas miksaĵon kun miskalkulitaj dozoj, oni pensis ke necesas konsulti la agentejon. Sorribes tuj pensis ke pri tio kulpas la dezajno de la skatolo. La formo ne estis tre alloga; la koloroj, miskombinitaj, forpuŝis la rigardon anstataŭ altiri ĝin...

Mi pasigis do la matenon ĉe la lavejo, inter virinoj kriemaj kaj odoraĉoj de malpura robo, kun espero malkovri iliajn preferojn pri la pakumoj. La tasko

ŝajnis facila, sed ne rezultis tia: pro ripetitaj spertoj mi sciis ke la kliento ofte aĉetas allogite de certa aspekto kiam la interkonkurantaj produktoj ne estas tre malsimilaj. Iuj dimensioj, certaj linioj, difinitaj koloroj, la desegnaĵoj, specifa nomo... tre ofte apartigas sukceson de malsukceso en merkato.

Sed tiun matenon nenio rezultis bone; estis okazinta ŝtelo en la kvartalo kaj la virinoj ne emis paroli pri aliaj temoj. Kaj, komencante esprimi siajn opiniojn, preskaŭ eĉ du ne similis.

Ĉiukaze, post longa harfendado, mi supozis ke oni ŝajne preferis la ortangulajn skatolojn, verdajn kaj kun blankaj literoj. Multaj neniam eĉ pensis pri tio, ili simple aĉetis la markon de la vendejo en la stratangulo kaj, inter du oni elektis tiun kiu rilatis kun radio-konkursoj. Definitive, granda fiasko.

Sed nun pri tio mi lavis la manojn, ĉar subite la mondo estis ŝanĝiĝinta, ĝi iĝis pli afabla, pli bela. Ŝi ridetis al mi, haltinta fronte al mi, kun la rigardo fiksita en la mian, ignoranta la avidajn okulumojn de maskloj kiuj, solaj aŭ akompanataj, pasis tra la Avenuo Diagonala kaj rigardis ŝin, ĉu malkaŝe ĉu okulangule.

– Saluton... – ŝi faris.

Mi englutis salivon. Al mi okazis terura afero. Tio ne povis esti. Mi ne povis kredi ke tio estas vera. Mi murmuris:

– Vi venis...

– Ĉiusabate, je la sama horo, mi prenas la buson – ŝi ripetis la saman frazon de la antaŭa fojo–. Ĉu vi ne kredis min?

– Jes, sed hodiaŭ ne. – Mi respondis.

Mi ja komprenis min. Kaj, ŝajne, ankaŭ ŝi, ĉar ŝia rideto akcentiĝis. Kaj ĝi estis nun alispeca rideto, elkora, interesita, sen rimarkeblaj trajtoj de ironio.

– Je la sesa kaj duono mi devas esti ĉe mia amikino – ŝi diris.

– Ĉu je la sesa kaj duono?

Kaj nun estis la kvina, jam la kvina! Ne povis esti. Senresponde, ŝi daŭrigis:

– Ĉu ni promenu?

La lumo ŝanĝiĝis je koloro, kaj ŝi igis min transiri la straton sur la alian trotuaron, direkte al la Travessera de Gràcia.

– Kiu amikino?

– Ĉiusabate mi pasigas la posttagmezon kun amikino – ŝi rakontis–. Ŝi suferis veturakcidenton kaj restis handikapita.

– Aĥ!

Al mi venis neniuj vorto en la buŝon.

– Ni iru ĝis la placo de Gal·la Placía, kaj je la sesa kaj duono mi prenos la buson.

– Mi akompanos vin.

– Ne –ŝi faris, kaj skuis la kapon. Ŝiaj haroj ŝanceliĝis de flanko al flanko, nigraj kaj silkecaj–. Mi preferas ke ŝi ne vidu min... Komprenu, ŝi neniam plu allogos virojn.

– Aĥ!

Mi daŭre restis ne sciante, kion diri.

– Al ni unu horo sufiĉas por paroli, por ke vi diru ĉion, kion vi volis diri...

– Mi... La alian tagon mi eĉ ne memoris demandi, kiel vi nomiĝas. Mia nomo estas Xavier.

– Juna –ŝi diris.

– Juna? Kiu nomo estas tio?

– Justina. Sed mi ne ŝatas ĝin. Voku min Juna.

– Juna... Ĝi estas bela nomo. Kia vi, kia tuta vi...

– Ankaŭ Xavier estas bela nomo –ŝi diris simple.

– Juna... –mi ripetis, ankoraŭ ravita.

Ŝi ridetis, okulumis min per profunda rigardo, kia kaverno.

– La alian tagon, kiam vi diris, ke vi estas renkontiĝonta kun iu... Ĉu vi ne havas fianĉon?

– Ne. Kial? Ĉu vi kredis ke mi estas renkontiĝonta kun viro...

– Jes. Estas normale, ĉu ne?

– Mi ne scias.

– Knabino, kia vi...

– Eble mi estas tro postulema. Ne fidu al la ekstera aspekto.

Mi iom konfuziĝis. Ĉar nun ŝia mieno montris enpensiĝon, kvazaŭ ŝi pesus min.

– Ke mi akceptis rendezvuon kun vi, ne signifas ion.

– Ĉu akcepti?

– Mi simple ricevis bonan impreson pri vi.

– Ĉu ankoraŭ nun? – mi demandis iom malmilde, subite ĝenita.

– Mi kredas ke ankoraŭ nun, jes.

Sed ŝia rideto malarmis min. Mi ne povis ĉagreniĝi je ŝi. Viro ne povas ĉagreniĝi je knabino lin rigardanta kvazaŭ ŝiaj okuloj ampleksus la tutan universon.

– Vin favoras la sorto – mi diris—. Mi dirus la samon. Vi estas tro bela. Tro terure bela.

– Kaj?

Ni haltis fronte al vico de aŭtoj, ni kliniĝis unu al la alia, kaj ŝi starigis la kapon, kun lipoj duon-malfermaj.

– Kaj? – mi ripetis. Subite io tre malplaĉis al mi—. Kun knabino kia vi estas, oni ne povas paroli. Oni ne

povas diri vorton kiun ŝi ne aŭdis milfoje.

– Sed vi povas ripeti, se vi deziras.

Mi ŝovis mian manon sur la frunto, kaj duonfermis la okulojn.

– Ni transiru la straton – ŝi diris.

Ni transiris.

– Juna... Ĉu vi akceptos rendevui kun mi en aliaj okazoj, supozeble?

– Mi ne certas. Tio dependas.

– De kio?

Ŝi tiris la ŝultrojn kaj la mamoj ŝajne tremis sub la ĵerzo.

– De kio vi volus, eble.

– Mi volas vin. – Kaj ne lasante al ŝi tempon por interveni per vorto, mi daŭrigis. – Mi ja scias ke estas stulte. – Mi okulumis la horloĝon. – Ni renkontiĝis nur antaŭ dek minutoj, kaj nun estas preskaŭ la unua fojo kiam ni rendevuas. Kaj neniu diras al virino ke li volas ŝin ĵus konatiĝinte.

– Kial do vi diras tion?

– Mi ne povas eviti. De vi, min ekscitas io.

– Kion do mi rediru?

– Nenion, mi ja scias. Ĉu ni denove renkontiĝos, morgaŭ...

– Ne.

– Estos feritago.

– Mi ĉiam eliras kun la familio.

– Kun viaj gepatroj?

– Ne. Miaj gepatroj ne loĝas ĉi tie. Kun la onklo kaj lia edzino.

Tion ŝi finrakontis post kelkaj minutoj, atinginte la placon de Gal·la Placidia, kie ŝi volis sidiĝi sur benko. Ĉe la alia ekstremo estis virino, sed ni povis paroli trankvile ĉar ŝi ne aŭskultis, sufiĉe da laboro ŝi havis por kontroli du infanojn kiuj daŭre eskapemis de ŝi.

Ŝi devenis de vilaĝo proksima al Tortosa, kaj nun ŝi loĝis kun sia onklo dum kelka tempo. Tio estas, la onklino estis fratino de ŝia patrino, la onklo estis parvenuo, sed ili restis en bonaj rilatoj nun kiam, estante vidvo, de pli ol unu jaro li jam reedziĝis. Ŝi kaj la dua edzino, ankaŭ juna, havis bonan rilaton.

– Sed tio ne devigas vin eliri kun ili –mi objêtis ĉe la fino.

– Ne temas pri devo. Mi kutimigis ilin tiel, kaj ŝajnus strange... Mi ne povas diri ke mi pasigas la posttagmezon kun mia amikino se ili scias ke ni ja renkontiĝas sabate.

Venis al mi en la kapon:

– Sed kiel vi povas havi tiom intiman amikinson, se vi ne estas el Barcelono?

– Iam mi loĝis ĉi tie. Ĝis la forpaso de la onklino

mi loĝis kun ili. Poste mi revenis en la vilaĝon, ĉar ne ŝajnis konvene...

– Ĉu vi ne laboras?

– Jes... Hejme. La patro posedas kafejon en la vilaĝo.

– Kaj tie vi kelneras...

– Mi laboras tie, jes. Ĉu malbone?

Mi rigardis ŝiajn mamojn, manojn, femurojn kies konturojn la jupo lasis montriĝi, kaj tiujn mirindajn gambojn, nun metitajn unu sur la alian.

– Mi ne scias... Tiom da viroj...

Ŝi ĵetis al mi maldiskretan rigardon.

– Kaj kio?

– Eble ili ne lasas vin trankvila...

– Tio dependas de la virino, ĉu? Ne de ili.

– Mi ne scias. Kiam mi vidas vin...

La vortoj nodiĝis en mia gorĝo. Kiel mi povis diri ke mi ne lasos ŝin en paco, ke mi ne komprenas kiel la aliaj povas lasi ŝin en paco? Pro impulso mi etendis mian manon al la ŝia, kiu ripozis apud la malkovritaj genuoj.

– Juna...

Ŝi rigardis la kuniĝantajn fingrojn kaj tuj levis la okulojn al mia vizaĝo. Mallaŭte ŝi demandis:

– Kial tio?

– Se vi ne scias, tute ne utilis se mi dirus.

Ŝi ne kontestis. Ŝi nur rigardis min, sed ŝiaj okuloj estis perdintaj la serenecon, ili estis du svagaj makuloj, turnitaj internen, kvazaŭ ŝi demandus ion al si. Post momento, mi faris:

– Se ne eblas dimanĉe, dum la semajno... Ĉu vi restos multajn tagojn?

– La tutan monaton.

– Dek ok tagojn –mi kalkulis rapide–. Ni devas renkontiĝi.

– Kaj kio poste?

– Ni renkontiĝu –mi ripetis obstine. Mi ignoris la ceteron.

– Ĉu vi laboras?

Mi eksplikis, kian laboron mi faras, mi rakontis al ŝi mian tutan vivon. Ke ankaŭ mi ne estas barcelonano, ke la patrino kaj mi venis en la urbon post finiĝo de la milito, kiu vidvinigis ŝin, ĉar la patro mortis en la avangardo, ĉe la venkitoj, kaj ni neniam ricevis ian helpon. Ŝi mastrumis en domoj, flegis malsanulojn, kaj mi estis grumo en oficejo, komercagento pri hejmaj elektromaŝinoj, sed mi ne taŭgis por vendado, verŝajne mi ne taŭgis por io.

La vortoj pli kaj pli amariĝis en mia buŝo, mi ricevis memorojn pri momentoj de mia infanaĝo, kun humiligoj kaj malsato, pri la aspiroj de mia patrino kiu

volis por mi pli bonan futuron kaj ne sukcesis, ĉar ŝi ne povis faciligi al mi la studadon, kaj neniam ni havis ion, eĉ domon. Ni loĝis en vicluitaj ĉambroj, unue ĉe du fratinoj, du harpioj kiuj turmentis niajn vivojn, poste ĉe geedzoj kies bofrato -jam grandaĝa viro ankaŭ dormanta en la loĝejo-, intencis amorlogi mian patrinon. Mi memoris la diskutojn, la kverelojn, la noktajn frapojn, sed pri tio mi silentis.

– Vi do loĝas viclue? – ŝi demandis.

– Ne plu. Finfine ni havigis al ni grundetaĝan loĝejon. Ĝi ne estas apartamento. Tio estas du ĉambroj, sen kuirejo, kun malgranda korto. Tio iam estis la ateliero de pentristo. La muroj plenas je makuloj, skizoj... Oni povus nomi tion pitoreska loko...

“Sed tute ne se vi devas loĝi tie”, mi pensis, ĉar la malsekeco nin konsumis, ĝi forvoris la tri seĝojn, la du litojn kaj la tablon, la ŝrankon. Ĉio estis aĉetita ĉe brokantisto, jam uzita kaj en mizera stato. La necesejo estis ekstere, en la korto, kie ni devis ankaŭ kuiri per portebla fajrujo...

Mi energie svingis la kapon por forgesi tiun mizeron, por malproksimigi penson akoraŭ dolorigan: la memoron pri loĝejo kiu povintus esti nia, ĉar la patrino estis ŝparinta post longa daŭro kiel formiko ĝis kunigi dudek mil pesetojn necesajn por la antaŭpago, kiam la konstruado ne estis ekfarita. Kaj neniam eĉ

finkonstruiĝis; tio ne transpasis la fundamentan fazon. La entreprenisto foreskapis kun la mono, kaj kiam la polico kaptis lin, li solvis la aferon per malmultaj jaroj en malliberejo; eble nun li jam estis libera.

– Preferindas ne plu pripensi... –mi diris iom laŭte–. Nun ni pensu pri ĉi momento, pri ni.

Sed jam malfruiĝis, jam estis la sesa kaj kvarono, kaj ŝi stariĝis.

–Ni ankoraŭ ne interkonsentis pri io –mi diris.

–Se vi laboras...

–Kiam mi finas, je la sepa. Ni povas renkontiĝi ĉiutage. Mi venos atendi vin. Kie vi loĝas?

– Ne –ŝi diris–. En mia kvartalo oni klaĉas tre multe.

–Ni povas renkontiĝi, do... Kie vi volus.

Ni renkontiĝis. Ĉiutage en malsama loko, sur la strato, en kafejo, en metrotunelo. Ŝi postulis tiujn kondiĉojn. Mi ne komprenis la kialon.

– Mi ne ŝatas faris ĉiam same –ŝi diris pro mia demando.

Tio povis esti la kialo. Finfine, tamen, ni ĉiam faris la samon, aŭ preskaŭ la samon: ni promenis. Iun tagon ni iris la la kinejo, alian al la Parko de la Citadelo. Ĉi tie mi kisis ŝin unuafoje. Jam malheliĝis, oni estis tuj malfermonta la pordojn de la parko kaj ŝi ne volis, ni estis nur geamikoj, ŝi diris.

– Ĉu nur geamikoj, Juna?... –mi demandis.

–Kio do?

–Kun amiko oni ne promenas ĉiutage.

Ni sidiĝis sur la grundo, ĉe mallarĝa herbej-strio, malantaŭ arbustoj, en malpermesata loko.

–Kial ne?

–Kun amiko oni ne sidas margene de la pado, kaj eĉ ne formanĝas amikon per la rigardo.

–Ĉu mi formanĝis vin? –ŝi ridis tiam.

– Ne, mi. Tion mi faras de la tago kiam ni renkontiĝis unuafoje, tiun posttagmezo kiam vi sidis

sur la benko kaj vi formetis la sablon el la ŝuoj.
Juna...

Mi metis la manon sur ŝian genuon, kaj klinis min kontraŭ ŝian vizaĝon, kvazaŭ pelite de lipoj tiun tagon arde ruĝaj, ĉar ili ĉiam kolorŝanĝiĝis.

– Ne, Xavier...

– Kial?

– Ĉar...

– Juna, vi scias, ke mi amas vin.

Ŝi ŝtopis mian buŝon per la manplato, sed mi liberiĝis je ĝi.

– Kial vi ne volas ke mi diru tion?

– Tio kondukos nin nenien.

– Ĉu vere?

Mi prenis ŝin ĉe la brakoj kaj post momento mi metis miajn lipojn en la siajn, kaj mi devigis ŝin malfermi ilin...

Antaŭ ol disiĝi, ŝi lasis sian kapon fali kontraŭ mia brusto, kaj la haroj falis sur la vizaĝon kvazaŭ kurteno. Ni anhelis.

– Juna...

Ŝi rektigis la torson.

– Lasu min.

– Ne.

–Lasu min, mi petas!

Sed ŝi denove akceptis kison kiam ŝiaj manoj ankoraŭ rifuzis min. Lante ŝi kliniĝis al la herbo ŝin akceptanta kaj mia korpo ripozis preskaŭ sur la ŝia.

–Vi eble pensas: “kiom facila ŝi estas...”

–Juna! –mi diris, relevante min en sidan pozicion.

–Neniam viro tuŝis min, Xavier.

–Mi... Oh, Juna, Juna!

–Kun vi... –ŝi silentis.

–Mi amas vin, Juna.

–Mi ne scias. Estas facile diri vortojn.

Ŝiaj okuloj glimis en la duonombro, sed tiam ŝi deturnis la kapon kaj denove rektigis sin.

–Oni fermos la parkon.

– Juna...

Ŝi sin turnis al mi kiel besto, surgenuje ĉe la herbejo, kun malkombitaj haroj.

–Jes, ankaŭ tion mi ŝatas –ŝi preskaŭ kriis–. Ĉu vi ne rimarkas? De la unua tago, de la unua momento, kiam mi malkovris vin...

–Juna!

–Mi estas...

Ŝia voĉo rompiĝis, sed en tiu momento ni jam ĵetis nin unu kontraŭ la alian. Ni skuiĝis, en brakumo

kiu bruligis niajn lipojn, tremantaj kaj senpaciencajn. Sen mia rimarko, miaj manoj antaŭen sin movis al ŝiaj mamoj, kaj ŝi sin lasis al flanko sin forlasinte. Ŝajne forlasinte, ĉar subite ŝi reakiris la forton kaj diris:

–Ne!

Ŝi repuŝis min per ambaŭ brakoj kaj denove ni restis unu fronte al la alia, nin reciproke rigardantaj kun nebula kaj malfortika rigardo. La jupo estis supren tordiĝinta, alte en la femuroj kaj nun ŝi montris la brunan karnon kiu preskaŭ konfuziĝis kun la nokto.

–Ne... –ŝi diris pli mallaŭte, pli lante.

Ŝi stariĝis kaj la jupo denove falis ĝis la nivelo de la genuoj. Ŝi karesis miajn kapharojn antaŭ ol diri:

–Ni ekiru. Malfruas jam.

Ni forlasis nian rifuĝejon, kaj antaŭen iris tra senhoma vojo. Supozeble ni estis la lastaj. Sed ni ankoraŭ distriĝis, ĉar sub la tufo de arboj mi enbrakigis ŝin ĉe la talio kaj ŝi troviĝis devigita halti, rigardi min.

–Juna...

Sed ŝi jam svingis la kapon kaj faris:

–Forgesu la vortojn, kiujn mi diris... Eble ni eĉ devus ne plu renkontiĝi.

–Kial? Mi volas vin por ĉiam, Juna, ĉi tio ne estas kaprico...

–Kaj kiom da tempo estas ĉiam?

– Ni povas geedziĝi.

– Silentu!

Subite ŝi mienis kolere, liberigis sin je miaj brakoj per energia gesto kaj komencis piediri antaŭ mi. Mi kuris por atingi ŝin.

– Ĉu eventuale estas alia viro? Vi diris ke ne...

– Kaj kion vi donus al mi? Diru!

Ŝi rigardis al mi plu irante. Ni ambaŭ marŝis antaŭen tre rapide, kvazaŭ persekutate. Povis temi nur pri nia deziro.

– Ĉu vi diris “kion vi donus”? – mi ripetis ŝian demandon, ne plene kompreninte ĝin. Sed interne de mia stomako io nodiĝis.

– Jes. Ĉu vicluitan ĉambbron?

– Mi ne loĝas viclue, nun – mi memorigis ŝin.

– Vi jam diris, kie vi loĝas!

– La aferoj povas pliboniĝi. Mi ne volas diri ke ni geedziĝu tuj...

Ni jam estis ĉe la pordoj, ankoraŭ malfermaj, kaj apud ili atendis uniformita viro, unu el la gardistoj de la ĝardeno. Ekstere videblis la tuta perspektivo de la avenuo, prilumita kaj brua.

– Vi kaj mi ĉiam estis malriĉaj – ŝi diris, lantigante la paŝadon, ne rigardante min–. Mi tute ne estas kontraŭ la malriĉuloj – ŝi aldonis.

– Kion vi signifas?

– Vi ja scias ke mi estas postulema. Mi ne volas foruzi mian tutan junaĝon kaj ke tio... –ŝi eksilentis, rigardis min kaj tiam, subite, metis sian brakon sub la mian, kaj sin premis al mi tutkorpe—. Estas bele, Xavier, kaj mi volas... volus... ke tio daŭru por ĉiam.

– Tiel povas esti, se vi kaj mi faras al ni ĉi proponon.

– Ne kredu ke mi sekvas egoismajn kriteriojn, ke nur interesas min... Mi volas diri ion al vi. En la vilaĝo estas knabo kiu ankaŭ volas edziĝi kun mi, li estas filo de industria entreprenisto kaj havas monon... multegan monon.

Al mi la koro malgrandiĝis, sed mi silentis, atendente.

– Li estas ankaŭ bonkora knabo –ŝi daŭrigis—. Se mi edziniĝus kun li, nenio ajn plu mankus al mi. Sed mi ne amas lin. Li ne sentigas min, kiel vi faras.

– Mi povas ŝanĝi je metio. Nun kiam mi havas vin...

– Ne, Xavier. Ĉi tio ne estas egoismo, sed ja ambicio. Por mi, por mia amata viro. Eble mi volas tro multe... Kiam mi pensas ke homoj havas ĉion, kiuj ne devas suferi ansiojn, kapdolorojn, sed ĉi tion ili ne povas ĝui!

– Pli valoras amo ol riĉo, Juna.

– Pli valoras amo kaj riĉo – ŝi ĝustigis.

– Sed oni ne povas elekti; mi... Ĉiel ajn, nun jam estas tro malfrue, nun ni jam ne povas rezigni unu pri la alia.

– Jes, ni ankoraŭ havas tempon... Ĉu vi volas vidi min malriĉa, forvorita de la mizero? Kiom longe vi amus min se...

– Ĉiam – mi certigis ne lasinte ŝin findiri.

– Ne. Dum mi plaĉos al vi, dum mi estos ankoraŭ novaĵo... Eble eĉ nun, vi ne amas min. Vin tenas deziro pri mi, vi deziregas tuŝi min, kisi min...

– Tio ne estas malbona afero. Io ne senigas je alio.

Ŝi denove movis la kapon, malproksimiĝis iom de mi.

– Ĉi foje mi estas leĝera... Pardonu se... Mi permesis al vi esperi kaj konfidi...

– Sed vi mem, antaŭ momento, en la parko...

– Jes – ŝi agnoskis –. Kaj tial mi permesis al vi esperi kaj konfidi. Ĉar ankaŭ mi esperis kaj konfidis... Mi ne scias, kion.

Ŝi haltis, rigardis min per malĝojaj okuloj, sed rezolutaj, kaj tre mallaŭte, tre rapide, ŝi diris:

– Ni disiĝu, Xavier... Ĉio havas solvon, ankoraŭ.

Sed mi obstiniĝis; la koro plenŝtopis mian gorgon, malfaciligis al mi la spiradon; sed eĉ tiel ĉi mi povis

paroli, preĝe peti. Mi komprenis nenion, ĉiuj ĉi vortoj ŝiaj falis sur min kiel malvarma akvo en suna tago. Estis ridinde, groteske; neniam mi aŭdis ke du homoj reciproke sin amantaj devus disiĝi nur tial, ĉar ili devus pasigi la vivon laborante, vivante en modesta loko... Mi laboris dum la tuta vivo, mi pretis plu vivi ĉi tiel, tion mi akceptis kiel neeviteblan neceson...

–Ne, Xavier, ne –ŝi plu diradis.

Ni estis ĉe la pordoj de la Stacidomo de Francio, ni definitive haltis, kaj ŝi sin apogis kontraŭ unu el la ŝtonaj muroj, proksime al ŝtuparo antaŭ kiu haltadis aŭtoj, taksioj postlasantaj multajn vojaĝantojn ŝargitajn per valizoj, hastajn, okupitajn...

–Ne, Xavier, ne...

Ŝi rigardis min; ŝi tenis la vizaĝon levita, la tutan korpon retroklinita, la bruston proponita, la ventron al mi. Ŝiaj lipoj brilis, humidaj pro niaj kisoj, kaj la buŝa komisuro ŝajne tremetis.

– Ni ankoraŭ diponas pri tempo –ŝi ripetis–. Mi revenos al mia vilaĝo kaj vi forgesos min. Mi vin forgesos... Diru al vi mem ke ĉi tio estis aventuro...

– Ĉi tiu afero ne estis aventuro! Sed Juna, Juna, kio okazis? Tio neniam estis nur aventuro, ĉiam estis serioza...

– Sed mi ne volas. Mi ne povas, Xavier! Mi bedaŭras ke ni disiĝu ĉi tiel, kun vi kredanta ke mi estas avida virino... Sed mi ne volas trompi vin. Pli

bone ĉi tiel, sentrompe, ĉu ne?

– Jes, Juna, sed mi... Donu al mi ankoraŭ ŝancon!

–mi finfine diris. Mi ne povis perdi ŝin. Mi estus faronta ion ajn por ne perdi ŝin.

–Ĉu ŝancon? Por kio?

– Por konvinki vin. Vi ankoraŭ devas pasigi kelkajn tagojn en Barcelono. Lasu min fari...

–Kaj poste, kio? Mi scias, kion mi volas, Xavier. Kaj poste estus des pli aĉe.

– Mi konvinkos vin, pri tio mi certas. Mi certas ke vi ne estas tia. En funda vero vi ne estas tia kia vi montras vin.

–Jes, mi ja estas ĉi tia.

– Ni ankoraŭ disponas pri pli ol semajno... dek tagoj. Mi promesas al vi ke mi ne plu tuŝos vin, se vi deziras, ke mi ne plu kisos vin... Se vi poste plu pensos same...

–Ni turmentos nin senutile.

–Eĉ en tiu kazo. Mi preferas tion. Se tio devas esti nur unu aventuro, pri ĝi mi volas konservi pli bonan memoron –mi aldonis–. Nun... Ni ĵus komencis nin koni unu la alian. Kaj al mi tio ne sufiĉas, Juna. Ĉu vi aŭdas?

–Sed kio pri mi? Pensu ankaŭ pri mi, Xavier.

– Mi pensas. Pri ambaŭ. Vi devas doni ŝancon ankaŭ al vi... Diru, ke jes, Juna, diru, ke jes... Mi ne

plu petos ion, se vi ne volas. Pri tio mi certigas vin,
Juna, mi promesas...

Jam restis nur kvarono ĝis la naŭa kiam ŝi
konsentis.

Nia rilato neniam plu estis denove la sama. Mi timis pro la bezono kiun mi sentis pri ŝi. La du aŭ tri sekvajn tagojn mi suferis koŝmaron kiu longiĝis ĝis malfruaj horoj de la nokto, kiam pro simpla nerva laciĝo mi sukcesis endormiĝi. Mi provis forgesi ŝin dum la laborhoroj, liveri min tute kaj nure, absorbite, al mia laboro, dum tiuj tagoj tre delikataj, ĉar post la malsukceso en la publika lavejo, la firmao, ne perdinte la kuraĝon kaj esperon, volis ke ni procedu enketi profunde, kio bezonis personajn intervjuojn nekalkuleblajn kun eventualaj aĉetantoj de deterganto, virinoj kiujn mi ofte surprizis meze de mastrumado, kiam ili revenis de la taga aĉetado aŭ tien ili iris, ĉiam en krizaj momentoj, kiam ili ŝajne ne havis tempon por respondi tedajn demandojn kaj kiujn mi devis fari sufiĉe interesaj por ke, finfine, ili permesu al mi transpasi la sojlon kaj komenci tiam mian veran laboron... Tio havis nenian utilon. Estis problemo, mi devis ĝin solvi, kaj mi ne trovis la rimedon, ĉar ŝi neniel helpis min. Ni jam ĉagreniĝis unufoje; ni pasigis tutan vesperon diskutante, preskaŭ kun insultoj, blindigitaj pro deziro, ĉar ankaŭ mi ne povis plenumi mian promeson, ne plu kisi ŝin, eviti tuŝi ŝin. Ŝi agis kiel magneto. Magneto kiu cedis unu

momenton kaj poste sin restarigis kun ruĝaj lipoj, kriante:

– Tio ne povas esti, Xavier, ne povas esti! Ĉu vi intencas frenezigi min?

Ĉar ŝi denove diris ke ŝi amas min, ke ŝi estas brulanta braĝo...

– Vi ne agas korekte, Juna –mi plendis unu fojon–. Estas maljuste.

La tuta afero estis freneziga. Kaj la patrino! Se la afero estis malgranda, ankoraŭ tien enmiksiĝis la patrino. Nenion ŝi sciis pri Juna, sed iam ŝi divenis ion. Dumnokte mi turniĝadis en la lito, dumtage ŝi vidis min malkvieta en la sama loko kelkajn sekundojn, aŭdis kiel mi kontestis, kun retenita senesperigo, kaj eble tial mi estis des pli violenta.

–Kio okazas al vi, Xavier?

–Nenio.

–Ĉu vi fartas bone?

–Mi ne plendis, ĉu jes?

–Certe, vi ne plendis.

–Do lasu min trankvila!

Kaj ŝi rigardis min kun malĝoja mieno, ĉar neniam mi antaŭe traktis ŝin tiel, sen iu skrupulo, ĉar ŝi intuicie sentis gravan aferon kaj rimarkis ke mi ne sufiĉe konfidis al ŝi por akcepti ŝian helpon. Sed mi ne povis diri ke mi stultumas pro virino. Ke ni estis

stultaj unu pro la alia, kaj eĉ ĉi tiel neniam ni atingos ion, ke ni lasos la amon kaj la deziron forkonsumiĝi ne kaptante profiton el tio, ĝis ĉio fariĝos malamo. Ĉar la memoro, malkiel ni pensis unue, ne estos agrabla. Aŭ dum longa tempo ĝi ne plaĉos. Dumtempe, post nia disiĝo, restos nur la vundoj. Kaj tion necesis eviti. Sed, kiel?

Se mi ne povis fondi agentejon, similan al tiu de mia estro, kun iom favora sorto mi povus gajni la saman kvanton da mono kiel li. Ĉar li ricevis tre bonan profiton. Kun ni la agentoj, li estis mizerkora, senkompate ekspluatema kaj avara, sed de la klientoj li enspezis harstarigajn honorariojn. Nun mi laboris kun li jam de tri jaroj, jam konis ĉiujn ruzaĵojn kaj trukojn de la metio, mi sciis la malkontentajn kunulojn kiuj estus lin forlasonta se mi povus emancipiĝi. Sed mi ne posedis monon, neniu donus krediton al mi sen posedaĵoj per kiuj respondi, kaj inter miaj konatoj mi kalkulis nul riĉulon pretan fari al mi malprobablan favoron... Eble maksimume, mi povus komenci sola, laborante hejme, kaj defendi min per la forto de la brakoj, kun penoj kaj rezignoj. Sed tio estus longa procezo, ŝi certe ne atendus tiom longe. Mi estus ŝin perdonta dum mi preparas futuron kiun ni ne dividus... Kion fari?

Kiam ŝi foje diris ke ŝia onklo ĝuas bonan pozicion, venis al mi en la kapon, ke eble, finfine, ankoraŭ estis ŝanco saviĝi. Tio estis iun jaŭdon, dum

pluva posttagmezo, kaj ni ŝirmis nin en kafejo de la kvartalo Barceloneta.

– Aŭskultu... – mi diris tuj, kaj mi rakontis—. Se vi povus... – sed tiam, aŭskultinte min atente, ŝi jam ridis.

– Estas klare ke vi ne konas lin! – ŝi tuŝis la glason antaŭ si, kaj ne rigardante min— Mi devas konfesi ion al vi. Mi ne certas ĉu mi agas taŭge, sed vi atendu... – ŝi ŝultrumis fatalisme kaj aldonis— Ĉio kion li havas, apartenas al mi.

– Ĉu vi certas?

– Jes, ĉio estos mia. Vi vidos... La riĉa estis la onklino, lia unua edzino. Junaĝe... Kiel mi diru?... Ŝi estis artistino, havis amikojn... Vi komprenas.

– Ja.

– Precipe unu amikon, oldulon kiu postlasis al ŝi akciojn, posedaĵojn, kaj interezojn en kelkaj firmaoj. Li estis solulo... Ĝis poste ŝi ne edziniĝis kun sinjoro Virós... Mi ne diris, kiel nomiĝis la onklo, ĉu?

– Ne, mi kredas.

– Virós, Enric Virós. Li estas armeano, jam emerita. Ili geedziĝis jam en avancinta aĝo, kaj li edziĝis ĉefe pro la mono. Kaj ŝi... Ŝi volis korektan finon, por diri iumaniere. Ili ne naskis idojn, ŝi eble jam ne kapablis, kaj antaŭ ol morti decidis postlasi ĉion al mi.

– Sed, ĉi-kaze, ĉio ĉi...

– Mi finrakontos. Ŝi heredigis ĉion al mi, sed mi povos disponi ĉion nur post lia forpaso. Li estas fruktuzanto. Nenion mi povas tuŝi. Absolute nenion! Post lia morto mi disponos la posedaĵojn, la akciojn... Ĉion, ĉar li ne povas tion vendi aŭ hipoteki, kompreneble. Li povas enspezi nur la rentojn. Tial...

Mi rektigis min sur la seĝo.

Sed Juna! Ĉu vi ne rimarkas ke ni ne havas problemon? Mi ne volas diri –mi hastis aldoni– ke mi intencus vivi el vi, sed poste, kiam vi povos disponi pri ĉiuj riĉaĵoj...

Ŝi rigardis min malestime.

– Poste!? Ĉu vi scias kiom mi aĝas?

– Dudek-unu aŭ dudek-du.

– Dudek-tri. Kaj li, ĉu vi scias kiom li aĝas?

– Vi diris ke li oldas.

– Li oldas por ni. Li aĝas kvindek sep jarojn. Li povas vivi dek aŭ dudek jarojn plu. Kaj mi volas ĉion nun, kiam mi estas juna, kiam mi povas ĝui, ne kiam mi estos kvardekjara.

– Sed vi povas fari nenion.

– Mi ne certas. Foje mi pensas... Se al li okazus io...

Ŝi restis kun la menso en penso, fininte la frazon

kun suspenso. Nur post kelkaj sekundoj ŝi faris:

– Ni ne havas alian solvon. Konvinku vin.

– Se vi parolus al li... –mi diris–. Agentejo pri reklamasistado estas bona negoco, mi vidis, kiel sinjoro Sorribes riĉiĝis en tiu kampo, ankoraŭ estas malmulte da konkurantoj...

–Ne, tio estas neutila. Li ne emas riski. Kaj, poste, neniuj garantios ke la entrepreno sukcesos –ŝi sin turnis al la vitroj kiuj apartigis nin de la strato, kaj rigardis eksteren–. Ŝajnas al mi ke pluvos ne plu. Ni ekiru.

Kiam ni stariĝis, tiam mi ankoraŭ diris:

– Lasu min provi. Se vi prezentus lin al mi...

– Mi ne taksas tion bona ideo, eĉ ne simple por enuigi. Li estas senkompata sadisto. Li jam estus farinta ion, se li nur volus. Tamen ne –ŝi kunigis du fingrojn, kaj montris ilin al mi–, sed eĉ nek tiel. Ĉu vi scias kion li faras per la mono? Li pruntedonas ĝin al malfeliĉuloj kiuj akceptas pagi la fruktuzajn interezojn. Li estas strangolema uzuristo!

Ni jam staris ekstere, sur la malsekaj platŝtonoj spegulantaj la lanternan lumon, sub ankoraŭ minacanta ĉielo sed por momentoj ĉesis la pluvo.

– Vi do estas sufiĉe aŭdaca se vi eĉ pasigas epokojn kun li, se li estas tia, kia vi priskribas lin...

– Mia familio postulas tion al mi –ŝi respondis kun

rezoluta tono. Ŝi rigardis la horloĝon kaj diris:— ni serĉu taksion. Malfruas.

Neniam ŝi permesis al mi akompani ŝin sed hodiaŭ ŝi diris:

—Venu, se al vi plaĉas. Ni haltigos la taksion antaŭ ol alveni hejmen.

En la mallumo de la veturilo, ŝirmitaj for de scivolaj rigardoj ni kunigis niajn manojn kaj, post kelkaj momentoj, kiam ni jam veturis tra la strato Via Laietana, ŝi akceptis mian brakumon. Ŝi liveris sin al mi, sed kun la kapo levita kaj la okuloj fikse rigardantaj la miajn. Ŝi sopiris.

—Juna...

— Se ĉiam eblus ĉi tiel —ŝi diris mallaŭte—. Vi kaj mi solaj, fermitaj en propra mondo, sen bezonoj, sen io pli...

—Tio dependas de ni.

Ŝi neis per la kapo kaj mi ne plu insistis ĉar en tiu momento mi nur povis pensi pri ŝia varma korpo, pri ŝiaj lipoj brilantaj en la malhelo. Preskaŭ senrimarke mi trovis ŝiajn lipojn sur la miaj kaj tiam ŝi ellasis brakon kaj brakumis min ĉirkaŭ la kolo, bonvenigan kia tepida bano.

—Xavier, Xavier... —ŝi faris.

Ni ne disiĝis ĝis preter la placo de Turó. La ŝoforo sin turnis al ni.

–Kie ni haltu? –li demandis.

– Veturu ĝis la strato de Morales –ŝi diktis–. Ĉe la Travessera de les Corts.

Ni forlasis la aŭton apud la futbalkampo kie dimanĉe matĉis kvartala teamo. Denove falis pluvgutoj kaj la stratoj estis malplenaj kaj senlumaj.

–Venu ĝis la venonta stratangulo –ŝi diris.

Antaŭ ol atingi ĝin, mi puŝis ŝin kontraŭ malluma ombro de stratpordo, aŭ eble min trenis ŝi, ĉar nin movis la sama impulso, la sama deziro vivi ankoraŭ unu momenton solaj, miksi niajn spirojn. Kiam mi levis la vizaĝon, mi rimarkis ŝiajn okulojn ploremaj, kun glitanta larmo sur ŝia vango.

–Juna!

Ŝi kunpremiĝis al mi en brakumo, sin ligis al mi per ambaŭ brakoj, ĵetita al mia skuata brusto.

–Xavier, Xavier... Tio povas frenezigi nin...

–Ni ne forkonsumiĝu ĉi tiel, Juna...

–Sed mi ne estas ajnulino, Xavier.

–Temas pri amo, Juna.

–Mi ne aŭskultu vin.

–Vi estas mia, Juna. Ĉu vi aŭdas?

Ŝiaj manoj malligiĝis, retroiris al la kolo, al la mentono; ŝiaj ungoj skrapis min.

–Sed tia mi volas estis ĉiam, ne nun!... Mi volas

ke vi ĉiam trovu min bela, mi ne volas damaĝiĝi kiel ĉiuj ĉi virinoj sklavaj de la propra mizero... Kaj mi volas ke vi estu fiera pri mi, ke vi portu min ĉien ajn, kaj ke la homoj diru: “Kian virinon li edzinigis!”, ke oni envidu vin ĉar mi estas la plej bela, ke vi... Ke vi...

La vortoj pereis kaj la manoj falis ĝis la brusto kiu min frapis malforte. Mi ektenis ŝin, renversita kontraŭ ŝia korpo, kun plezuro pro la suferesprimo de ŝia vizaĝo, pro la nudeco de la ŝultro kiu subite al mi montris komencon de ŝiaj intimaj partoj. Senvole, mi faligis butonon de ŝia bluzo, jam malfermiĝanta.

–Ni ne daŭrigu ĉi tiel –mi diris–. Ni freneziĝos!

Kaj tiam, kun malproksima voĉo, kvazaŭ senkonscia, ŝi diris:

–Estas rimedo.

Mi paraliziĝis, kvazaŭ ligite ĉe piedoj kaj manoj, kaj preskaŭ ne rekonis mian voĉon kiam, ronke, diris:

–Rimedo...

Ŝi ŝajne etiĝis, kuntiriĝante kontraŭ la embrazuro de la pordo nin ŝirmanta; neniam ŝi rigardis min kun tiom malfermitaj okuloj.

– Ne... –ŝi faris. Kaj ŝi frotis la frunton per la mano–. Estas...

–Diru –mi pelis ŝin.

Ŝi palpebrumis, sin rektigis iomete kaj metis la manojn sur la bruston.

– Vi farus kion ajn por mi, ĉu?

– Jes. Kion?

– Kion ajn –ŝi ripetis–. Por vi mi kapablas ĉion.
Ĉion, Xavier.

– Jes.

Per la lango ŝi humidigis siajn lipojn kaj profundigis la rigardon en la mian.

– Ni povus mortigi lin.

Mi restis senmova. Mi faris nenion. Eble mi komprenis, ĉar stranga voĉo, sed mia, diris:

– Ĉu mortigi... kiun?

– La onklon. Se li mortus...

Nun mi reagis. Svarmo da nadloj sin ĵetis kontraŭ mi de la medolo supren kaj la vangoj tremis dum unu momento antaŭ ol malmoliĝi kvazaŭ ŝtono.

– Sed Juna!

– Li estas senutila, mizeranima, egoisma, malaminda!

Tion ŝi elkraĉis kun doloro kaj ŝiaj okuloj fulmis kun stranga kolero, preskaŭ malvarma spite al tiu pasio.

– Juna! –mi ripetis.

– Neniam oni scios pri tiu okazaĵo –ŝi daŭrigis senskrupule–. Neniam, Xavier!

Mi retropaŝis kaj miaj manoj restis senagaj,

inertaj. Poste ili retroiris al ŝia ŝultro kie ili haltis, malrezolutaj, antaŭ ol pli malfermi ŝian dekolton kaj, kun ŝajne aŭtomata gesto, senkonscia, ŝi apartigis iomete la ŝelkon de la mamzono kiu postlasis al ŝi sulketon sur la haŭto.

Kaj mi vidis nenion plu, ĉar mi subite trovis min kuranta tra la trotuaro foren sub intensiĝanta pluvo. Malantaŭ mi ĉio restis silenta, kvazaŭ ne estis iu ajn. La morto.

La sekvan tagon, je la sesa kaj duono denove mi estis en la kvartalo de Les Corts, kaj nun fronte al ŝia hejmo, staranta ĉe la pordo de la stratangulo. Mi ne fermis okulon dum la tuta nokto kaj je la sesa horo, kiam la patrino ankoraŭ dormis, mi ellitiĝis. La pluvo estis ĉesinta, la kortaj kaheloj eksekiĝis kaj blovis malseka venteto. Mi restis sidanta sur ŝtona benko apud la necesejo, fumante unu cigaredon post la alia. Mi volis min konvinki, ke tion mi misaŭdis, ke tiun proponon mi ne ricevis, ke ie okazis konfuzo, vortoj povis erariĝi... Sed estis senutile, ŝi diris tion tre klare: mortigi lin.

Mortigi lin. Vivo kun Juna kontraŭ pago de alia vivo, de oldulo egoisma kaj mizeranima, laŭ ŝiaj priskriboj. De nekonata homo kiu kontraŭ mi faris nenion... Mi sentis min tute elĉerpita je fortoj, malplena; ĉio, eĉ mi mem, al mi estis fremda, stranga. Nur ŝi daŭre ekzistis, provoka kaj neevitebla. Sed ŝi jam ne estis la virino kun kia mi konatiĝis antaŭe. Mi perdis ŝin, neniam mi... Sed mi ne povis perdi ŝin. Necesis fari ion. Ĉio restis fuŝita. Iu, alia homo, elmergiĝis el la profundo de ŝia ekzisto kaj malkaŝis al mi aspekton teruran, sangavidan, volon rezolutan, kapablan... Sed ŝi estis por mi. Mi blindigis ŝin. Pro miaj karesoj kaj kisoj ŝi perdis la saĝon, ŝi ardis kiel brulanta braĝo pro ŝtorma blovo de vento. Kaj la vento estis mi, la vento ankaŭ brulanta kiu nun, memorante la malsekajn karnajn lipojn sub mi, ĝemis kiel vundita besto.

Sed mortigi homon...

–Kion vi faras ĉi tie, Xavier?

La patrino sin direktis al la sojlo de la pordo, nekombita kaj frostosentema en mislaĉita negleĝo. Timigite mi revenis al la ĉiutaga kaj vanta realo.

–Mi ne havis dormemon.

– Al vi okazas io –ŝi diris, kun malfida rigardo,

sed amika, zorgigita, plena de amo nenion atendanta.

–Ne...

–Ĉu knabino? –ŝi neevitable insinuis.

–Ne. Verŝajne pro la printempo! –mi provis ridi.

Sed interne io velkis. Kaj tio daŭris la tutan matenon, dum la kutimo kaj la inerteco pelis min frapi al fremdaj pordoj kaj paroli al anonimaj infanoj kiuj, ne sciante, estis peonoj de groteska ludo al kiu mi min allasis volonte ĉar ion ajn mi devis fari, ĉar mi devis pergajni monon se mi volis daŭre vivi... Kiel ankaŭ volis daŭre vivi tiu nekonata onklo kiu ne havis problemojn, kiu eble estis malaminda, sed rajtis morti laŭ postulo de la naturo.

Demandoj kaj respondoj, maĥinaciaj ridetoj, malrapida progreso de pordo al pordo, eĉ sen malpacienco jam, sen ĉagreniĝo, sen io ajn. La laboro kiun necesas fari, kiun faras alia homo dum ni daŭre diras al ni: “devas esti iu elirvojo”. Sed ne serĉante ĝin, atentaj al tiu speco de makulo interne etendiĝanta kaj ĉion inundanta, kaptante profitanton de la foresto de la proprietulo kiu fariĝis simpla spektanto.

Kaj, dum la unuaj posttagmezaj horoj, aperis la revulsiilo. Ŝi venis tra la strato, kun akompano. Ni renkontiĝis front-al-fronte kaj, dum la knabo parolis al ŝi, ŝi tenis la rigardon fiksita al mi, kun okuloj grandaj kaj profundaj, pli belaj, pli promesplenaj ol iam antaŭe. Mi ne certis ĉu halti. Sed ŝi solvis la situacion

sen eĉ momenta hezito. Preterirante, unu apud la alia, ŝiaj okuloj glitis de mia vizaĝo, tra la strato, kvazaŭ mi estus nekonato. Mi ne deturnis min por rigardi ilin, ne volis scii ĉu ŝi deturniĝis. Mi sekvis la vojon ĝis la haltejo de la tramo kiu veturigos min hejmen. Sed tio kio ŝajnis velki, reakiris novan vivon, unue en formo de senesperigo, senprecedenca senesperigo, tute senrilata kun tiu pasia elreviĝo kiu al mi ne permesis dormi kaj je la sesa min devigis forlasi la liton, poste en formo de kolero kiu malrapide transformiĝis en specon de senbrida anhelo atingi finfine la fundon de mia mizero, suferi ĝisvunde la humiliĝon de mia amo.

Sed je la sesa kaj duono kiam, forlasinte la labortaskon antaŭtempe, mi atendis fronte al ŝia hejmo, miaj sentoj jam estis aliaj. Fakte ili estis miaj ĉiamaj sentoj. Ŝi estis mia kaj mi ne volis rezigni pri ŝi. Ni trairus la inferon kaj ŝi revenus al la vilaĝo. Sed tiam mi jam estos signinta sur ŝi mian posedon. Kompreneble ĉio estus pli facile se mi estus sciinta la manieron. Dume mi sciis nur ke mi pardonos al ŝi tiujn fajrerojn da malico kiu kuraĝigis ŝin proponi al mi la murdon kaj ŝia amindumo kun belaspekta knabo. Ĉi lasta afero ne estis al mi problemo. Ŝi volis ŝovi lin kontraŭ mia nazo, sciigante ke aliaj atendas la propran ŝancon, por ĵaluzigi min... Verŝajne mi estis iom mizerkora, sed la amo fojfoje devas sin liberigi je skrupuloj. Tion mi sciis. Mi kredis, ke mi scias. Ĉar mi ankoraŭ ne sciis sufiĉe.

Ŝi eliris post dek minutoj, kovrita per pluvmantelo, ĉar la vetero denove minacis pri pluvo. Ŝi fermis la kradon de la domo kaj, eĉ ne rigardante min, foriĝis direkte al la Maternitat. Mi sekvis ŝin senhaste, senkonscie atente al la ludo de ŝiaj kruroj grimpintaj sur la altajn kalkanumojn, kiuj ŝancelis ŝian paŝadon, preskaŭ aera se oni vidis de malproksimo. La korpo, kun strikta ŝtofo blua kaj anonima, posedis la saman gracon kiu ravis min kiam mi vidis ŝin leviĝi el tiu benko en la Avenuo Diagonala kaj iri al la bushaltejo, preskaŭ senpudore bela sub jupo kaj bluzo kiuj, pli ĝuste ol kaŝi, montris la firmecon de ŝia karno juna kaj dolorige provoka.

Mi ne renkontiĝis kun ŝi ĝis la momento kiam ni atingis la ĝardenetoj kiuj malfermiĝas trans la novaj domoj, kiam mi vidis ke ŝi haltas. Kiam mi metis min apud ŝin, tiam ŝi reprenis la marŝon. Dum la irado ŝi demandis:

–Kial vi venis?

La voĉo estis kalkulite malmilda kaj malamika, kio min afliktis. Kaj eble tial mia respondo estis humila:

–Mi devis vidi vin, Juna.

–Ĉu ni ankoraŭ ne priparolis ĉion?

–Eble ne.

–Vi forfuĝis kvazaŭ vidinte monstron. Kaj tio mi estas! –ŝi eksklamaciis dum rigardis min unuafoje–.

Tio mi estas, se defendi la propran feliĉon super ĉio, igas min monstro.

Mi murmuris kvazaŭ de la kolumo de mia ĉemizo.

– Poste ni eĉ ne povos rigardi al ni en la vizaĝon.

Ĉio estis tre malsimile kompare kun la maniero kiel mi imagis tion. Mi ne antaŭsupozis tiujn vortojn, nek la fakton ke fronte al ŝi mi sentos min neniomigita. Mi perceptis ŝian avancon apud mi, la parfumo de ŝiaj kapharoj min volvis... Ĉarma knabino ĉe la manatingo kaj, samtempe, tiom malproksima kiom stelo kiu, infantempe, diris ke ŝi estis mia. Evidente ŝi neniam estis mia, kaj eble ankaŭ ne estos mia se mi ne trovas la ĝustan vorton, la konvenan tonon, la necesan geston.

Ŝi ne kontestis mian komenton kaj ni promenis silente kvazaŭ du piedirantoj kiujn la hazardo kunigis por momento kaj kiujn ĝi tuj dispartigos. Ni jam estis proksime al la kampo de la Futbal-Klubo Barcelona kiam ŝi subite haltis kaj diris:

– Kiam al vi sufiĉos, simple diru kaj mi povos reveni hejmen.

– Al mi neniam sufiĉos.

– Al mi do jes: nun!

Ŝi komencis geston kun la intenco sin forturni, sed en tiu momento, neatendite, fulmo de furiozo min faradizis tra la tuta korpo kaj mia mano rapide prenis

ŝian brakon. Antaŭ ol pensi, la vortoj sin ĵetis el mia buŝo.

– Vi ne moviĝos de ĉi tie!

Ŝi esprimis nenian emocion. Ŝi rigardis al la fingroj kiuj ŝin premis, kaj demandis:

– Kial?

– Mi venis por ke vi reprenu la saĝon, por klarigi finfine...

– Ni ne devas klarigi ion.

– Kompreneble jes. Ĝuste nun!

– Lasu min!

– Kiam mi volos!

– Ĉu vi volas retenigi min perforte, ke ni ludu scenon?

– Merde egale! – mi preskaŭ kriis—. Al mi estas pli ol sufiĉe!

Ŝi daŭre tenis sin serena, marmore malvarma sur sia piedestalo. Ŝi kraĉis:

– Foriru! Mi malamas vin!

Nun mi fariĝis sala statuo. La vorto, ĉar neatendita, skurĝis mian vizaĝon kvazaŭ bastonfrapo, perkutis interne de mia koro, ĝis dispremi ĝin. La kolero pereis kiel fajro de branĉetoj pro nutromanko kaj mi lasis la manon fali. Mi turnis min.

Mi sentis, kiel ŝi alkroĉiĝis al mi, konvulsia, kaj

miaj okuloj renkontis damaĝitan mienon, sen eĉ spuro de beleco, patosan.

– Pardonu, pardonu! Mi jam ne scias, eĉ kion mi diras... Xavier, Xavier, pardonu min! Mi vin amas, adoras.

Mi tuŝis ŝian vizaĝon, kortuŝite kiel mi ne memoris senti min antaŭe, preskaŭ ploronte. Interna voĉo certigis min: ŝi estas via, tute via... La ĉiutaga voĉo diris dum mi prenis ŝian manon per la mia:

– Venu.

– Jes, Xavier, jes... – Nur post momento, ŝi demandis:– Kien?– Mi ne scias. Tial ni restis en la sama loko dum la nokto falis kun mirinda rapideco. Ni estis solaj fronte al la palisaro de la kampo, simile al du insektoj kaptitaj en reto, kie iom post iom sufokiĝas.– Ni ne preparolu plu –mi diris. Ŝi komprenis min, ŝiaj okuloj sufiĉe bone montris tion, sed ŝi ne jesis, ne replikis.

– Ni ne preparolu plu –mi ripetis.

Ŝi levis la manon kiun ŝi havis libera ĝis la brustfaldo de mia jako kaj faris:– Mi volas resti kun vi.– Ni geeziĝos, mi jam diris al vi. Ni estos malriĉaj se necese.

La mano glitadis malsupren, la lipoj fermiĝis kun stranga muteco.

– Rigardu al mi, Juna.

Ŝi ne sekvis mian indikon, sed diris:

– Vi ne scias... Xavier. –Tiam ŝi levis la rigardon—. Mi volas senti min sekura... Nun ĉio estas vortoj, kaj tio estas tiom nova, tiom... Mi nur volas tion kio apartenas al mi.

–Iam vi disponos tion.

–Nun, Xavier. Ŝia rigardo denove vibris—. Kion vi volas? Fermi min en kuirejo, plenigi min per gefiloj, rigardi min distrite de tempo al tempo dum vi pensas “Kiel ŝi ŝanĝiĝis”!

–Tute ne temas pri mono.

– Vi diris ke via patrino servas en domoj, flegas malsanulojn... Kaj se tion devus fari mi? La vivon mi volas pasigi kun vi, ne kun aliaj.

–Mi trovos alian laboron.

– “Alian laboron”! Ni ĉiam vivos pendantaj, zorgantaj pri mono kiu konkeras nenion, pri ŝuldoj, pri la lu-mono, pri la kvitancoj de elektro, de gaso...

–Estas ridinde!

–Pensu pri via hejmo. Pri kio parolas via patrino? Pri kio ŝi interesiĝas?

Mi silentis. De jaroj la patrino ne parolis pri alia afero.

– Foje mi kredas, ke por vi mi estas nur kaprico kaj ke, se vi pretas edziĝi kun mi, estas nur por komplezi vin. Sed mi...

– Silentu, Juna!

– Al vi mi ŝajnas tiom bela ke la manoj sekvas la okulojn kaj vi pensas nur pri tio: nudigi min, kuŝi kun mi. Mi volas ke vi amu min, krom deziri min.

– Sed mi amas vin, Juna! Ĉu vi ne vidas?

– Ne sufiĉe.

– Ni ne povas interkompreniĝi –mi diris tiam–. Vi postulas tre multe al mi, sed kion vi donas al mi, interŝanĝe? Laŭ vi ĉio dependas de la mono, kaj amanta virino, vere amanta, ne faras al si zorgojn pro tio. Ŝi nur klopodas vivi kun la amata viro, kiel ajn, kie ajn. Eĉ ne kapablas ŝi rifuzi sin, se la viro ŝin petas. Kaj vi...

Ŝi mordis al si la lipojn kaj, kiam malfermis ilin por paroli, mi vidis ke ili ŝajnis fenditaj, kvazaŭ post febra atako.

– Ne, Xavier –ŝi diris, kaj ŝia voĉo iomete tremis–. Mi estas sama kia la ceteraj.

– Mi do volas kuŝi kun vi –mi respondis brutale.

– Jes.

– Jes –mi ripetis–. Neniam mi pensis... Sed jes, Xavier. Se tio vin konvinku. Kiam plaĉos al vi.

– Juna...

Mi denove sentis min humila, kaj malgrava. Preskaŭ kun timo, mi tuŝis ŝian vizaĝon, kaj ŝi mallevis ĝin iomete, kaj kisis mian manon. Post

momento ni brakumis nin reciproke kaj mi mergis la kapon en ŝiajn kapharojn dirante:

– Ne. Pardonu... Nun vi pardonu min. Mi ne volas ion kion vi ne volas.

– Mi ja volas, Xavier. Mi ĉiam volas, vi bone scias...

– Ni povas atendi...

– Ne... Mi petas nur ion.

– Kion?

– Ke vi ne portu min kien ajn. Portu min en lokon kie ni estos solaj kaj kie neniam estis iu ajn.

Mi portis ŝin en mian hejmon. La sekvan tagon la patrino ne revenis ĝis la naŭa horo, la naŭa kaj duono pli ĝuste, kaj ni disponis pri du horoj por ni. Por agi pli diskrete mi enmanigis al ŝi la ŝlosilon de la krado kiu apartigis niajn ĉambrojn dise de la ŝtuparo. Mi estus enironta tra la malantaŭa enirejo, tra ligna pordo protektita per lada lameno nun rostiĝinta, kiu komunikis al la suba strato. La konstruaĵo, en la kvartalo de Horta, estis pendigita sur deklivo kaj, de la stratpordo, necesis trairi mallongan koridoron ĉe kies fundo komenciĝis sesdek tri ŝtupoj kondukantaj al la loko en kiu la patrino kaj mi loĝis. Ne estis pordisto kaj la najbaroj ne estis trudemaj homoj kun la kutimo resti fermitaj en la propra hejmo. Preskaŭ ĉiam mi uzis la kortan pordon, kiel ankaŭ la patrino, kaj ofte ni pasigis tutajn semajnojn ne malfermante la kradon, ĉar neniu el ni emis supreniri ŝtuparojn. Ni nur havis unu ŝlosilon, kiu ofte pendis apud ŝranko, kaj tiun matenon mi atendis ĝis ŝia foresto por enpoŝigi ĝin. Ni interkonsentis ke tagmeze ni renkontiĝos dum mallonga momento ĉe la stacio de Placo de Katalunio, kaj mi transdonis la ŝlosilon al ŝi dum ni transiris de unu elirejo al la alia tra la subgrunda tunelo. Ni interŝanĝis malmultajn vortojn, ĉar mi memoris ke la

antaŭan tagon ni disiĝis kaj mi ne demandis al ŝi pri tiu knabo kiu ŝin akompanis.

Ŝi ridis:

– Ĉu vi estas ĵaluza?

– Tial vi promeniĝis lin antaŭ mi, ĉu ne? Por ĵaluzigi min.

– Ne. Mi certigas vin ke tio okazis hazarde.

– Evidente. Kaj kiu li estas?

– Mia kuzo. En Barcelono estas alia onklino mia. Ni renkontiĝis kaj li akompanis min dum kelkaj momentoj.

– Kial do vi preterpasis kvazaŭ vi ne konus min?

Ŝi eltenis mian rigardon.

– Kion mi devis fari? Vi ja memoras ke ni disiĝis la antaŭan vesperon.

– Jes... Kaj se hieraŭ posttagmeze ne estus veninta rondiri ĉirkaŭ via hejmo... Ĉu vi konsideris la aferon definitiva?

– Vi scias, ke ne. Mi estus veninta renkonti vin – ŝi ridis –. Mi ne lasos vin eskapi tiom facile!

Dum tiu mallonga momento ni ŝajnis aliaj homoj. Kontentaj, gajaj, senĝenaj. Mi nepre devis rimarki ke ni neniam fartis tiel kaj ke ĉiam, ekde la unua renkontiĝo ni agis en malklara medio, kie ni ĝuis plezuron ĉar, ĝis ioma grado, ni montris nin tiaj kiaj ni

estas. Flamo ŝprucis kaj vidalvide ni alfrontiĝis kun pasio, superplenaj je avido kiu nin allogis, kiu nin kunfandigis, tiom forta kaj blinda ke la sama rido, kiam ĝi aperis spontane, estis pli erotika krevo ol montro de aŭtenta ĝojo.

Ni vivis en aparta mondo, kiun posedis nur ni; la mondo kiun ni preskaŭ forgesis dum ni iris tra la metrotunelo, sed kiun denove ni renkontos, kun ĝia tuta intensiveco, post kelkaj horoj, tiun saman posttagmezon. Fakte la mondo, kiu jam atendis nin post nia adiaŭo kaj la reeĥo de ĉi leĝera interŝanĝo de vortoj estingiĝis, ne venonte anstataŭi ĝin la laboraj okupoj kiuj, denove, min atendis sub la formo de virinoj kiuj, post iom da preparlaboro, konsentis ke mi eniru la vestiblon de sia hejmo kie, ofte stare, ni interŝanĝis niajn indiferentajn konfidencojn pri produktoj kun mallongaj nomoj, kiujn reklamkampanjoj altrudis kaj kiujn mi forgesos baldaŭ kiam, ferminte la lastan pordon, mi estus prenonta taksion por alveni pli frue hejmen.

Ŝi jam ĉeestis. Kiam mi puŝis la internan pordon, nur duonfermitan kiel kutime, tiam mi vidis ŝin konfuzita en la duonombro de la ĉambro, kaŭranta sur la divano kiun mi uzis kiel liton. Fakte, ŝi dormis. Ŝi estis demetinta la vestaĵojn, kiuj nun pendis de la seĝapogilo, kaj ŝi havis kruron refaldita ene de la subŝtofo, kaj la alian etendita ĝis la ekstremo kie pendis la vestaĵoj. Mi alproksimiĝis.

Kun la okuloj fermitaj kaj la vizaĝo kvazaŭ forlasita, ŝi daŭre estis tiom bela kiom ĉiam, sed suferinta modifon. La vizaĝo, kiun mi kontemplis, kaj la animesprimo, estis malpli malicaj, mildigitaj per speco de naiveco kiu malkonfirmis svage la voluptavidon de la korpo kiun la subŝtofo tute ne kovris. Mi rigardis ŝin longe, ravita de la animala ĉarmo de ŝiaj senmovaj kaj elmetitaj membroj, de la desegno de la lipoj kiujn ŝi iomete malfermis, de la haroj kaŝantaj ŝian tutan frunton kaj parton de la vango.

Poste mi ŝovis la manon antaŭen al la nuda ŝultro, kie la ŝelketoj de la subŝtofo kaj de la mamzono estis apartiĝintaj kaj, ĉe la momento kiam mi estis tuŝonta ŝin, mi rimarkis ke ŝi malfermas la okulojn, min rigardante.

Ni interŝanĝis rideton, komence sen vortoj. Ambaŭflanka rideto retenita sed elkora, la ŝia pli dolĉa ol kutime, eble ankoraŭ iom malproksima ĉar ŝi nun ĵus vekigis.

Mi sidiĝis apud ŝi kaj ŝi kuntiris la krurojn ĝis ili restis kontraŭ mi, kaj ŝi rektigis iomagrade la korpon.

– Mi endormiĝis – ŝi diris.

– Jes... Ĉu vi atendis min longe?

– Je la sesa kaj duono mi jam estis ĉi tie. Kaj atendente...

Ŝi haltis, ĉar mi kliniĝis sur ŝin, ŝovante brakon

sur ŝia dorso, devigante ŝin pli entiri sin dum mi kaŭriĝis. Ŝiaj lipoj estis varmaj, iom blandaj, komplezemaj.

–Xavier, Xavier... –ŝi diris.

Tuj poste, tamen, mi rimarkis ke ŝi kuntiriĝas kontraŭ la muron dum ŝia voĉo ŝanĝiĝis:

–Ne, Xavier, ... Ne...

Eble mi ne komprenis, mi daŭre retenis ŝin, kuntenante ŝin, sed ŝi glitis ne foreskapante, kuntiriĝinte en neimagebla spaco, kun genuo starigita antaŭ mi kontraŭ la ventro.

–Mi ne povas, tute ne! –ŝi kriĉis.

Per abrupta moviĝo, ŝi provis salti de la lito kaj preskaŭ sukcesis, ĉar kiam mi povis kapti ŝin, en tiu momento ŝi jam havis piedon sur la planko.

–Juna!

Front-al-fronte, ni rigardis nin reciproke per ruĝiĝintaj okuloj, samtempe precizaj kaj svagaj.

–Ne, Xavier... Mi petas, mi petas...

Tio estis seninterrompa plendo kaj mi ne povis ignori ĝin, malgraŭ la neeltenebla urĝeco de mia deziro.

–Sed Juna...

Ŝi preskaŭ ploris. Ŝi montris tre strangan mienon, kontrahiĝintan vizaĝon, sen malamo. Ŝia aspekto ne

ĝojigis.

– Mi ne povas – ŝi ripetis.

– Sed kial? Kaj tiuj kisoj, tiuj karesoj...

Ŝi brakumis min.

– Ĉar mi amas vin!

– Ne sufiĉe, kiel mi vidas.

– Jes, Xavier, jes! La sola ideo pensi ke mi povus perdi vin, min timigas... Kaj tio, ĉi tie...

Ŝi delasis sin kaj, per gesto, indikis la ĉambron. Dum momento ni ambaŭ ekzamenis ĝin. Ĝi ne estis la dormejo, ĝi estis la manĝejo. Ĉe la alia ekstremo estis tablo, oni neniam pripentris la murojn, sur ili ankoraŭ videblis la farbaj makuloj kiujn postlasis la pentristo kiu antaŭe okupis la ĉambron, ankaŭ estis ŝvelaĵoj pro humido...

Kvazaŭ pro elglito de la vortoj, ŝi diris:

– Ĉi loko estas tre sordida.

– Mi ne disponas alion – mi replikis.

Ŝi ŝovis siajn manojn sur la vizaĝo kaj apartigis la malkombitajn harojn.

– Mi ne povus loĝi en tia loko. Mi ne povus...

– Mi ne disponas alion.

Ŝi daŭre sidis komforte, kun la manoj sur la vizaĝo, sed sub la manoj mi vidis la lipojn konvulsiaj ŝajne luktantaj kontraŭ ekploro. Poste ŝi sin rektigis,

sin starigis. Ŝia korpo brilis en la duonombro, svelta kaj blindiga, desperige perfekta. Nebrideble, mi etendis al ŝi la manojn.

–Kion mi faru, Juna?

Dolora anxio kreskis tra mia korpo, ĝi pliintensiĝis ĝis krevo kaj restis ankrita poreterne.

–Kion mi faru, Juna? –mi ripetis.

–La onklo... –ŝi diris duonvoĉe.

Miaj manoj tordiĝis, mi najlis la ungojn ĉe ŝia dorso kaj ŝi ĝemis malforte, sed ne moviĝis, inundante min per la vigla kaj printempa aromo de sia korpo streĉita simile al pafarko.

–Estus tiom facile.

–Unu vivo, Juna...

–Kia vivo?

Ŝi lasis sin fali sur unu el miaj genuoj, kuntiriĝinte, kun duonapertaj kruroj, kaj ŝia vango premanta kontraŭ la mia.

– Li meritas tiom da respekto kiom insekto –ŝi diris.

Mia kapo turniĝis, mi sentis naŭzon, la manoj fermiĝis kaj malfermiĝis spasme, ankoraŭ turmentante ŝin, karesante... Mi ne regis mian konduton. Kaj ŝi daŭre ploris:

–...Mi planis ĉion... Iun nokton, kiam ni...

–Kaj pri la polico? –mi tiam demandis.

–Al ni povas okazi nenio. Neniam oni scios ke ni kulpas.

–Ĉiuj... –mi englutis salivon antaŭ ol diri la vorton.–Ĉiuj murdistoj same opinias.

–Sed tiu kazo estas malsimila. Aŭskultu...

–Ne, ne povas esti...

Tamen ŝi sin premis pli forte al mi, kisis min.

–Ni ĉiam estos kune, ĉiam... Ĉu vi ne vidas? Vi ne bedaŭros, Xavier. Mi ĵuras. Mi...

–Oni kaptos nin. –Mi diris obstine.

–Ne, oni ne povos. Neniu konas vin. Nenia rilato ligas vin kun li, estas neniu motivo. La polico ne povas fari ion, ne povas malkovri ion se ne ekzistas kialo.

–Sed ĝi ja ekzistas. Oni suspektos pri vi kaj, de la fadeno al la nadlo...

–Ne...

Ŝi tuŝis mian vizaĝon kaj igis min rigardi al ŝi.

–Temos pri perfekta krimo, vere perfekta. Vidu...

Mi lasis ŝin klarigi. Neniu sciis ke ni estas konatoj, kaj por des pli da sekureco, de tiu tago ni

decidis ke ni ne plu renkontiĝos. Ni elektos nokton dum kiu ŝi eliros kun la onklino, kaj tiel alibio senkulpigos ŝin.

– Sed se ni ne povas renkontiĝi –mi obĵetis–, kiel ni interkonsentos pri la tago?

– Mi vokos vin telefone.

– Mi ne posedas telefonon, vi jam scias.

– Al la oficejo...

– Tie mi estas malofte... Ne, la tuta afero estas granda frenezaĵo. Kaj kio pri la armilo? Ĉu mi strangolu lin? Ĉu per ponardo?...

– Li posedas pafilon, vi povas alpreni ĝin.

– Ĉu veran pafilon?

– Jes. Memoru ke li estas armeano. La deĵora pafilo. Li kaŝas ĝin.

– Kiel mi akiru ĝin?

– Tre facile. Mi ja klarigos, kie ĝi estas.

– Sed mi daŭre restas sen telefono.

– Iu najbaro... Kiam vi devas telefoni... Kien vi iras?

– Foje, al la ĉefetaĝo. Tie estas la najbaroj kun kiuj ni havas pli bonan rilaton.

– Tio do plene taŭgas. Ni interkonsentos pri la difinita horo, tiel ke vi estu hejme.

Mi lasis ŝin ŝoviĝi al la lito kaj, malrapide, mi starigis min.

– Nun temas pri tio, ke mi ne postlasu spurojn.

– De la momento post kiam vi ne plu rilatas kun mi, vi ne postlasos iun ajn spuron. Mi donos alian nomon, pri kiu ni ankaŭ interkonsentos... Fojfoje, la onklino kaj mi eliras, tiam ni iras al kinejo, kaj li neniam akompanas nin, ĉar li ne emas. Vespere li iras al la Rondo kaj ne revenas ĝis la deka horo. Poste li okupiĝas pri sia kolekto.

– Kia kolekto? Ĉu de armiloj?

Mi bruligis cigaredon kun fingroj tremantaj, kaj ŝi etendis manon.

– Invitu min al cigaredo.

– Mi ne sciis, ke vi fumas.

– De tempo al tempo.

Ŝi sin klinis sur la alumeton, kaj ŝia vizaĝo kaj la supera parto de ŝia korpo elombriĝis, kio reliefigis tiome ankoraŭfoje, nun tre videble, ŝian junan kaj orgojlan sinon. Ŝi rimarkis ke mi fiksis tien la rigardon kaj, kun la cigaredo en la buŝo, ŝi faris geston

kun celo delevi la mamzonon kiu kuŝis sur la lita tuko. Kiam ŝi vidis, ke ĝi restas neutiligebla, tiam ŝi pritretis la subŝtofon dum reprenis la parolfadenon:

– Je la dekdua li enlitiĝas...

– El kio konsistas la kolekto?

– Ah, jes, temas pri kolekto da poŝtmarkoj. Ĉiunokte li dediĉas kelkajn minutojn al tiu afero... Mi lasos fenestron malfermita, vi eniros la ĉambrom, malfermos la noktotablan tirkeston kie li tenas la pafilon, prenos ĝin kaj iros al la skribejo.

– Mi ne scias, kie situas lia ĉambro kaj la skribejo.

Ŝi diris trankvile:

– Kial vi ne ŝaltas la lumon?

Mi ŝaltis la lumon. Sub la kruda lumo kiun radiis lampo pendants de la manĝeja plafono, mi aspektis pli mizera ol antaŭe. Sed ŝi alkonformiĝis. Sidanta sur la lito, kun subŝtofo pendants ĝis la komenco de la femuro, malkombita kaj kun la lipa farbo disŝutita, ŝia ŝajna neglektemo harmoniis kun la ŝvelintaj murpaperoj, kun la senkrustiĝinta planko, kun la plafono de nekovritaj kaj nigriĝintaj traboj. Sed pro tiuj detaloj ŝi ne estis malpli dezirinda. La dolĉa linio de la ŝultroj, la intensa kaj absorbita vizaĝesprimo,

enhavis patosan elementon kiu eble ankoraŭ des pli stimulus ol ŝia troeco kiam ŝi sin ĵetis al miaj brakoj. Denove mi lasis min fali apud ŝi.

– Juna...

– Kio, Xavier?

– Via beleco suferigas min...

Ŝi desegnis rideton per la lipoj kaj akceptis la kuntuŝon de miaj etendiĝantaj manoj, nerimarkeble ŝi modifis sian pozicion kaj sopiris dum mi karesis ŝin. Poste ŝi brakumis min, kaj flustris mallaŭte:

– Kion vi opinias pri mi, Xavier?

– Mi ne scias. Mi ne pensas. Mi ne povas pensi. Se mi pensus...

– Kio?

– Mi forirus de vi kvazaŭ de fajro. Tio estos tre freneza ago.

– Ne, vi vidos –kaj ŝi apartiĝis iomete–. Ne tuŝu min plu.

– Se mi povus eviti!

– Jes. Pensu pri la posta situacio. Ĉiam kune...

– Ankaŭ nun ni povas esti kune.

– Ĉu ankoraŭ kun la sama ideo? –ŝi plendis–. Se

ekzistus la plej eta danĝero, mi ne proponus tion al vi. Sed ne estas risiko. –kaj tuj poste:– Donu al mi paperpecon kaj skribilon. Malfruiĝas...

Mi elpoŝigis kajeron kaj ŝi tuj prenis ĝin el miaj manoj. Nervoze, ŝi komencis streki kelkajn liniojn. Post nelonge tio jam iĝis mapo, senrigora, resuma, sed sufiĉa.

– Vidu... Jen la fenestro kiun mi lasos malfermita por vi. Ĝi respondas al ilia ĉambro. La noktotablo estas en tiu flanko, malantaŭ la lito, kaj la pafilo estas interne. La pistolo ĉiam estas ŝargita. En la alia flanko estas la pordo, jen... Kiam vi estos en la koridoro, vi nur devos sekvi ĝin al la fronta flanko. La skribejo estas dekstre, malantaŭ la dua pordo. Verŝajne ĝia pordo estos malfermita, ĉar li neniam fermas ĝin. La tablo estas en la liva flanko, inter la pordo kaj la fenestro, kaj li eble sidos trans ĝi... Ĉu vi komprenis bone?

Mi jesis silente, per gesto. La afero estis serioza, iumaniere ni jam transpasis la parolan stadion; tiu precizeco de la planoj situigis nin en tuja proksimeco al la ago... Murdo. Murdo kun malvarma sango. Ĉe la pojno tremis nervo, muskolo, mi ne scias; tremis io kio perkutis en mia interno, peza kia peco da plumbo;

kia kuglo kiu...

Denove mi starigis min. La cigaredo kuŝis sur la planko, ĝi falis sen mia rimarko. Ŝi ankoraŭ tenis la sian en la buŝo kaj rigardis min el malantaŭ fumkolono.

– Ĉu vi ne aŭskultas min, Xavier?

– Jes.

– Kio okazas al vi?

Mi krevis:

– Ĉu vi volas scii, kio okazas al mi? Tio: ke mi neniam mortigis homon.

– Nek mi – ŝi simple diris.

– Kaj mi ne intencas.

Mi frapis mian bruston patose. Ŝi lasis la kajeron, kaj leviĝis al sida pozicio.

– Xavier... Ni ne perdu la trankvilon. Se mi povus, mi preferus mem plenumi la agon, pri tio mi certigas vin.

Longe ni rigardis nin reciproke. Unu fronte al la alia, senmovaj kaj silentaj, fremdaj, apartigitaj per netransirebla abismo. Sed tio daŭris nur unu palpebrumon. Ĝis la momento kiam ŝi faris paŝon al la

seĝo, reprenis la ŝtrumpojn kiujn ŝi estis lasinta sur la vesto kaj denove sidiĝis por surmeti ilin. Tiam mi demandis:

– Kion vi faras?

– Mi foriras, Xavier. Vi kaj mi neniam konatiĝis.

Mi ne respondis. Almenaŭ ne per vortoj, sed unu sekundon poste ŝi kuŝis etendita sur la lito, kun la manoj premantaj sur la ruĝiĝinta vango, kiu eble postrestis prideseignita per miaj kvin fingroj, kaj la ŝtrumpoj sur la plankon falintaj.

Mi iris ĝis la ŝranko, elprenis duone malplenan botelon da brando kiun mi aĉetis ŝute. Ŝi ploris. Mi aŭdis la retenitan ĝemon dum verŝante por mi likvoron en la glason, kaj engorĝigis ĝin unuglute. Mi ripetis la manovron.

Denove apud la lito, mi tiris ŝin je la brako, tiel devigante ŝin malkovri sian vizaĝon, duone leviĝi al sida pozicio.

– Bonvolu ripeti.

Ŝiaj okuloj glimis.

– Vi estas... Estas...

Efektive, post kelkaj sekundoj ni estis unu en aliulaj brakoj, milde kaj arde, brulante kvazaŭ seka

arbusto, lipoj kontraŭ lipoj.

– Ĉu vi povus?... Diru, ĉu vi povus foriri?

– Ne. Neniam –ŝi diris–. Neniam, Xavier! Kisu min!

Mia koro batadis furioze. Sed nun ni jam ignoris ke ŝi estis rifuzonta min, kiel ŝi preskaŭ faris, kaj ke ni denove sidos ĉe la rando de la lito, kun la malfaldita kajero antaŭ ni, haste ripetante ĉion kion ni jam estis dirintaj, ĉar la tempo fuĝis, jam estis preskaŭ la oka kaj tri kvaronoj, kaj la patrino devus alveni baldaŭ...

– Ni povas ŝajnigi ŝtelon, vi forprenu iun valoraĵon... Ekzemple albumon. Li posedas tre valorajn poŝtmarkojn... Vi kovru viajn manojn per gantoj, evidente, por ne postlasi spurojn.

– Kaj kiam ni renkontiĝos? Se la polico suspektos, ĉar oni certe suspektos...

– Mi devos resti tie dum la enketado daŭros, kompreneble. Poste mi transloĝiĝos en la vilaĝon, kiam estos pasinta la prudenta tempo... Ni diru, ses monatoj.

– Kial tiom longe?!

– Ni devas agi prudente. Necesas ke la afero estu perfekte kalkulita, mi jam diris. Ĝuste ses monatojn

post la tago kiam... De la tago –ŝi ripetis ne decidinte pri precizigo–, mi revenos. Sed vi kaj mi ne konatiĝis. Vidu, kion mi pensis...

La plano estis fakte perfekta, ŝi antaŭvidis absolute ĉiujn detalojn. Ses monatojn post la krimo ŝi estus venonta al repremiera kinejo, ni interkonsentis pri la kinejo Infanta, ĉe la strato de Sarrià. Je la unua surekranigo. Ankaŭ mi. Ĉiu en propra flanko, du fremduloj, du nekonatoj. Sed ŝi irus kun akompananto. Ŝi volis atestanton. Tie, mi sidus apud ŝi, ŝi ne montriĝos homevitema, kaj paŝon post paŝo ni teksados amikecon. Dum la paŭzo mi proponos al ŝi trinki ion, kaj post la spektado mi iros kun ŝi. Ĉio ŝajnos natura. Multaj gefianĉoj konatiĝis ĉi tiel.

–Kaj vi kun kiu venos?

– Mi ne scias ankoraŭ. Kun amikino. Mi havas aliajn amikinojn, krom la handikapita kiun mi vizitas sabate. La ĉefa punkto estas tio, ke de nun estu neniuj kontaktoj, absolute neniuj, inter vi kaj mi.

– Kaj se iu nin vidis, tiu jam rimarkis nian rilaton...

– Ni renkontis neniun. Kaj eĉ en tiu okazo, estos pasintaj ses monatoj. Kaj, precipe, se oni vidis nin, pri kio mi dubas, tiu ne povis vidi nin pli ol unufoje. Ne

malofte oni vidas viron kun virino. Finfine, ankaŭ mi konas multajn virojn...

– Ses monatoj... –mi ankoraŭ diris.

– Tio nepras, Xavier. Ĉu vi kredas ke ne estos facile eĉ por mi? Sed poste... Por la tuta vivo, Xavier. Ĉu vi ne konscias?

Ŝi hastis kisi min, sed apartiĝis tuj. Restis kvin minutoj ĝis la naŭa horo. Dum ŝi sin vestis, kaj diris:

– Surskribu la telefonnumeron de la ĉefetaĝaj najbaroj. Mi ne donos mian nomon. Mi diros ke mi estas Clara. Je kioma horo vi pensas ...

– Tagmeze. Inter la dua kaj duono kaj la tria.

Poste ni eliris sur la korton, ni malfermis la pordon kaj restis kelkajn sekundojn en la profunda duonombro de la ŝtuparbazoj, ĉe la ekstera flanko de la krado. Ŝi prenis mian manon, premis ĝin kaj ŝovis sur ĝi sian vangon.

– Ĉu vi memoros ĉion?

– Jes, mi konservas la skizitan planon.

– Disŝiru ĝin, antaŭ ol fari ion.

– Jes.

– Xavier...

Ŝi brakummis min, klinis la lipojn antaŭen kaj flustris:

– Mi ne scias, kio okazos al mi... Mi preferus ne foriri de ĉi tie...

– Vi ankoraŭ povas resti ĉi tie, se vi volas –mi diris al ŝi–. Vi ja komprenas.

Ŝi kunpremis sian buŝon sur la mian, poste malligiĝis kaj diris:

– Ĝis, Xavier. La sorto nin favoru.

Ŝi kuris tra la ŝtuparo supren, sin haltigis unu momenton atinginte la ŝtuparan platformon, sed estis tro senlume por vidi, ĉu ŝi levis la manon, mi nur distingis la malhelan mason de ŝia korpo, kiu poste reprenis la ascendon, kiu forfandiĝis en la malproksimo de la enirejo. Malantaŭ mi, ĉe la alia flanko de la korto, la ligna pordo ellasis grincon de siaj neoleitaj ĉarniroj, kaj la voĉo de mia patrino demandis:

– Estas vi, Xavier?

Ŝi ne telefonis al mi ĝis vendredo, ses tagojn poste. Ses longegajn tagojn, senokupajn, dum kiuj mi ne povis pensi pri alia demando. En la agentejo oni konsideris finita la esploradon por la surmerkato de la deterganta marko, kaj nun jam estis komencita studo komisiita de firmao el la sektoro de konservado de nutraĵoj, kiu, laŭ indikoj de mia ĉefo, volis enketi pri tiu demando, kial la homoj ne emas aĉeti multe da konfititaj prunoj. Jaron post jaro, la merkato de tiaj produktoj restis sezona, en klare mala tendenco kompare kun la konstanta kaj regula kreskado rimarkebla en la vendado de aliaj konfititaj fruktoj. Sinjoro Sorribes kaj mi konis la kialon, almenaŭ unu kialon, ĉar la usonaj firmaoj de la sektoro jam trovis sin kun la sama problemo, kaj ni ambaŭ havis la okazon vidi la rezultojn akiritajn de usonaj reklamasistoj kiuj okupiĝis pri tiu afero. Estas klare ke mia ĉefo nenion prikomentis al la kliento kaj preferis procedi per nia propra enketado. Kiel li rakontis, ĉiu popolo havas propran kolektivan psikon, kaj la kialoj de la malmulta vendado pri konfititaj

prunoj en nia lando povis ŝuldiĝi al faktoroj kiujn la usonanoj eĉ ne imagis. Ni ekagis do, forgesinte ĉiun antaŭkonon, pridemandante unue la detalvendistojn de la sektoro, ĉe kiuj ni konfidis trovi reeĥon de la opinioj de la abstinanta klientaro. Sed la rezultoj ne kontentigis nin. Eble mi parte kulpis pro tiu malsukceso; mi mem rimarkis mian mankon de entuziasmo en la laboro, mian malviglecon en la demandado, ke la lerteco ne helpis min, ke mian menson distris aliaj problemoj kaj ke tiu manko de interesiĝo estis tiom evidenta ke ĝi tuj kaŭzis similan indiferentecon ĉe la informantoj. Estas certe ke la afero tute ne entuziasmigis nin, sed ne temis pri tio. En aliaj okazoj ni devis enketi pri aliaj varoj des pli seninteresaj, ekzemple la profunda enketado kiun ni faris pro komisio de fabrikanto de ŝurimenoj, kiu ŝajne ankoraŭ ne rimarkis, nek ni (necesas diri), ke ĵus ekfuroris novaj ŝuoj por kiuj ne necesis rimenoj.

La kulpo estis mia. Estis Juna. Estis tiu projekto tiom zorge elpensita. Estis miaj duboj kaj hezitoj, mia intima ribelo kiu nur cedis ĉiufoje kiam mi rememoris ŝiajn kaĵolajn brakojn, ŝian vizaĝon penetritan de okuloj kie ardis la pasio de ĉiuj promesoj, ŝian korpon kiu ebligis kaj plenumus ilin. Estis la ronĝado de

malkomforto tiom evidenta kia plago kiu igas min vivi malstabile dum la atendado daŭros. Estis matenoj kiam mi diris al mi: “Ne! Mi ne respondos la telefonvokon”, kiam mi estus rezignonta pri delira futuro apud ŝi, kiam mi serĉontus alian knabinon kiu helpu min forgesi kontaktojn kiuj bruligis mian sangon... Sed ĉi tio estis la malfavora afero, kiu des pli bruligis ĝin, ĉar necesis nur memori geston, konduton, kelkfoje eĉ unu solan vorton por denove fali en la kirlon de sentoj blindaj pro furiozo, kiujn ŝi kapablis streĉi kvazaŭ rompiĝontan ŝnuron.

Mi nek manĝis nek dormis, kaj pasigis miajn senokupajn horojn hejme, sidante ĉe la piedo de tiu lito sur kiu mi estis tiom proksima al la punkto teni ŝin, kaj nur de tempo al tempo unu skuado de infana energio reĝustigis min per freneza kaj kruela rideto. Tiam mi pasigis kvin minutojn dediĉante al ŝi ĉiajn insultojn. “Kion ŝi aŭdacis kredi?!”. Ŝi estis malfeliĉa virino, komercis per sia korpo, ŝovis ĝin kontraŭ mia nazo kun profesiula senpudoreco, sed ŝi estis pli memfida, ĉar la naturo provizis ŝin per belega aspekto... Mi ploris. Post ĉi tiuj ekscesoj mi ploris. Ĉar restis ankoraŭ io kio preterpasis la tujan deziron pri fizika posedo. En ŝia virineco, en ŝia aspekto estis

io kio vekis en mi dormantajn kapablojn, kio potencialigis mian personon... Mi ne komprenis klare, mi ne povus difini nek komprenigi al fremdulo, eble ĉar en tiuj momentoj miaj emocioj estis forte skuitaj, sed mi certis, ke de la momento kiam ŝi enrompiĝis en mian vivon, ĉio ŝanĝiĝis, ke neniam plu mi estos denove la sama de antaŭe, ke la nura kontemplado de ŝia beleco narkotigas min. Subite, en la malhela ĉambro de mia vivo, iu malfermis la fenestron.

Verŝajne tial mi malbenis ŝin pleje en miaj momentoj de furiozo, de protesto, kiam fuĝema klarvideco diris al mi ke de nun mi povos kontentigi min per nenio krom per ŝi, ĉar sub ŝia rigardo, kun ŝia ĉeesto, mi adoptis la kutimon vibri kun stranga sentiveco, kun intenso al kies komparo mia antaŭa vivo aspektis malviva, pura kontraŭsenco. Ŝi estis la akvo kiun mi devis trinki, almenaŭ havi je la atingokapablo de la manoj, de la okuloj. Akvo kiu spegulis mian deziron perdiĝi, en kiu mi dronu, en plena ago definitive postulanta nur ke ŝi ekzistu, ke ŝi ekzistu por mi kaj apud mi. Kia ŝi estis. Sen kondiĉoj...

La rilato kun mia patrino malboniĝis, mi preskaŭ ĉesis paroli kun ŝi, kaj ni kunvivis kiel du fremduloj kiuj

pro malfeliĉa hazardo koincidis sub la sama plafono. Ni kverelis du fojojn kaj en la lasta ŝi interesiĝis pri mia malsana aspekto, kaj mi replikis maldelikate, senrespekte. Subite, ŝi komencis ĝeni min.

Ŝia zorgado ofendis min en tioma grado ke devigis min forlasi, eĉ se nur por momento, kaj neniam absolute, tiun tranĉeon malantaŭ kiu mi rifuĝis min dum, senespere, mi intencis pravigi agon pri kiu mi certe sciis ke mi plenumos ĉar, spite al la ribelmomentoj, mi komencis la preparadon de ĉio kio helpos sekurigi mian senpunecon. Mi aĉetis porteblan lanternon, gantojn el koton, tranĉilon por eventuala okazo ne akiri la pistolon, rimenŝuojn kiujn mi uzos en tiu nokto kaj poste forbruligos per la hejma fajrujo de mia patrino. Same kiel ĉiuj krimuloj, mi legis krimromanojn kaj mi sciis aŭ kredis scii ke al la polico sufiĉas tre magraj indicoj por malkovri kulpulon, ke unu spuro povas perfidi min... Eĉ en la plej malprobabla ŝanco ke io ligus min kun la krimo, mi volis ekstremigi la singardemon, tiel ke oni ne povus diri ke pro mia kulpo ni malsukcesis. Se la afero devas estis perfekta, tia ĝi estos. Mi responsos.

Fakte, interne de mi laboris kelkaj personoj kiuj ne povis agadi interkonsente. La honesta homo kiu

estis mi ĝis tiam, submetita kun respekto al la ordo kaj la leĝo konvenciaj; la virtulo sendiskute akceptanta valorojn kiujn li ne povas precizigi, sed oni edukis lin per ili kaj li konsideras ilin dezirindaj; la knabo kiu unuafoje malkovras konkretan celon, bonaĵon akireblan nur pere de elprovo post kiu li atribuos sencon al la ekzisto; la justicon timanta civitano kiu deziras vivi sen problemoj; kaj laste, la ulo kiu spite al ĉiuj cirkonstancoj kiujn li eltenas, ne sentas sin komforte kun la speco de socio kie li devas vivi, sufiĉe inteligenta por rimarki ke li falis en kaptilon pretigitan jam antaŭ lia naskiĝo, kaj en kiu li mortos, kaptilo kiu kondamnas lin al mizero, al la ĉiutaga tedo, kiu baras lian horizonton per muregoj kaj ŝargas lin per multaj devoj kaj neniu rajto, tiel ke li restas ulo prirabita fare de cirkonstancoj al kiuj li ne kontribuis kaj kiuj neniomigas lin...

Ĉio kio min ĉirkaŭis, konspiris por transformi min en maltaŭgulon. Sed tion mi ankoraŭ ne akceptis, mi ne estis tion akceptonta ĝis la momento kiam la sinjorino Morell, la ĉefetaĝa najbarino, vokis min ĉar iu knabino volas paroli kun mi telefone. Nek eĉ en tiu momento, ĉar mi plu pensis ke mi agas kiel libera estaĵo kiu akceptas responson kaj ke interne de mi

estis bonmora homo kiu, inter kelkaj malbonoj, elektis la plej etan.

En tiu momento, ŝi kaj mi havis la saman celon. Ĉar ankaŭ mi estis monstro. Ni diris mallonge kelkajn vortojn:

– Xavier?...

– Jes.

– Ĉi-nokte.

Mi ne respondis.

– Ĉu vi aŭdas?

– Jes.

– Post la deka kaj duono.

– Jes.

– Bonan ŝancon.

Kaj ŝi kroĉis.

Mi ankoraŭ povis retropaŝi, se mi volis, kaj dum mi denove malsupren iris al nia reduto, kie la patrino kaj mi manĝis unu fronte al la alia, sed apartigitaj per muro, min trafis la lastaj frapoj de batalo kiu, antaŭ ol definitive finiĝi, disŝiris min je du duonoj.

Sed ie, ĉio estis decidita, jam de ĉiam. Pri tio mi sentis firman certecon.

Je la deka mi ekiris la vojon. Mi kunportis la tranĉilon, la lanternon, la gantojn, la rimensuojn. Antaŭ ol iri de mia hejmo mi forbruligis tiun skizon de la mapo, nun bone parkerigitan.

Unu tramo veturigis min ĝis la Placo de la Universitato, kaj alia ĝis la kvartalo de Les Corts. Mi forlasis la tramon ĉe la lasta haltejo kaj tra malhelaj stratoj mi lante malsupreniris. Mi volis atingi la lokon ne antaŭ la dekunua horo.

La domo estis fermita, sen lumo. Se li estis en la skribejo, konjekteble li fermis la fenestron. Finfine, la nokto ankoraŭ malvarmetis. La aliaj domoj ankaŭ ŝajnis senvivaj, neniuj estis ĉe la pordoj, ĉio ripozis en silento densa, streĉita. Miaj manoj tremis leĝere kaj mi devis enpoŝigi ilin.

Pasis kelkaj minutoj de la dekunua horo kiam mi haltis tre proksime al ŝtona muro kiu apartigis la domon de la strato. Juna ne indikis, kiu estas la plej oportuna parto por surgrimpi la muron, eble ĉar ĝi ne estis tre alta. Sed ĝi ja estis glata.

La strata lanterno plej proksima estis kvindek aŭ sesdek metrojn malproksima, kaj ĝi prilumis nur mallarĝan ĉirkaŭaĵon malplenan je gruzo. Inter ĝi kaj la domo estis arbo kiu tralasis pli da ombro ol lumo.

Aŭdiĝis malproksima bruo de pordo kaj poste ies paŝado, sed baldaŭ tio malaperis en la malproksimo. Dum unu momento mi ankoraŭ rigardis, streĉante la okulojn, la fundon de la strato. Kvazaŭ farinte dum la tuta vivo, aŭtomate mi surmetis la gantojn. Neniam mi uzis gantojn, eĉ en infanaĝo.

Rekte staranta kontraŭ la muro, mi tenis min ĉe heĝo per la fingro-pintoj, per la tuta mano, per la kubuto... Nun mi ne plu tremis. Kun lanta sed sekura paŝo, mi levis la korpon ĝis la ventro ripozis sur la slabo.

De tiu momento ĉio estis pli facila. La ĝardena gruzo leĝere kraketis kiam mi lasis min fali sur ĝin, instinkte kaŭriĝante por malgrandigi la korpan mason, ĝian videblecon. Sed interne ankoraŭ estis des pli senlume.

Mi plu iris tanĝe de la muro, esplorante la konstruaĵon, la fenestrojn, nur unu el kiuj ricevis iom da lumo el la strata lanterno. Mia fenestro estis la dua, ĉe la angulo de la domo. Ĝi ŝajnis tiom fermita kiaj

estis la ceteraj.

Kiam mi puŝis ĝin per gantita mano, ĝi retrocedis, kaj malantaŭ la malfermiĝanta klapo, malluma maso ne penetrebla frapis al mi la vizaĝon per sia besta varmo, per fetoro de ĉambro ne aerumita.

Interne regis simila silento kiel ekstere, pli peza, pli koncentrita. Mi pensis, ke ĉe la lasta momento li eble decidis akompani la du virinojn. El aliflanka ĉambro eskapis lumradio. Tuj poste, iu malŝtopis sian gorĝon, li tuisis.

Nun mia korpo rapidis kun terura agitiĝo. Ĝi eliris tra mia buŝo, min sufokis. Mi devis apogi min sur la fosto, venkante de freneza timo, cerba, kiun mi ne kapablis antaŭvidi. Mi ne kapablis antaŭvidi ion. Ĉar ĝis nun, ĝis tiu preciza sekundo, tiu proksima ago ne forlasis mian imagon por transformiĝi en aktualaĵon. Mi akceptis la planojn de Juna, mi okupiĝis pri la preparado kun plena konscio, mi eniris kaŝe la domon... Sed ĉio estis nur sonĝo. Kaj nun mi vekigis. Post kelkaj momentoj mi mortigos homon...

La ŝvito gutadis sur mia vizaĝo, ĝi najlis la ĉemizon al la haŭto, malsekigis la gantojn kiuj kaŭzis al mi neelteneblan varmon... Seĝo ŝoviĝis sur la mozaiko kaj post kelkaj sekundoj mi restarigis min,

kun la tranĉilo en la mano. Mi ne memoris, ke mi prenis ĝin.

Mi remetis ĝin en la poŝon. Neniu forlasis la skribejon, la viro eble plu sidis malantaŭ la tablo; mi aŭdis eĉ frotadon leĝeran: la onklo de Juna turnadis paĝojn.

Tiu singardemo, kurioze, kvietigis mian koron, malnodigis mian gorgon. Mi retroiris al la ĉambro, al la noktotablo. Kiel ŝi diris, la pistolo estis ene.

Mi devis proksimiĝi al la fenestro por ekzameni ĝin per la kompara lumo eniranta el la ekstero. Ĝi estis armilo nigra, el modelo Astra, pura, senriproĉa, strange peza. La ŝargilo estis plena kaj mi pasigis kuglon tiom silente kiom mi kapablis. Eĉ tiel, eta krako timigis min kaj devigis min stari senmova, denove atenta al ĉio kio okazis preter la koridoro, en la skribejo. Nenio aŭdiĝis.

Mia koro denove akceliĝis, sed mi devigis min avanci al la pordo, al la lumradioj kiuj permesis al mi vidi ruĝan plankon, al sojlo trans kiu li eble enmemiĝis kontemplantante poŝtmarkon, ĉar la silento estis absoluta.

Kaj tiam mi vidis lin. Li fakte sidis malantaŭ la tablo, tenis malgrandan lupeon per la mano kaj la tuta

korpo sin klinis sur la albumon malfalditan sur la tablo. Ne estis la unua fojo kiam mi ĉeestis tiun mutan scenon. Ŝi neniam priskribis al mi la ĉambron, mi neniam pensis pri tio, sed nun mi rekonis ĝin. Tio estis familiara. Kaj tia estis la viro: ulo kalva, kun lipharoj, volvita en piĵama ĵako bruna, tre diskreta, unuforma, modifita per nur du literoj, E. V., broditaj sur la poŝo kiu, sen tio, mi ne povus distingi.

Mi faris pluan paŝon, kaj li ankoraŭ ne moviĝis, turnita al malgranda paperpeco ortangula kiun li rigardis senlace; la kubuto apogita sur la tablo, la alia mano nevidebla, sube. Mi levis la armilon, pezan kia sidera korpo.

Sed mi ne pafis. Mi ne povis. La fingro ripozis kontraŭ la ellasilo, sed ne premante, kvazaŭ ĝi apartenus al aliula mano. Malvarma, humida fingroklako trakuris mian dorson. Sed io, nekontrolebla forto, devigis min avanci ankoraŭ plu.

Tiam li levis la kapon. Li verŝajne aŭdis la pezan spiradon kiu eskapis tra miaj dentoj, la frotadon de la ŝuoj. Aŭ li aŭdis nenion kaj la geston kaŭzis la fakto ke li jam sufiĉe kontemplis la poŝtmarkon. Ĉar liaj okuloj ne montris surpriziĝon aŭ rimarkon pri mia ĉeesto. Ne en la unua momento, almenaŭ.

Poste li malfermis la okulojn tiom larĝe kiom li povis, ne multe, ĉar ili estis malgrandaj kaj kavaj. Okuloj bluaj, palaj, kun kruela brilo, tiaj ke eĉ lian nunan esprimon surprizitan, teruritan, ili ne povis sufoki. La lupeo kiun li tenis falis sur la tablon kun surda bruo, kaj la seĝo frapis kontraŭ la malantaŭa muro kiam li reprenis la sidan pozicion, kun gapanta buŝo, preskaŭ krionta, aŭ parolonta... Mi ne scias, kion li intencis entrepreni, ĉar mi jam ĵetis min al la tablo kaj, sen neceso komandi ĝin, la fingro kontraŭigis sur la ellasilon.

La pistolo preskaŭ forglitis el miaj manoj. Eble tial mi ne pafis duafoje. Kaj ne necesis. Iom da sango elspruciĝis en la makulon nigran kiun la pulvo lasis sur la brusto de lia ĵako, la mano leviĝis dum la korpo, kvazaŭ la kolizio de fizika premo, retrocedis ĝis stumbli kontraŭ la seĝo. Sur ĝin li falis, la korpo glitis al unu flanko kaj post kelkaj momentoj li restis senmova, kun la kapo kaj la brakoj pendantaj.

Verŝajne mi restis dum kvin tutaj minutoj rigardante lin. Se homo estus aŭdinta la pafon, se la domo ne estus izolita, oni ankoraŭ povus kapti min ĉe la freŝa faro, stultigitan antaŭ la tablo, rigidan kia kadavro, ĉar mi pensas ke mi eĉ ne spiris. Kiam mi

faris la unuan spiron, tiam la aero krepitis kvazaŭ oni metus alumeton al gaso.

Li estis mortinta, eĉ ne necesis ia sperto por rimarki tion. Mortinta. Mi do faris... Kiam la pistolo falis sur la plankon, mi saltis ĝis la alia ekstremo de la ĉambro. Oni plendis ie. Ne, sed dormis. Tio estis ronkado. Ĝis poste mi ne komprenis ke temis pri mia spirado.

Mi apogis min sur la meblo plej proksima, speco de trinkuja ŝranko kontraŭ kiu mi stumblis pro la salto. La pordo, ne tute fermita, malfermiĝis ellasante akutan knaron kiu hirtigis al mi la harojn.

Miaj kruroj ŝanceliĝis, tiu unua tremado kiu surprizis min sur la strato nun reaperis; mi ne povis senmovigi miajn malsekajn manojn, kaj la frunton, kaj la vizaĝon.

Pene klopodante mi serĉis poŝtukon, sed la gantoj ĝenis min, fakte ĉiuj vestaĵoj ĝenis. Mi demetis la gantojn por forigi tiun densan sekreciaĵon kiu jam eliris malvarma tra la dilatiĝintaj poroj. La poŝtuko restis kvazaŭ post lavado.

La manoj kvietiĝadis, sed la kruroj ankoraŭ restis malprovizitaj je forto. Mi ne aŭdacis apartiĝi de la meblo. En ĝi estis multaj boteloj, unu da brando en

unua loko. Mi prenis ĉi tiun kaj verŝe trinkis du glutojn. Fajra lango promenis en mia interno, tio revigligis min, kaj la kruroj refortiĝis.

Ĝis poste mi ne konsciis ke mi povis lasi fingrospurojn sur la vitro de la botelo. Bonŝance mi pensis pri tio frue. Mi denove surmetis la gantojn kaj frotis la vitron unu kaj cent fojojn. Poste mi metis la botelon en ĝian lokon.

Mi reakiris la forton. Sed mi ankoraŭ ne finis. Nun mi devis alpreni iun valoraĵon, traserĉi la domon, alproksimigi la albumon, kiel interkonsentis Juna kaj mi. Mi rigardis la horloĝon. Ŝajnis al mi strange, sed ĝi montris ankoraŭ nur kelkajn minutojn post la dekunua kaj kvarono.

Alproksimiĝante al la tablo por preni la albumon, la pulvaj spuroj, videblaj spite al la sango kiu malsekigadis la bruston de la piĵama ĵako, devigis min halti. Mi pafis de pli proksime ol mi imagis, de multe pli proksime ol mi antaŭ proponis al mi. De tiom proksime “kvazaŭ mia brako estus lia brako. Kvazaŭ li sin mortigis...

“Kial ne ŝajnigi suicidon?”, mi demandis al mi.

Ĉu ne estus pli konvene? Unue, oni ne organizos enketadon, kaj tio vanuigos suspekton pri Juna... Mi

restis esplorante la kadavron. La seĝaj brakoj subtenis la korpon pendantan al la dekstra flanko; la mano maldekstra pendis inter la du apertaj kruroj, unu pli etendita ol la alia; la mano dekstra, trans la seĝa brako, preskaŭ tuŝis la plankon.

Ankaŭ la pistolo estis sur la planko, sed en tiu alia flanko de la tablo kie mi lasis ĝin fali. Nur necesis translokigi ĝin ĝuste sub lian manon, kvazaŭ ĝi estas forglitinta de ĝi...

Tion mi faris. Ŝajnis facila tasko sed por mi ne estis facile ĉar, kiam mi genuis por preni ĝin, tiam mia kapo turniĝis; mi preskaŭ falis. Sed mi superis tiun malfortecon kiu denove humidigis la manojn. La manoj... Estas vere. Mi preskaŭ forgesis gravegan detalon. Necesis ke sur la pistola kulaso restu tre klaraj liaj fingro-spuroj. Ili jam povis esti tie, sed eble ankaŭ aliulaj spuroj; mi ne scias ĉu Juna iam tuŝis la pistolon, aŭ la vidvino...

Mi frotis ĝin, metis ĝin en lian manon kaj refaldis liajn fingrojn en pozicion tiom normalan kiom mi kapablis. Mi ne povis manĝi tiun vesperon, sed io sin movis en mia stomako kiam mi tuŝis lian senvivan karnon, tiom molan kia la korpo de grunda vermo. Estis vomige.

Restariĝante, mi rimarkis ke mia buŝo estis tre seka, kaj mi sentis la tenton trinki iom plu da brando. Mi rezistis la soifon. Mi devis konservi la menson sobra ĉar mi ankoraŭ ne finis ĉion. Ĉar ne estas normale ke homo sin mortigas fronte al poŝtmarka albumo malfaldita, kun lupeo sur la tablo... Mi metis ĉion en la duan tirkeston de la dekstra flanko, kiu estis preskaŭ malplena.

“Kion plu?”. Mi rigardis mian ĉirkaŭaĵon por vidi ĉu mi forgesis ion. Ĉio ŝajnis en ordo, mi tuŝis nur la botelon. En la loko kien falis la pistolo ne videblis stranga signalo, la planko estis pura kaj glata, sen spuroj de ies ŝuoj...

Mi ĵetis lastan rigardon antaŭ ol foriri. La makulo sur la ĵako ankoraŭ disvastiĝis, sed ŝajne li ne plu sangis. Ĉio aspektis normala.

Post kelkaj momentoj mi denove saltis tra la fenestro kiun mi duonfermis malantaŭ mi, kaj mi kuris al la muro apud kiu mi haltis, aŭskultonte. Ie muĝadis motoro kaj mi atendis.

Kiam finfine mi elmetis mian kapon sur la heĝo, la strato estis tiom dezerta, tiom izolita, kia estis tri horkvaronojn antaŭe, kaj la najbaraj domoj desegniĝis mallumaj kaj fremdaj kontraŭ la nuboj-makulita ĉielo.

Mi preferis ne iri per tramo. Mi sekvis la itineron ĝis la strato Llúria, kie mi atendis la tramon 47.

Je la dekdua kaj tri kvaronoj mi jam estis denove en la hejmo. Mi senvestigis min en la mallumo, dum aŭskultante, preskaŭ ne aŭdante, la ronkojn de la patrino kiu verŝajne dormis en maltaŭga pozicio. Mi devus elteni tiun ronkadon dum la tuta nokto, ĉar mi supozis ke mi pasigos ĝin sendorme. Laŭ ĉio kion mi memoras, mi kredas ke post du minutoj mi jam endormiĝis.

La postan tagon mi forbruligis la ŝuojn kaj la gantojn. La procedo estis malfacila ĉar mi disponis nur pri gas-fajrujo, kaj mi devis priverŝi ilin per benzino.

Ĉe la tagmezo mi repaciĝis kun la patrino. Kiel kutime mi iris al laboro, sed iom malfrue ĉar mi devis atendi ke ŝi foriru por komenci miajn komplikajn manovrojn, sed la mateno estis koŝmaro. La ĵurnaloj anoncis nenion, estis frue ankoraŭ, sed tio malkvietigis min. Mi provis matenmanĝi, sed sensukcese kaj mi sentis min malforta, konsumita. Matenmeze mi provis trinki iom da kafo kun lakto sed la stomako ne akceptis kaj mi devis hasti al la necesejoj de la kafejo, kie mi vomis.

Estis rezervitaj ses intervjuoj, sed mi povis ĉeesti nur tri el ili, kaj nun mi ankoraŭ demandas al mi, kion povas pensi tiuj informantoj pri homo kiu ne kapablas elbuŝigi vortojn kaj restas silente meze de la frazo, kaj poste adiaŭis preskaŭ malĝentile, kvazaŭ subite por li jam estus sufiĉe. Kaj la fakto estas ke por mi jam estis sufiĉe.

Komence tio estis infero, sed nun tio ŝajnis des pli terura. Ĉar nun mi alfrontis ne renverseblan fakton. Dum la tuta tago mi ne kapablis pensi pri Juna. Mi vidis nur lin. La bruskan geston kun kiu li stariĝis kaj la knaron harstarigan de la seĝo kiu retrocedis ĝis la malantaŭa muro. La okulojn gapantaj senutile, kun terura surpriziĝo kiu haltigis lian spiradon. Kaj min klinanta antaŭen por ne erarigi la pafon, kaj mi de ege proksime pafis al la brusto... Poste, la makulon, la sangon kiu ĉion trempis, tiujn fingrojn malmolajn kiujn mi devis premigi kontraŭ la kulason ...

Energie mi skuis la kapon, sed la vizio daŭris tie, fiksita al miaj okuloj. Kvazaŭ maniulo, multajn fojojn mi imagis la bildon de la sceno, mi renovigis la

murdon, sen sukceso forgesi tiun duonhoron kiu postlasos por ĉiam signon en mia vivo, ne povante rememori la ekzaktan kaj ĝustan bildon de Juna, al kiu mi volis turni min kvazaŭ ĝi estus fetiĉo. Min glaciigis la malkapablo retrovi ŝiajn trajtojn, memori unu geston aŭ momenton de niaj intimaĵoj kiu povus forigi la fantomojn kiuj min persekutis. Estis kvazaŭ mi perdis ŝin.

Mi ne retrovis ŝin denove ĝis la vespero, kiam sub la patrina rigardo mi ekploris. Unue ni sidis ĉiu en sia flanko de la tablo, fremdaj kiel dum ĉiuj ĉi tagoj, kaj mi provis engluti manĝaĵojn kiujn mia korpo rifuzis, trinki glason da vino kiu gustis kiel vinagro. Gesto senpacienca al mi mem igis min disverŝi ĝin sur la kaŭĉuka tuko, sur kiu ĝi disfluis, malhela kaj ruĝa kia la sango kiu ŝpruciĝis el la brusto de la onklo de Juna. Mi fermis la okulojn, kovris ilin per la mano, kaj dum mi malfermis ilin, mia rigardo renkontiĝis kun la ŝia. Ŝi diris nenion, ŝi ne plendis pri mia gesto mallerta, ŝi sidis silente kun la brakoj apogitaj sur la tablo. Kaj ŝiaj okuloj rigardis kiel angorplena besto.

– Patrino... –mi diris ne planinte.

Mia voĉo rompiĝis, la okuloj brulis al mi kaj momenton poste mi alkroĉiĝis al ŝia mano kiu estis

avancinta kaj, kun la frunto kontraŭ la tablo, mi ploris.

– Xavier... Filo... Ĉu temas pri knabino?

Nenion alian ŝi povis demandi, pri tio ŝi jam pensis antaŭe, kaj mi jesis sen eĉ movo de la kapo. Finfine, mi mensogis nur duone.

Ŝi ne petis konfidencojn, ŝi ne faris multajn demandojn. Ŝi ĉiam estis diskreta, sed ĝis nun mi ne dankis tion. Ĉar mi ne povis rakonti al ŝi la aferon, mi ne povis elmeti min al tio, ke ŝia rigardo malmildiĝu aŭ, des pli malbone, vidi en ĝi spegulita timon, timon similan, eĉ pli bestan, ol tiun kiun mi malkovris pli ol kvar fojojn infanaĝe kiam semajnfine ne plu restis mono al ŝi kaj mi depostulis manĝon, manĝon... La malsato persekutis nin, kaj la mono kiun ni devis kunigi por pagi la luprezon de la ĉambro se ni ne volis troviĝi sur la stato, pro mizero sen paliativoj kaj kiun ni ne venkis ĝis mi aĝis dektri jarojn, kaj ŝi povis min meti en postenon de grumo en la oficejo kie ŝi purigis. Tio estis mia unua laboro stabila.

– Ĉu mi ne konas ŝin? – ŝi diris.

Mi neis per la kapo dum, honte, per la mandorso mi sekigis miajn vangojn je larmoj.

– Ne –mi konfirmis poste–. Ŝi estas knabino el

bona familio.

Ŝi atendis rigardante min. La esprimo de ŝiaj okuloj iomete ŝanĝiĝis. Mi legis ŝian penson kvazaŭ skribitan sur ŝia frunto.

– Ne... –mi respondis–. Ni amas nin. Sed ŝi devis foriri, ŝi estas ekster la urbo.

– Ĉu vi volas geedziĝi?

– Jes, poste.

– Kaj ĉe ŝi?

Mi ŝultrumis.

– Mi ne scias... pri tio.

– La riĉuloj... –ŝi komencis.

Sed mi sentis min malpura pro la devo mistifiki al ŝi ĉi tiel, ĉar ŝi kredis ion kio ne akordis kun la realo. Mi stariĝis sciante, ke mi klarigis nenion, ke nenio kion mi rakontis pravigas mian konduton, mian sintenon de tiuj tagoj. Sed por ŝi tio ne gravis; ŝi vidis nur tion kio al ŝi konvenis: la minacon. Ŝi sopiris:

– Se ŝi estas bona knabino...

Ĝis la momento Juna devigis min nur mortigi homon. Sed nun mi povos denove vidi ŝin. La plorado, tiuj mallongaj momentoj revenigis ŝin al mia

memoro; belan, dezirindan kia ŝi estis ĉiam. Kaj nun, mian. La onklo, la viktimo, tiu viro pli ĝuste malalta kiu nun estis verŝajne kuŝanta sur la lito, inter kvar kandeloj, ankoraŭ reprenis la sidan pozicion, falis kaj sagnis en iu parto de mia retino, sed ŝi estis en unua loko, ridetis al mi per siaj karnozaj lipoj kiuj ĉiutage ŝanĝiĝis je farbo, memorigis min pri la parfumo kaj varmeco de ŝia korpo kiun mi senvestigis unu semajnon antaŭe en tiu sama ĉambro, kaj la okuloj malhelaj kaj profundaj havis la saman rigardon perturbitan per kiu ŝi min rigardis antaŭ ol ĵeti sin al mia kolo por kisi per buŝo humida kaj vundita de la sama anksio kiu min forkosnumis...

– Sidiĝu –diris la patrino–. Vi devas manĝi.

Mi obeis.

La novaĵo aperis en la vesperaj ĵurnaloj. Estis mallonga raporto dudek liniojn ampleksa, enmetita inter la aliaj diversaj okazintaĵoj ĵusaj: veturakcidento, ordinaraj krimuloj arestitaj, malgranda incendio... Tio preskaŭ elrevigis min.

La sinjorino Caterina Freixa kaj ŝia nepino Justina Mils, je la unua kaj duono nokte, reveninte de teatra premiero kiun ili ĉeestis, trovis la edzon de la unua, la kolonelon Enric Virós, mallantaŭ la skribeja tablo de

la domo en kiu ili loĝis en la kvartalo Les Corts. La polico, alvokite, sin turnis tuj al la loko kaj oni translokis la kadavron al Hospital Clínic kie oni devas fari la nekropsion kiun postulis la cirkonstancoj de lia morto, pro pafo de pistolo trovita ĉe la atingo-kapablo de lia mano. La polico komencis la enketadon.

Pli-malpli, la raporto diris tion. Eĉ ne unu vorton pri sinmortigo, sed tio estas atendebla kaj, krome, legante inter linioj oni povas kompreni la aludon. Tiu frazo pri la pistolo trovita ĉe la atingo-kapablo de lia mano, estis sufiĉa.

La ĵurnaloj de la posta mateno redonis la novaĵon preskaŭ laŭvorte kaj, sub la rubriko de nekrologoj, estis noto pri la forpasinto, eta gravulo en lia mondo, ĉar jarojn antaŭe li okupis aŭtoritatan lokon kaj nun li estis prezidanto de bonfarada konsilio, detalo kiu surprizis min ĉar ĝi ne tute kongruis kun tio kion Juna diris al mi pri lia mizerkoreco. Verŝajne ŝi ŝveligis malgrandan trajton...

Estis alia detalo kiu altiris mian atenton kaj, dum momento, igis mian koron batadi pli leĝere, kion Juna devis koni kaj kontraŭdiris tiun viklecon kiu ĉe liaj kvindek sep jaroj estus permesinte lin vivi dekkvin aŭ dudek jarojn plu. Laŭ la aŭtoro de la noto, la kolonelo

Virós de longa tempo suferis pro kora malsano.

Aŭ verŝajne jes, mi poste pensis, ke tion malkonis eĉ lia edzino. Estas malsanuloj kiuj ne emas konfidi al la familio, ĉefe kiam ili plenumis la malprudentaĵon edziĝi kun virinoj relative junaj, kia estis la edzino de la viktimo. Kiel ajn, tiu malsaneco ne maltaŭgis al mi, ĝi pravigis aŭ almenaŭ klarigis ĝis ioma grado la sinmortigon. Mi povis trankviliĝi: mi ne eraris.

Estas vere ke antaŭ ol sin mortigi oni kutimas lasi noton por siaj homoj, por la advokato se ili havas propran, por la polico, kaj li ne povis skribi noton. Pri tio mi jam pensis antaŭe. Sed tio ne estis grava problemo. Tio ne estis nepra detalo. En la domo eble ne estis trovitaj spuroj de fremdaj homoj; necesas kredi ke Juna komprenis tuj la situacion kaj ke ŝi agis konsekvence fermante la fenestron. Se la polico dubis pri la sinmortigo, la suspekto povas fali sur du homojn nure: la knabino kaj ŝia onklino. Kaj ambaŭ estis en la teatro, kie verŝajne Juna zorgis ke multaj homoj vidu ŝin. Jes, mi povis estis trankvila. Ni faris tion kion ni celis, kion la profesiuloj neniam sukcesas fari: krimon perfektan.

Pri tio oni ne plu parolis. Tio estas, en la ĵurnaloj la temo ne plu estis pritraktita, ĉar la postan sabaton

mi vidis, ke du semajnaj gazetoj kiuj dediĉis la tutan kajeron al ekspluatado de diversaj aferoj, referencis al la temo. Kaj ne mallonge. Pri tio mi ne pensis. Mi ne kutimis aĉeti tiajn gazetojn kaj, fakte, mi trafis ilin pro pura hazardo iun matenon kiam mi atendis la buson apud gazeta budo kie estis elmontritaj la du ĉi-rilataj gazetoj. Sur la unua paĝo estis bildo kun virino kiu pro ĵaluzo mortigis la kromvirinon de sia edzo kaj, apude, du titoloj rilatis al tekstoj en la internaj paĝoj. La dua titolo aludis pri la morto de la kolonelo Virós.

Mi aĉetis la gazeton. La alian mi aĉetis la sekvontan tagon. En ambaŭ estis bildo pri la domo kaj portreto pri la forpasinto. La dua, aldone, verŝajne komisiis unu el siaj raportistoj al la enterigo, ĉar la tria bildo montris aron da homoj kuniĝintaj proksime al la ĉerko, ĉe la piedo de enmura tombaro. La foto estis nebula, eble pro la papero, sed oni povis distingi tie la vizaĝon de tri virinoj, unu estis Juna. Unu el la aliaj povis esti la edzino. La piednota teksto diris nur tion: “La familianoj.”

La artikolo estis iom mallerta, kaj ĝi evidentigis ke la ĵurnalisto vere penis por elpremi la sukcon de tiu afero kaj plenigi la tutan paĝon. La artikolo de la alia publikaĵo alfrontis la samajn malfacilaĵojn, kaj ĉiuj

solvis ilin per detala priskribado, preskaŭ elĉerpa, pri la skribejo kie oni trovis la malvivan korpon, pri la nekropsio, kiu distingis penetron kun elira truo inter la kvina kaj la sesa vertebroj. La morto, diris la ĵurnalisto, probable alvenis tuje, kaj la kuglo trapasis la dekstran ventriklon. Ĉiuj artikolistoj, sen eksplicita diro, ŝajne akceptis kiel fakton ke ĉiu sciis ke temis pri sinmortigo. La policon oni menciis nur en rilato kun la malkovro de la kadavro kaj la sekva enketado.

Mi ne cedis al la malsana tento konservi la artikolojn aŭ la antaŭajn notojn en la ĵurnalo. Mi ne volis memori tiun epizodon. Tute male, mi sentis pli firma la certecon ke mi ne devas timi pri la justico, mi volis forgesi ĉion plej baldaŭ. Eble mi jam komencis forgesi. La homo havas restariĝo-kapablon mirindan, kaj samtempe teruran.

Denove mi povis dormi trankvile, nur en du okazoj miaj sonĝoj estis sufiĉe profundaj kaj halucinaj por vekiĝi. La sanga makulo disvastiĝinta de la ĵako pli kaj pli paliĝis, la seĝo violente ĵetita kontraŭ la muron ne knaris tiom laŭte, la viro malantaŭ la tablo faris gestojn proprajn al pupo.

Dum la kurado de la postaj monatoj, mi surpriziĝis pli ol kvar fojojn pensante ke tio suferigas

min. Ne estis normale. Mi diris al mi, ke ne estas normale. Eble en la fundo, sen propra konscio, mi havis murdistan koron. Kaj ĉiuj ĉi unuaj perturboj eble estis nur io simila al la akuŝaj doloroj: ankaŭ la murdistoj verŝajne ne naskiĝas facile.

Super ĉio, mi precipe pensis pri Juna.

Mi atendis ĝis la kvina horo. Ĉe komenco de la semajno mi konsultis la horartabelon de la kinejo Infanta kaj sabaton, ĝuste ses monatojn post la morto de ŝia onklo, je la tria kaj kvarono mi jam estis sur la strato de Sarrià. La filmo estis komenciĝonta je la tria kaj duono. Mi atendis ekstere ĝis la halo iome pleniĝis, kaj tiam mi eniris. Oni ankoraŭ ne vendis biletojn; malantaŭ la ĝîceto estis neniuj, sed la vico jam organiziĝis kaj ĝin konsistigis pli ol dudek homoj. Juna ne ĉeestis.

Kvin minutojn poste, kiam en la vico jam estis pli ol tridek homoj kaj la ĝîcetisto estis en sia reduto, mi komencis ĉagreniĝi. Evidente ke ankoraŭ estis frue, ke restis tempo, sed ni interkonsentis ke ni ĉeestu la unuan prezentadon de la filmo, kaj ĝi jam estis preskaŭ komencata.

Denove mi reiris sur la straton kaj mi restis ĉe la pordoj kiuj nebule spegulis mian silueton, mian vizaĝon freŝe razitan, la nigran kravaton... Naŭ tagojn antaŭe oni enterigis mian patrinon.

Oni trovis ŝin mortinta en lavejo de unu el la

domoj kie ŝi laboris. Ŝi falis antaŭen kaj restis pendante de la slabo por la sapo, kun la manoj tenantaj vestaĵon kiun ŝi retiris aŭ volis meti en la akvon. La medicinisto konfirmis ke temis pri cerba embolozo. Oni klarigis: eta sanga vaskulo, malgrava dukto, krevis.

Post la fraŭdo pri la loĝejo, mi pensis ke al ni restis neniom da mono, sed tri tagojn post ŝia forpaso inter ŝiaj posedaĵoj mi trovis ŝparlibreton kaj mi vidis ke tiu ideo estis erara. Per unu aŭ alia maniero, formike ŝi sukcesis kunigi preskaŭ kvinmil pesetojn. Ili utilis por la enterigo. Tio estas, por repagi al Sorribes, kiu kondukis malavare kaj pruntedonis al mi la monon kiun mi petis por la enterigo.

Kiam mi pensis pri ŝi, ankoraŭ humidiĝas miaj okuloj, sed aliflanke mi pensis ke estas pli bone ke ŝi mortis. Inter ŝi kaj Juna ne povus esti harmonio. Laŭ neniuj trajtoj ili similis, unu estis la malo de la alia. Kaj, krome, eĉ se Juna posedus aliajn kvalitojn, ŝi estis tro bela por ne fari ombbron al ajna virino. Eĉ al patrino.

Sed nun ne necesas pensi pri tiu problemo. Mi eĉ ne povus. Interne la lumoj jam estis malŝaltitaj, en la halo restis neniuj. Ŝajnis al mi ke se mi restos eĉ la pordo mi altiros ĉies atenton. Mi do eliris. En tiu

momento mi ne sciis ke la postan tagon mi faros ĝuste la samon. Ĉar dum la nokto mi supozis ke multaj aferoj povas esti la kaŭzo. Eble ŝi eraris pri la dato, aŭ povus reteni ŝin neeskapebla devo, verŝajne la amikino ne povis veni pro cirkonstancoj, pro malsano... Iuj problemoj estis pli malfacilaj ol aliaj, sed estis nediskuteble ke pro iu motivo aŭ alia ŝi ne ĉeestis la rendevuon.

Tial mi denove turnis min al la kinejo la sekvan tagon, kaj la trian, kaj la kvaran. Mi reiris dum dek tagoj sinsekve, laste sen ia espero. Mi ne komprenis. La nervoj ne eltenis min, kaj denove mi dormis malbone. Grava afero nepre okazis. Tamen kio? Problemo kiu ĝis nun ne permesis kontakti min. Mi ja sciis ke ŝi ne povis venigi homon al la kineja halo, ĉar tiel nia konfido dependus de tria homo, sed anstataŭe ŝi povus voki min per la telefono de la ĉefetaĝo. Unu simpla telefonvoko, same kiel ŝi faris en tiu nokto, ne povas multe endanĝerigi nin. Ŝi povis voki el publika telefono por pli da sekureco. Ŝi ne faris tion. Ŝi ne faris ion. Mi do devis serĉi ŝin.

La unua paŝo estis telefoni al la domo. La telefonlibro montris la numeron, ankoraŭ nome de la kolonelo

Virós, kompreneble. La du unuajn vokojn neniu respondis, malgraŭ ke estis en la tagmanĝa tempo, sed vespere mi estis pli bonŝanca. Virina voĉo, agrabla sed iom dampita, diris:

– Ha lo?

Mi supozis ke ŝi estas la onklino. Neniam mi esperis ke ŝi mem respondu, ĉar ŝia silento, pro ajna kialo povis indiki nur tion, ke ŝi estas en la vilaĝo. Mi sciis ankaŭ ke kun tiu decido sekvi propran iniciaton mi iome elmetis min kaj rompis la regulon pri prudento kiun ni interkonsentis. Sed temis pri kazo de supera forto.

– Kun fraŭlino Juna? –mi demandis.

– Ĉu Juna? Verŝajne vi klavis misan numeron.

Mi rigardis la numeron sur kiu mi skribis la ciferojn, diris la ciferojn al ŝi kaj aldonis:

– Ĉu tio ne estas la domo de sinjoro Virós?

– Jes. Li antaŭe loĝis ĉi tie.

Tio konfuzigis min. Mi flustris:

– Ĉu vi ne estas membro de la familio?

– Ne. Lia tuta familio foriris.

– Tiam bonvolu pardoni min.

– Ne gravas –ŝi diris. Ŝi ŝajnis afabla virino.

Mi estus devinta fari al ŝi pli da demandoj, sed mi ne elpensis ilin ĝis poste, kiam mi rekuperis min de la surprizo scii ke la domon okupas novaj loĝantoj. La maniero rakonti de mia kunparolantino montris sufiĉe klare ke ŝi ne konas la familion, sed tio ne signifis ke ŝi ne povas doni utilan datumon por retrovi Juna aŭ, almenaŭ, ŝian onklinon.

Mi sentis la tenton voki denove, sed poste mi pensis ke estus preferinde prezenti min persone en la domon. Estas aferoj pri kiuj estas malkomforte paroli telefone. Interŝanĝo de scioj frontalfronte permesas insisti sur temo, kaj faciligas ke en nedifinita momento aperu indika detalo.

Estas klare ke tio des pli elmetis min. Ĝis nun mi estis nur voĉo kiu demandis pri Juna, voĉo anonima kaj modifita pro la telefono. Se mi vizitos la domon mia anonimeco vanuiĝos eĉ se mi ne rivelas mian nomon. La virino, aŭ kiu ajn ricevos min, vidos min kaj povos disponigi priskribon pri mi...

Sed tio ne multe malkvietigis min. Pasis jam ses longaj monatoj, la teorio pri la sinmortigo estis oficiale akceptita, kion montris la artikoloj kiujn mi legis kaj ankoraŭ memoris. Ĉiuj ĉi singardaj rimedoj

kiujn Juna kaj mi interkonsentis estis tre taŭgaj, ĉar multa prudento neniam estas troa, kaj ni ankoraŭ tenu ilin eĉ kiam la afero iĝis tiom neatendite favora, sed ne necesas ekstremigi. Nun, post tiom da tempo, mi estos nur knabo serĉanta knabinon, kun kiu li havis rilaton en antaŭa epoko, kun kiu li povus ŝajnigi rilaton nure socian.

Mi do alprenis rezolutan decidon.

La virino kiu malfermis al mi la pordon la postan tagon vespere estis la sama kiu respondis mian telefonvokon. Mi tuj rekonis ŝian voĉon. Ŝi estis virino verŝajne kun 40 aŭ 42 jaroj, kun tre grizaj haroj, ne ŝminkita kaj kun naturaj lipoj. La bildo de la perfekta dommastrino, de la patrino. Sed neniu infano aperis.

Mi komencis dirante ke mi estas la homo kiu telefonis la antaŭan vesperon. Ŝi restis mirigita.

– Mi jam rakontis...

– Jes, mi ja scias, sed poste mi pensis ke la familio Virós povis postlasi adreson aŭ indiki iumaniere, kien ili transloĝiĝas. Oni kutimas fari tion.

– Vere, sed ni ne konatiĝis kun ili. Ni luprenis tiun

domon antaŭ unu monato kaj la familio Virós jam de longe estas for, laŭ nia scio. Ni eĉ ne sciis, kiel ili sin nomis, pro la telefono kaj ĉar la najbaroj rakontis al ni... Vi ja scias ke la sinjoro Virós sin mortigis, ĉu ne?

Mi jesis per la kapo, kaj ne faris komenton.

– La ludonanto kaŝis tiun detalon al ni, kaj mi pensas ke mi ne estus preninta la domon, se mi sciis... Mia edzo diras, ke ĉio ĉi estas ridinda, sed mi ne sentas min komforte kun tio... Imagu ke la mebloj estas la samaj!

– Ĉu oni ne forportis kun si la meblojn?

– La mebloj ne estis iliaj. Oni luprenas la domon kun la mebloj. Aŭ tion diras la administranto. Ĉar ni petis al li klarigon. Oni devas tion diri.

Ŝi estis virino babilema kaj afabla kiu finfine igis min eniri la vestiblon, kie dudek minutojn poste nin renkontis la edzo reveninte de la oficejo aŭ de ie ajn. En tiu momento mi jam konis ilian devenon, la lurenton, la mankon de gefiloj... Sed nenion mi malkovris kun iom da utilo. Eĉ ne de la edzo, ankaŭ tre societema.

– Ŝajnas ke sinjoro Virós estis iom stranga –li diris–. Eble tia lin faris la edzino, ĉar onidire ŝi estis

iomete... frivola. Vi ja komprenas. Klare ke tio estas klaĉoj de najbaroj, vi povas koni tion pli bone, se vi rilatis kun ili.

– Mi rilatis kun la nevino.

– Jes, ŝajnas ke ĉi tie loĝis nevino kun ili. Dum epokoj, mi kredas.

– Tamen ili ne estis multe konataj –tiam aldonis la edzino–. Ili ankoraŭ ne loĝis ĉi tie dum tuta jaro.

– Sed kio vin interesas? –li demandis–. Ĉu trovi la nevinon?

– Mi plenumis komision por ŝi –mi diris svage–. Mi pasigis sezonon fore kaj...

– Vi povas paroli kun la administranto...

Tion mi jam pensis kiam mi parolis kun la virino, kaj mi nur aprobis:

– Bona ideo. Se vi estas tiom ĝentilaj faciligi al mi la adreson...

Ĝi efektive estis bona ideo.

Mi vizitis lin la postan tagon, ĝuste je la unua horo.

Liaj negocoj verŝajne ne sukcesis multe, ĉar la oficejo ne aspektis en bona stato. Du ĉambroj en la

strato Junqueres: en la unua estis knabino tajpanta per maŝino Underwood de la jaro 1920, kaj la dua de grandega korpo de viro kiu sin verŝis sur tablon plenan de inkaj makuloj kaj pura je paperoj. La mato sub liaj piedoj disfadeniĝis kaj la du foteloj el malhela ledopovus kaŭzi furoron en bazaro de brokantaĵoj.

La knabino ordonis ke mi eniru, ne petinte mian nomon, ne anoncinte min. La viro min rigardis sen surpriziĝo.

– Ĉu vi estas la sinjoro Ferrús?

– La sama.

– Mi venas de la domo en Les Corts, kiun vi administras, kie loĝis la sinjoro Virós.

– Jes. Li ne plu loĝas tie –li diris tute sennecese.

– Tial mi vizitis vin.

Per la mano li signis unu el la foteloj, sed mi elektis la alian, kiu aspektis pli sekura. Sed ĝi tute ne estis tia, ĉar la risortoj tuŝis la plankon kiam mi sidiĝis.

– Ĉu okazas io?

– Ne. Mi estas amiko de la familio, pli ĝuste de la nevino de la sinjoro Virós. Mi pasigis sezonon fore – mi insistis per la sama rakonto kiun mi donis al la

nunaj luantoj—, ĉar mi devis plenumi komision por ŝi kaj nun, reveninte, mi trovis ke ili ne plu loĝas en la sama domo.

– Certe ne, ili foriris. Mallonge post la morto de la kolonelo. Eble vi jam scias, ke li sin mortigis.

– Tio estis la unua detalo kiun oni malkovris al mi.

Li ridetis modere, apartigante ĉi tiel la faskon da graso kiu preskaŭ englutis lian nazon.

– Ili plendas pri tio, mi ja scias... Dum kvar monatoj neniu prenis la domon, kaj kredu ke mi malaltigis la prezon. La homoj imagas multe kaj kredas... –li ŝultrumis, ne fininte la frazon—. Sed kion vi serĉis ekzakte?

– Mi pensis ke ili eble postlasis la novan adreson.

– Ne. Ili ne lasis ion. La edzino... la vidvino... alportis la ŝlosilon kaj diris ke ili foriras. Mi ne scias ion pli. Pli bone ĉe la najbaroj...

– Ili loĝis mallonge tie, verŝajne ili ne havis tempon sufiĉan por teksu amikecon... Eble malnova adreso povus utili. Se vi ankoraŭ konservas la lukontrakton...

– Jes, efektive. En la arkivo.

Li stariĝis kaj iris pigre al la alia ĉambro. Sur la vojo li denove pripensis kaj ŝanĝis la intencon ĉar, bone konsiderinte, li dungis sekretariinon kiu ja povas sin malpurigi per polvo, ĉar atinginte la pordon, li diris:

– Tònia, ĉu vi memoras la eksvalidajn kontraktojn de la domo en Les Corts? Portu tiun de la sinjoro Virós.

Ekstere la tajpado ĉesis kaj li reiris al sia tablo, malantaŭ kiu li enmetis sian mason.

– Ili estis senriproĉaj loĝantoj –li komentis–. Ili neniam venis plendi pri malgrava afero... Ili lasis sin perdi unu monaton, ĉar la kontrakto estis por loĝi unu jaron, kaj restis monato pagita. Mi supozas ke la virino volis reiri kun la familio.

– Ĉu ili ne estis el Barcelono?

– Mi ne scias. Ni vidos, kion diras la kontrakto.

Sed la kontrakto, kiam ĝin portis la sekretariino, utilis tre malmulte. Ĝi enhavis personajn datumojn de la forpasinta Virós: naskita en Almecelles, kiel mi rimarkis, kaj antaŭe li loĝis en Tarragona, sen ia preciza indiko pri adreso. La viro etendigis ĝin al mi kun plena konfido.

– Vidu mem.

– Evidente, ĝi ne utilis.

– Ĉu estis gravaj la elspezoj, tiuj komisioj kiujn vi menciis?

– Jes. Tial mi volas lokalizi la familion.

– Verŝajne ŝi skribos al vi, tiu knabino.

– Verŝajne. Ni esperu.

Kun peno mi levis min el tiu fotelo kaj ĝis tiam ne venis al mia kapo alia spuro, ĉar la viro estis simpatia.

– Ĉu vi memoras, kiel ili pagis la renton? Ĉu per kontanta mono? Aŭ per ĉeko?

Lia vizaĝo tuj ekbrilis. Oni povus diri ke la okazo helpi min faris lin feliĉa.

– Ho jes! Per ĉeko. Kaj mi memoras la bankon, ĉar ankaŭ mi estas kliento de tiu banko. La Banko de Bilbao. Sed mi, en via loko ne konfidus troe pri tio –li aldonis–. Kiel ĉiu scias, la banko ĉiam protektas la klienton. Des pli, se oni scias ke li ŝuldas al vi!

Li ridis bonhumore. Mi respondis:

– Provi ne kostas iom.

Kaj li pravis. Mi parolis kun la estro de kurantaj kontoj, viro kun rafinita afableco. Nur ke, kiel li

klarigis, li ne estas rajtigita doni datumojn pri klientoj.
Li multege bedaŭris. Mi komprenis... Ĉio kio rilatas
al klientoj estis konfidenca.

Je la dua mi estis denove sur la trotuaro de la
Placo de Katalunio, ne avancinte eĉ unu paŝon.

La morgaŭon mi komencis la senesperan enketadon inter la domoj de la kvartalo. Kvin minutojn poste konfirmiĝis al mi ke la familio Virós salutis ĉiujn najbarojn sed de malproksime.

– Arogantaj homoj –diris virino al mi.

En la plej proksima vendejo, kie mi ankaŭ demandis, la mastro manifestis al mi:

– Ili neniam venis ĉi tien por aĉetado, ili iras al la placo ĉar ili kredis ke tie ili ricevos pli bonan servon. En okazoj, se ili forgesis ion, tiam ili ordonis al Pauleta ke ŝi iru, la virino kiu laboris ĉe ili.

– Ĉu ŝi loĝas proksime?

– Jes, ĉe la unua stratangulo, turnu vin tien. En tiu direkto estas kelkaj domoj. Mi kredas ke en la dua.

Estis la tria, sed mi trovis ĝin facile. Ĉiu konis ŝin. Sed Pauleta ne estis hejme kaj mi devis atendi ĝis la oka kaj duono.

Ŝi estis maldika virino, kun pli ol kvindek jaroj, kun manoj moligitaj pro akvoj kaj detergantoj. Unue ŝi sin montris senkonfida:

– Ĉu vi ne estas policano?

– Klare ke ne. Ĉu mi aspektas kiel ili?

– Oni neniam povas certi –ŝi grumblis–. Ili jam sufiĉe ĝenis min tiam. Dufoje ili venis viziti min.

Mia koro akceliĝis iom kaj mia voĉo akutiĝis demandante:

– Kial? Kion ili serĉis?

– Ili neniam diras, kion ili volas. Ili nur demandas... Kiaj rilatoj estis inter la sinjoro kaj la sinjorino, ĉu ili kverelis, ĉu iam la sinjoro diris ion pri siaj intencoj... Ĉu li devus rakonti al mi?! Ni neniam interŝanĝis pli ol dekdu vortoj; kiam mi iris, tiam li ne ĉeestis. Kaj se li ĉeestis, li ĉiam silentis. Mi ne iris demandi al li...

Ŝi nervoziĝis pli kaj pli, kaj mi provis trankviligi ŝin:

– Mi ne volas fari tiajn demandojn. Mi konis nek lin nek lian edzinon.

– Kion do vi deziras?

– Mi konis Juna, la nevinon.

– Ŝi ne loĝis tie.

– Lastatempe, jes.

– Dum epoko.

– Jes. Tiam mi konis ŝin kaj, ĉar mi devis vojaĝi eksterlanden, ŝi komisiis al mi mendon. Kaj nun reveninte...

– Kian mendon? –ŝi demandis impertinente.

– Aĉeti ion. Produktojn kiuj ĉi tie ne troveblas, aŭ estas tre malĉipaj.

– Mi vetus ke ŝi volis parfumojn –ŝi komentis.

Mi faris komplican rigardon.

– Jes, ankaŭ parfumojn.

– Kaj nun vi ne scias, kie trovi ŝin...

– Ne, se vi ne diras, kien ili iris.

– Kial mi?

Ŝi estis malfacile mastrebla oldulino.

– Ĉar vi laboris kun ili, verŝajne ili diris...

– Nenion ili diris.

– Ĉu ili ne proponis ke vi plu laboru ĉe ili?

– Ili scias, ke mi ne iras malproksimen. Mi ne perdas la tempon vojaĝante tien kaj reen, kaj mi ne volas pagi por la tramo.

– Ili do iris malproksimen?

– Supozeble jes. Mi scias nur, ke ili luprenis apartamenton.

– Proksimume kie? –mi insistis.

Ŝi svingis la kapon, nur malicete, preskaŭ humure.

– Vi estas tre demandema.

– Ĉu vi ne farus simile en mia loko? –mi rediris.

Ŝi pripensis, kaj eble konsideris ke mi pravis, ĉar finfine ŝi mildigis sian tonon.

– Mi supozas. Sed mi certigas vin, ke mi scias nenion. Ili estis tre ĝentilaj, vere, eĉ afablaj al mi... Fraŭlino Pauleta, tion; fraŭlino Pauleta, alion...

– Mi vidas... –mi pensis ion kaj mi demandis pri tio—. Ĉu ili ricevis poŝtaĵojn?

– Jes, de tempo al tempo. Kial? –sed ŝi mem malkovris—. Vi pensas ke la poŝtisto povas...

– Jes. Je kiomaj horoj venas la poŝtisto en tiu kvartalo?

– Malfrue en la mateno. Inter la dekdua kaj la unua. Vi neniam forgesas ion, ĉu?

Tion mi klopodis.

Mi devis atendi la poŝtiston ĝis la dua horo. Verŝajne

lin retenis tasko, aŭ la fraŭlino Pauleta havis relativan ideon pri horoj, sed kiam la viro definitive aperis ĉe stratangulo, kun la sako preskaŭ malplena, li estis proksime al la laborfino de tiu tago.

Li estis knabo gaja, afabla, kaj facile komprenis mian situacion, kiam mi rakontis ĉion. Entute, mi ne rajtis plendi. Mi trovis pli da kunlaboremo ol mi esperis. Sed bedaŭrinde estis ke ĝi neniel utilis.

– Kiel ajn, ili jam foriris antaŭ longe –li diris al mi.

– Mi ja scias. Proksimume kvin monatojn antaŭe. Ĉu ili ne donis adreson al kiu transsendi poŝtaĵojn.

– Ne, ili ne donis ion al mi. Ili verŝajne kredis ke ne estas neceso. Ekde ilia foriro, venis nur unu sendaĵo por ili. Kaj ni kompreneble resendis ĝin.

– Ĉu ili ricevis malmultan poŝton?

– Jes, tre malmultan. Kaj ĉiam nome de la sinjoro Virós. Mi preskaŭ ne konis ilin. Mi jam vidis ke ĉe la krado estas poŝtkesto... Ĝis la domo mi iris nur unufoje, kiam venis registrita letero.

– Kaj vi, nature, ne memoras, de kie venis la leteroj.

– Komprenu ke kun centoj da leteroj kiujn ĉiutage

mi tuŝas...

Efektive, mi komprenis tre bone.

Sekve, mi provis en la Censa Oficejo. Mi ne konfidis trovi ion, ĉar la plej multaj homoj zorgas pri registriĝo nur en censa jaro. Poste, mi ne sciis, kiel oni akceptos min.

Oni akceptis min bone. La pedelo, al kiu mi petis orientadon, indikis al mi giĉeton al kiu mi turnu min, sed li ja avertis:

– Mi ne certas, ĉu oni povos helpi...

La funkciulo estis homo kun siaj sesdek jaroj, iom patreca, kaj neglektema rilate al aspekto ĉar la jaka kolumo estis superŝutita per pitirazeroj, kaj estis de kelkaj tagoj ne razita. Dum mi rakontis la aferon, li rigardis min per okuloj tre senmovaj, miopulaj.

Mi donis al li ankoraŭ la saman rakonton kiun mi uzis ĝis tiam, ŝanĝante nur la nomon. Mi ne emis elpensi novan historion. Aliflanke, post la ripetado, ĝi komencis ŝajni al mi plaŭdinda. Verŝajne tia ĝi estis, ĉar li diris nur:

– Vi ja scias ke ĉi tie ni ne devas informi pri adresoj de civitanoj...

Mi ridetis al li montrante komprenon.

– Mi perfekte konscias, ke mi petas helpon.

Li malŝtopis sian gorgon, kaj diris:

– Mi vidos, kion mi povas fari... Kio estas la tuta nomo?

– Caterina Freixa –mi ripetis, ĉar, kompreneble, la knabino estis nur vizitanto kaj ne povis estis registrita.

– Ĉu vi ne scias la duan familinomon?

– Ne, vere... Mi forgesis demandi.

– Sen la dua familinomo estas malfacile –li objêtis.

– “Freixa” ne estas tro ofta. Ne povas esti multaj homoj kun tiu familinomo, mi kredas.

– Mi ne scias.

– Li ne ŝajnis tre konvinkita, sed li forlasis la fenestron kaj iris dekstren, kie li malaperis. Mi atendis.

Malantaŭ mi, virino diris:

– Ĉu neniuj deĵoras?

– Jes, la viro venos tuj.

Li atendigis sufiĉe longe, tamen, kaj tiam, vidante ke post mi vicas virino, ankoraŭ diris:

– Permesu, unue... –sin turninte al la virino–.
Kion vi volas?

Mi retiriĝis iome dum ŝi komencis rakonti ke ŝi kaj sia edzo ĵus alvenis la urbon kaj ke al li, kiu jam trovis laboron, oni diris ke necesas najbariĝi. Ŝi volis scii, kiujn paŝojn oni sekvu.

Dek minutojn poste, ĉar la afero estis pli ĝuste malfacila pro la iom obtuza komprenkapablo de la virino, la funkciulo kaj mi estis denove solaj.

– Nun vi –li diris, kaj klarigis–. Fakte ni ne devas fari tion. Ni ne rajtas. Adresojn ni povas doni nur al la polico.

– Mi jam diris, ke mi konsideros tion helpo.

– Jes, jes... Sed ne estas bone ke la homoj kutimu... –li finis–. Tial mi volis okupiĝi unue pri la virino.

Li tenis slipon per la mano, kontemplis ĝin de tre proksime kaj poste apartigis ĝin de la okuloj.

– “Caterina Freixa Badia...” ĉu ne?

– Mi supozas.

– El Almecelles, ĉu?

– Vilaĝo en la provinco de Tarragona?

– Ne, de Lleida.

Tiam mi memoris ke la forpasinta kolonelo ankaŭ estis el tiu regiono, kiel konstatis la kontrakto de la administranto Ferrús, kaj tio iom surprizis min, sed mi limigis min en tio, svage fari: – Jes, de Lleida.

Li jesis per la kapo, kvazaŭ timante mian malkonsenton.

– Kie vi diris ke ŝi loĝis, kiam vi foriris?

Mi ripetis la adreson kaj li movis denove la kapon.

– Precize tiu kiun ni havas. Mi bedaŭras...

Al mi venis ideo:

– Pardonu –mi faris–, de kiam datas, tiu registro?

Li denove rigardis la slipon.

De unu jaron antaŭe, kiam ŝi sin registris en la censo.

Insistado ne estus utila. Eĉ se mi scius ankaŭ la nomon de la forpasinta onklino de Juna, la unua edzino de la kolonelo, kaj mi povus doni ĝin. La viro jam plenumis mian peton. Kaj mi dankis lin.

Bonege. Mi elĉerpis ĉiujn rimedojn por trovi ŝin ne elirinte ekster la urbon. Nun restis unu sola spuro, pli certa, sed ĝi devigos min vojaĝi, kion mi volis eviti pro la laboro: iri al la vilaĝo. Tiu vilaĝo situis ĉe la ekstremo de Katalunio, preskaŭ sur la limo kun Aragono. Tie ne estis fervoja stacio; necesis veturi per aŭto el Móra la Nova. Iom malsimple, iom longe: mi povus bezoni tri tagojn.

Estas klare ke mi jam certiĝis, ke mi persekutas ĥimeron. Jam pasis dudek kvin tagoj de tiu kiam ni devis renkontiĝi ĉe la enirejo de la kinejo Infanta, spaco de tempo pli ol sufiĉa por elpensi manieron kontakti min, se, kiel mi unue pensis, kontraŭaĵo malpermesis al ŝi ĉeesti la rendevuon. Ŝi sciis, kie mi loĝas, povis sendi al mi noton, povis telefoni... Restis malmultaj duboj pri tio, ke ŝi indiferentiĝis pri mi. Sed mi ankoraŭ deziris ŝin, mia sango brulis ĉiufoje kiam mi pensis pri ŝi, kaj mi daŭre pensis pri ŝi. Kaj eĉ se ne estus ĉi tiel. Almenaŭ mi rajtis scii, kial mi faris murdon. Kaj tion mi estis scionta, eĉ se la serĉado daŭros la tutan vivon.

Kiam Sorribes ricevis la informon ke mi devos foresti kelkajn tagojn, tiam li sin montris malakceptema. En tiu momento ni laboris por entrepreno fabrikanta televidilojn, kiu mendis al ni specon de censo pri la familioj kiuj ankoraŭ ne posedas aparaton; oni volis koni ankaŭ la kialon: ĉu malfacilaĵoj pro mono? Ĉu manko de interesiĝo? Ĉu malŝato kontraŭ la nova komunikilo?... Temis pri enketado en granda skalo kaj Sorribes dediĉis al tiu studo preskaŭ sian tutan dungitaron.

Tio des pli malplaĉis al li kiam mi petis ke li antaŭpagu al mi du mil pesetojn el mia salajro de la venontaj monatoj.

– Mi ne tute komprenas –li diris dum tuŝante al si la nazon laŭ tre karakteriza maniero, per du fingroj sed ne tuŝante ĝin–. De longa tempo mi vidas vin malkvieta, mi kredis ke la okazintaĵo de via patrino...

– Mi devas iri al la vilaĝo –mi diris–. Estas afero pri interezoj...

Li levis la kapon.

– Ĉu vi heredis? Ĉar...

– Mi ne heredis –mi rapide improvizis–. Estas nemoveblaĵo de la geavoj, eble vi scias ke ili estis

bienuloj... Principe la patrino estis proprietulo je nedividitaj partoj kun onklo kiu mortis antaŭ jaroj sed postlasis familion. El tio ŝi vidis neniam iom da mono; ĉiam estis unu preteksto aŭ alia: magraj rikoltoj, impostoj... Vi ja komprenas.

– Vi neniam rakontis al mi tiun aferon.

– Kial mi devis rakonti? Ĉu tio interesis vin?

Li ridis.

– Bone. Kaj kion vi volas nun? Ĉu klarigi la situacion?

– Precize.

Finfine, mi diris la ĝustan vorton. Tute ne gravis ĉu la patrino aŭ iu de la familio iam posedus nemoveblaĵon kaj ke, fojfoje, ne tute posedis la vestaĵojn kiujn ili surportis. Kun Sorribes, kaj preskaŭ kun ĉiuj, necesis helpi sin per mensogoj. Se mi rakontus la veron, li elĵetus malbenon al mi: “Ne pluaj stultaĵoj kaj ek al laboro!”. Sed nun, aliflanke, eĉ se kontraŭvole, li konsentis pruntedoni al mi la du mil pesetojn. Tamen li ne povis reteni sin duone plendi:

– Sed mi ne komprenas, kial vi bezonas tiom da pesetoj...

– Ĉu vi timas perdi ilin? –mi rediris–. Vi ja scias,

ke mi estas bona plenumanto.

– Se mi ne sciis mi ne pruntedonus, pri tio plene certu.

Li diris tion kun rideto. Kaj ankaŭ mi ridetis. Sed ni ambaŭ sciis ke ĉi tio estas sankta afero. Li ne oponis al helpado, sed li povis estis certa ke la mono ne perdiĝos.

– Kiom da tagoj tio daŭros?

– Ni diru tri.

– Eĉ ne unu pli. Kiu tago estas hodiaŭ? Ĉu vendredo? Mardon matene mi volas vidi vin ĉi tie.

– Mi ĉeestos.

Lundon mi jam ĉeestis.

Sabaton posttagmeze mi saltis de la linia buso sur la placo de la vilaĝo. Ĝi estis tre damaĝita buso kiu sin trenis preskaŭ dum unu horo kaj duono por trairi tridek kilometrojn proksimumajn kiuj apartigis la vilaĝon for de Móra la Nova. Necesas diri ke la vojo ne permesis egan rapidon.

La vilaĝo estis malgranda, kampara, kaj dum la veturado la ŝoforo diris al mi ke en la vilaĝo estas nur

unu gastejo kiu, li informis min, ofertas ne multajn komfortaĵojn. Fakte neniun. Sed la mastrantaj geedzoj estis tre afablaj, kaj io kompencas alion. Ili diris al mi ke en la vilaĝo estas nur unu trinkejo kaj unu kafejo. Ne, la nomo Mills ne elvokis ĉe ili ion, ili venis de ekstere kaj nur unu jaron antaŭe ili alvenis kaj transprenis la gastejon...

Ankoraŭ nenio estis perdita.

Unu horon poste eĉ la plej optimisma ne konservus eĉ unu pinĉaĵon da espero. La estro de la kafejo kien mi iris unue, asertis ke lia familinomo estas Fígols, ke li neniam havis filinon nomitajn Juna aŭ Justina kaj ke la du filinoj kiujn lia edzino naskis ankoraŭ ne havis aĝon por lernejo.

La trinkejestro, kun kiu mi povis interparoli tuj sekve, estis knabo juna, fraŭla kaj sola filo. Oldulo kiu estis tie, sin miksis en la interparoladon.

– Mill, Mill... Mi konis familion...

– Mills –mi ĝustigis.

– Mills do –li koncedis kun tia leĝero kia ne donis bonan aŭguron–. Antaŭ tre longe ili forlasis la vilaĝon.

– Mi ne konas ilin –diris la trinkejestro–. Kiu estis ili?

– Via patrino ja konis ilin...

Oni alvokis ŝin. Ŝi estis virino dika, kun grandaj mamoj pendantaj ĝis la talio.

– Jes, certe! –ŝi tuj faris–. Ili apartenis al la familio Hortolà, ĉu ne?

– Certe –aprobis la oldulo–. Kaj tie estis knabino.

– Sed nun ŝi jam devas esti olda, se ŝi ankoraŭ vivas –klarigis la patrino de la trinkejestro–. Jes, ni havis la saman aĝon. Kiam ili foriris, eble ŝi ankoraŭ ne aĝis dekkvar jarojn.

– Verŝajne filino ŝia –diris la trinkejestro.

– Kiel ajn, ŝi nenian vivis ĉi tie.

– Kaj trinkejon neniam ili havis.

Definitive la afero finiĝis. Aŭ ne tute, ĉar post la vespermanĝo sin prezentis ulo en la gastejo demandante pri la fremdulo kiu alvenis posttagmeze.

Ŝajne, la novaĵo cirkulis rapide. Nun eble ĉiuj jam sciis, kaj komentis, ke barcelonano venis al la vilaĝo serĉante knabinon.

– Mi estas parenco de la familio Mill –li diris kiam oni alvokis min de la ĉambro.

– Mills, vi volas diri.

– Ne, Mill. Oni diras ke vi serĉas la filinon...

– Knabinon nomatan Juna.

Li neis per la kapo, ridetis al mi per la okuloj kaj iom sarkasme kvazaŭ dirante: “Oni trompis vin!”

– Juna, ne. Ĉi tie neniam estis virino kun tiu nomo. Tio estas ĉefurbaj aferoj. Mi estas kuzo de tiu familio –li klarigis–. Tio estas, ke mi edziĝis kun kuzino. Sed ŝi jam estas mortinta.

– Mi serĉas knabinon junan, ĉirkaŭ 23-jaran.

– Nu, jes, tiu povas esti la filino. Sed ŝi ne naskiĝis en la vilaĝo, sed en Tortosa, kie la patro iris por vivi kaj edziĝis kun Mundeta.

– Ĉu via kuzino?

– Jes. Ankaŭ la knabino nomiĝas ĉi tiel.

En la trinkejo neniu memoris tion. Eĉ ne ke ŝi havis parencon en la vilaĝo.

– Ĉu parencon? –li surpriziĝis.

– Vi mem.

– Ah, jes! Ili memoris poste, tial ili instigis min rakonti tion. Ŝia familio neniam revenis.

– Ĉu ili ankoraŭ loĝas en Tortosa?

– Jes. La knabino estas servistino en monaĥinejo,

sed mi priskribis Juna al li, ŝajne sufiĉe bone, ĉar li preskaŭ ne lasis min fini:

– Ho, ne! –li ridis, pli sarkasme ol antaŭe–. Se ŝi estus tia, la monaĥinoj ne akceptus ŝin.

Ne necesis insisti. Mi invitis lin trinki ion por kompensi la zorgadon, kaj li dankis per tre kurioza maniero: la gastejaj litoj ne estis tre molaj kaj, poste, la homoj de mia aĝo ne ŝatas dormi solaj, li konis knabinon ĉiam pretan fari favoron, kaj sen tro alta prezo, li aldonis. Li povis akompani min ĝis la domo, se mi volus...

Eble mi ne decidis korekte, ĉar mi fartis spirite malforte, sed mi rifuzis la proponon. Eĉ se estus malfacile kompreni, nur unu virinon mi ankoraŭ deziris: Juna.

La afero finiĝis. Ne plu restis io. La knabino malaperis ne lasinte spuron. Estis senutile diri ke mi persekutos ŝin eĉ se mi devus dediĉi la tutan vivon al tiu tasko. Ŝi malaperis tiom tute, ke estis kvazaŭ ŝi neniam estus ekzistinta. Sed ŝi ja ekzistis. Mi tenis ŝin inter miaj brakoj, mi sentis la febligan kontakton de ŝia korpo tepida, ni kisis nin ĝis sufokiĝo, per la fingroj mi trasekvis tiujn perturbigajn gambojn kiuj, preskaŭ ok monatojn antaŭe devigis min halti sur la Avenuo Diagonala kaj eniri buson ne kondukanta al mia destino... Ekzistis la pasiaj vortoj, diskutoj, projektoj. Kaj inter la tiama ĉeesto kaj la nuna foresto estis kadavro.

Mi reiris al la agentejo, al la laboro, al la profunda enketado, al la merkatesploroj, al la domicilaj intervjuoj. Kun Sorribes mi interkonsentis ke ĉiusemajne li retenos por si cent pesetojn el mia salajro por reakiri la du mil pesetojn kiuj al mi neniom utilis; ĉar mi konfesis ke la problemo pri la nemoveblaĵo ne klariĝis kaj ke, kalkulite kaj diskutite, miaj parencoj estis pli malriĉaj ol mi.

– Tion mi povis diri de malantaŭ tiu tablo –li diris, kredante sin tro saĝa–. Vi ĉiam estos revulo, Rius. Tio tamen estas via mono.

Ne temis pri mono, sed pri la doloro, la kolero pro tio, ke oni trompis min tiom mizere, tiom nekompreneble. Tio utilis por celo kiun mi ne konis, kiun mi neniam konos. La amaj vortoj, la kisoj, la sinliveroj... Ĉio estis mensogo. Kaj mi ne kapablis rimarki, mi najlis la rigardon en ŝiaj okuloj kaj mi kredis legi tie pasion similan al la mia, forvorema, ne elĉerpebla... Ankaŭ senskrupula, ja. Sed tiu detalo ne gravis. Mi pasis super ĉio, mi akceptis ĉion por ke tiu amo prosperu, eĉ se makulita per fremda sango. Alie ne estis klarigebla. Tio estas...

Al mi venis la penso ke ŝi povis esti mortinta. Estas vere ke ŝi estis juna kaj sana, sed ankaŭ homoj junaj kaj sanaj mortas. Eble ŝi estis viktimo de akcidento, de fulma malsano... Tamen ne. Estis tro da detaloj kiuj kontraŭdiris ŝin. La trompo ekzistis. Ŝi donis al mi la nomon de vilaĝo kie neniu konis ŝin, kie verŝajne neniam ŝi loĝis; ŝi parolis pri cirkonstancoj ne kongruaj kun detaloj kiujn mi malkovris, laŭ ĉio kion mi sciis. Kaj se ŝi donis al mi ekzaktan adreson, tiun de la domo kie ŝi antaŭe loĝis, tio estis nur por

unu celo: ke mi iru tien kun murdaj intencoj... Jes, ŝi helpis sin per mi, mi estis ludilo en ŝiaj manoj. Mi ne kapablis rimarki ion, kompreni ion, blinde pro tiu brila beleco, pro la profundeco de okuloj en kies fundo ĝis nun mi ne sciis, kio estas tie.

Mi ne scias ĉu mi ankoraŭ konfidis ke la hazardo metu ŝin antaŭ min. Ni konatiĝis hazarde, kaj nova renkontiĝo povis ripetiĝi se ŝi ankoraŭ loĝis en la urbo. Iun esperon mi konservis, ĉar mi promenis sur la stratoj kun atentaj okuloj, esplorante la vizaĝojn de la knabinoj preterpasantaj, kiujn mi vidis trans la fermitaj vitroj de la tramaj fenestroj, en la enirejoj kaj la ŝtuparoj kiujn mia laboro devigis min trairi. Multaj estis belaj, havis similajn okulojn, aŭ ŝian buŝon, bone kreskintajn gambojn, belan korpon... Sed neniu el ili estis ŝi. Revado ne estis utila. Se tion oni povus nomi revado: kiam interne de mi io mortis, tiam ĉio mortis.

Necesis ke la laboro min konduku al la supra parto de la Avenuo de la Respubliko Argentina por memori detalon kiun mi ne devis forgesi: la handikapita amikino. Kiam tio venis al mi en la kapon, mi ne komprenis tiun forgeson. Estas vere ke jam pasis kelkaj monatoj, ne malpli ol naŭ, nun, kaj ke pri tiu

amikino ni parolis tre malmulte; fakte, ni apenaŭ menciis ŝin. Nek al ŝi nek al mi tio ŝajnis interesa temo por babilado. Kaj, tamen, tie povis kuŝi la ŝlosilo de la afero. Juna diris ke ili estas konataj de antaŭe, de la epoko kiam ŝi loĝis en Barcelono, kiam ŝia onklino vivis. Tiu amikino nepre devis scii ion, do; verŝajne Juna ankoraŭ vizitis ŝin. Mia koro saltis.

Mi saltis de la buso. La laboro iru al la diablo! La afero estis urĝa. Klare ke poste, dum mi proksimiĝis al la domo kie mi vidis ŝin malaperi la unuan tagon, la pripensado konsilis min bremsi la esperon. Ŝi ja diris al mi multajn mensogojn!

Kaj ankaŭ tio estis mensogo. La amikino neniam ekzistis. Tion mi pruvis post kelkaj sekundoj, kiam mi pridemandis la pordistinon.

– Ĉu handikapita knabino? –ŝi surpriziĝis–. Estas neniu handikapito ĉi tie.

– Eble nun ŝi ne plu loĝas tie –mi faris dum interne de mi ĉio ruiniĝis ankoraŭfoje–. Sed ĉi tie estis unu antaŭ ok aŭ naŭ montoj.

Mi trafis la virinon en la momento kiam ŝi lavis ion en la lava pelvo kaj nun ŝi sekigis al si la manojn dum rigardis min kun iom da scivolo. Ŝi estis juna, ĉirkaŭ tridek-jara, kun rimarkeblaj trajtoj kvankam

agrablaj.

– Ne. Neniam –ŝi diris.

– Ĉu vi laboras tie de longe?

– Ekde la konstruo de la domo. Jam de unu jaro kaj duono. Kaj neniam loĝis ĉi tie handikapito, ĉu viro ĉu virino.

– Knabino suferinta veturakcidenton –mi insistis. Mi ne rezignis pri tio, ke tiu spuro forglitu el miaj manoj.

– Mi plene certas.

Sed Juna eniris la domon. Tion mi vidis per la propraj okuloj. Iun kontakton aŭ alian ŝi devis havi ĉi tie, iun ŝi vizitis... Kompreneble ke povis temi pri okaza afero. Mi faris:

– Komprenu mian insiston. Mi klarigos... Antaŭ kelka tempo mi konatiĝis kun knabino kaj ni havis intiman rilaton, ŝi konfidis al mi komision por plenumi eksterlande, kien mi devis iri, kaj nun, reveninte, oni informis min ke la familio suferis malfeliĉan okazaĵon kaj ili forlasis la loĝejon kiun ili lu-prenis. Poste mi memoris ke iun tagon mi akompanis ŝin ĝis la pordo de tiu domo, ĉar ŝi diris al mi ke ŝi vizitas amikino kiu restis handikapita.

– Ŝi do trompis vin –diris la pordistino.

– Tion mi vidas.

– Ĉu vi estas certa, ke la domo estas ĉi tiu? Ĉu vi rimarkis ke estas kvar domoj similaj?

– Jes. Ĉu estas handikapito en la ceteraj domoj?

– Ne –ŝi faris–. Tion mi scius.

– Kiel ajn, mi plene certas ke la domo estas ĉi tiu, mi atentis: la tria domo.

– Da junulinoj, nur estas unu en la tuta konstruaĵo, edukistino... Mi volas diri ke ŝi estas fraŭla. Estas aliaj virinoj edziniĝintaj. Ĉiuj ricevas vizitojn, sed mi jam diris ke estas neniu virino handikapita.

– Se mi priskribus ŝin... Mi kredas ke ŝi venis ofte.

– Ni vidu.

– Ŝia nomo estis Juna.

La virino svingis la kapon kun nea gesto.

– Ne. Tio estas malofta nomo.

Tiam mi priskribis ŝin tiom bone kiom mi kapablis. Kaj mi ne faris tute malbone ĉar kelkajn momentojn poste ŝiaj okuloj ŝanĝis la esprimon, kaj la lipoj faris rideton.

– Ĉu vi konas ŝin? –mi demandis sci-avide.

– Nu... Mi ne povas diri ke mi konas ŝin. Sed virino, kian vi priskribas, venis ofte ĉi tien. Ĉiufoje ŝi farbis siajn lipojn per malsama koloro, ĉu ne?

– Ekzakte.

Ŝia rideto akcentiĝis, ŝi faris geston kaj diris:

– Eniru.

Ĝis tiam ni parolis ĉe la vitra pordo, ŝi interne kaj mi ekstere. Ŝi duonfermis la pordon malantaŭ mi kaj restis rigardante min.

– Ŝi ne vizitis amikinojn, sed amikojn... Se li ankoraŭ estus ĉi tie, mi nenion rakontus –ŝi klarigis–. Mi ne volas problemojn. Sed nun ili ne plu venas ĉi tien; aliflanke ne estas korekte ke ŝi trompis vin.

Mi preteratentis ĉi tiujn konsiderojn. Nur io interesis min:

– Kaj kiu estis tiu amiko?

– Juna advokato.

– Ĉu li loĝis ĉi tie?

– Ne. Li luprenis loĝejon situanta malantaŭ la dua pordo de la tria etaĝo. Ambaŭ venis sabate, neniam kune. Li fojfoje dormis ĉi tie. Supozeble li luprenis la

apartamenton kun la nura celo ricevi tiun knabinon. Mi kredis ke ŝi estas edziniĝinta...

– Ne, fraŭla.

– Ŝi neniam parolis. Ŝi eniris, sin metis en la lifton... kaj supren. Neniam mi estus atentinta pri ŝi, sed unu sabaton mi estis en la ŝtuparplaceton de la supera etaĝo, senpolvigante la balustradon, kaj aŭdinte ke la lifto haltis, mi klinis min por scii, kiu venis; por vidi, ĉu oni iris al la alia pordo malantaŭ kiu neniu loĝis. Tiam mi vidis ke ŝi prenas ŝlosilon el la monujo kaj malfermas la pordon... Mi certigas vin, ke mi neniam estus imaginta... Poste tion konfirmis al mi najbarino, kiu diris ke la afero daŭris de longe kaj ke ŝi kredis ke mi jam sciis.

Verŝajne mi estis pala kia papero, sed mi streĉis mian forton por kontroli la emociojn, pli intensajn ol mi estus supozinta. Tiu malkovro profunde vundis min. Neniam mi sentis min tiom ofendita. La evidenta senvualiĝo de la trompo... Sabate ŝi eskapis de mi por haste kuri al aliulaj brakoj, al kiuj ŝi sin liveros, agos pli libere pli konsentema ĝis la fino. Kisoj, karesoj, vortoj; ĉio estis fia mensogo. Mi sentis naŭzojn.

La pordistino daŭre parolis, sed mi preskaŭ ne plu aŭskultis ŝin; ĉio estis ripetado de la sama rakonto,

nun pli prilaborita, ĉar nun ŝajnis ke tio ekplaĉis al ŝi kaj, kun senkonscia krueleco, ŝi marteladis la najlon en la vundo. Mi interrompis ŝin kaj demandis:

– Kaj kiel li nomiĝis?

– Pol.

– Kaj vi diris, ke li estas advokato.

– Certe.

– Ĉu vi scias, kie li laboris?

– Ne. Li ne estis barcelonano.

– Sed li devis loĝi ĉi tie...

– Mi kredas ke ne. Li estis el Santa Coloma de Gramenet.

– Ĉu tion diris li?

– Ne. Ankaŭ li neniam parolis. Nur la nomon li diris, ĉar mi devas scii tion pro mia laboro de pordistino. Mi malkovris hazarde, iun tagon kiam venis dungito el la juĝejo kiu portis paperon por najbaroj. Li diris al mi: “Ĉu tiu ne estas sinjoro Pol?”. Respondinte ke jes, li diris ke li pensis ke li ankoraŭ loĝas en Santa Coloma.

– Kaj kiam li forlasis ĉi tiun apartamenton?

– Eble sep aŭ ok monatojn antaŭe. Mi kredis ke ili

rompis la rilaton, kaj ke ili ne plu bezonis la apartamenton.

– Eble okazis tio.

– Mi bedaŭras ke mi ne povas rakonti al vi pli multe... –ŝi finis.

Ŝi jam diris sufiĉe, tamen. Trovi advokaton nomatan Pol ne devas estas tiom malfacile.

La tasko tute ne estis malfacila, sed mirinde facila. La telefonlibro kiun mi konsultis, registris nur unu homon kun nomo Pol en Santa Coloma kaj, se mi bezonis pli klarajn datumojn, apud la nomo figuris ankaŭ la profesio: advokato.

Mi estis absolute certa, ke se mi sekvas tiun advokaton, mi finfine trovos ŝin. Eĉ en una sola momento mi ne kredis la sugeston de la pordistino, laŭ kiu ili rompis la rilaton. Ne. Nun mi vidis klare. Tiun murdon projektis ili ambaŭ, la plano verŝajne estis elpensita de Pol mem, la knabino nur ravis malfeliĉulon, kaj la sorto aranĝis ke ĉi tiu estu mi, por fari la malpuran laboron. Li estus same senskrupula, kia estis Juna, kaj konsentis ke ŝin tuŝu aliulaj manoj, ĉar li ne povis kredi ke ŝi sukcesos nur per rigardoj,

per kelkaj ridetoj dolĉaj kaj insinujaj... Ambaŭ estis senhontaj kanajloj, kapablaj salti super ĉio por atingi sian celon, en tiu kazo io tiom malestiminda kia estas mono. Aŭ preskaŭ super ĉio, mi devis ĝustigi tiam, memorante la unuajn renkontiĝojn kun Juna, malgraŭ ŝia manko de skrupuloj, neniam ŝi volis liveri sin tute al mi. Sed tio, el mia vidpunkto, des pli enkaĉigis ĉion.

Jes, mi pripensis. Unuflanke tio montris ke mi ne kaŭzis sur ŝi minimuman fizikan allogon kiu, en difinita momento, kiam la kisoj kaj la karesoj preparis la grundon, malhelpus rifuzon. Aliflanke, kaj konsekvence de tio, ŝia sinteno evidentigis ke ŝia amiko, la advokato, ne estis nur amorkomplico, ĉar ligis ilin daŭra rilato. Li estis viro kiun ŝi amis pli ol ĉion ajn, kiun ŝi ne povis perfidi, por kiu ŝi volis konservi absolutan fidelecon eĉ en la momentoj kiam ŝi sin vidis devigita senvestiĝi por alia viro. Ŝi mensogis lerte, ŝi estis kompetenta aktorino, ŝi kapablis faligi min en la trompon tiel, ke mi nenion suspektu, estas vere; sed tiun vesperon kiam mi trovis ŝin dormanta sur mia lito, ŝiaj reagoj al miaj karesoj estis klare sinceraj, aŭtentaj. Al ŝi la sango bolis same kiel al mi. Neniu povas ŝajnigi ĝis tiu ekstremo

spiradon skuitan, sopiran, tiun specon de korpa tremado kiu en la plej spertaj manoj malkaŝas urĝan deziron. Ŝi tamen rezistis, ŝi povis rifuzi sin al mi kvankam ŝi sciis, ke se ŝi ne rakontos, Pol neniam povos malkovri ion de ŝia malforteco. Ĉu ne skribis iu, verŝajne poeto, ke nur tri aĵoj ne postlasas spuron: la traĵo de ŝipo sur la maro, la flugo de birdo en la aero, kaj la rekta kontakto kun viro ĉe virino ne virga.

Finfine, mi preskaŭ admiris ŝin. Sed estis des pli aĉe. Mi estus dezirinta ian amon tiom veran, tiom fidelan, por mi. Esti la feliĉulo.

Sed nenio el tio min detenis serĉi ŝin. Super la admiro, preter tiu neestingebla anhelado kiu min disŝiris, estis surda kolero, retenata furiozo, kaj tial pli teruraj, de la viro kiu, tuŝinta la paradizon per la fingroj, sin trovas subite en la nuda kaj kruda realo, definitive prirabita je ĉia beleco. Ĉar en tiu momento ŝajnis al mi ke oni forprenis ĉion de mi, la mallongan paseon kiun ni duone kundividis, kaj la futuron kiu nin atendis. Ĉu sola ĉu akompanata.

Mi iris ĝis Santa Coloma. Mi antaŭvidis ke la afero povas longiĝi, mi devus sekvi ĉiujn liajn paŝojn, ne lasi lin sen kontrolo; al tio mi dediĉos tutajn diurnojn. Al sinjoro Sorribes mi ne povis doni alian

tiom apenaŭ defendeblan pretekston kiel en la alia okazo. Ne restis alia rimedo ol diri ke mi malsanas.

Mi telefonis al li iun matenon por diri ke mi ne povas labori pro febro, kaj ke mi stariĝis nur por paroli kun li. “Jes, mi supozas ke temas pri gripo”, mi respondis kiam li demandis, kion mi suferas. Ĉiel ajn li ne multe insistis, pli ĝuste ŝajnis ke lia afero urĝis por kroĉi, kaj forlasi min al la sorto. Tion li klarigis tre bone al mi. Ĉiufoje kiam laboranto malsaniĝas, Sorribes sin sentas embarasita kaj preferas forgesi kiom eble plej baldaŭ. Al agentoj kompensis neniu asekuro, ni ĝuis nenian socialan favoron, li pretendis ke temas pri libera laboro, praktike enspezante pro komisioj, liberale, kiel li ŝatis ripeti; aŭ per aliaj vortoj, ankoraŭ ne reguligita laboro. Aliflanke li rimarkis sian maljustecon kontraŭ la laborantoj kiuj elmontris per nia diligenteco ke ni volis persisti en la profesio, kiun ni konsideris definitiva kaj ne nura provo. Se li ne estus tiom sbira kia li estis, li povus dungi nin kiel administrantojn por nur ŝajne plenumi sian devon. Sed li ne pensis pri tiuj etaj detaloj; se oni demandis pri la afero, li prokrastis la demandon. Li metis la manojn sur la kapon aŭ muĝis. Ne necesis insisti.

Tiun saman tagon komenciĝis mia esplorado. Mi disponis pri la mono kiu postrestis de mia vojaĝo, ĉirkaŭ mil kvincent pesetoj, kiun mi preferis ne redoni al Sorribes, ankaŭ pri la gajno de la pasinta semajno kaj, se necese, pri kelkaj objektoj personaj kiujn mi povus vendi aŭ lombardi ĉe urĝa okazo. Mi sciis, ke mi devos alfronti ĉiajn elspezojn, sed ankoraŭ ne sufiĉe bone ĉar, estis logike, mi ne pensis ke la advokato Pol uzis aŭton kaj mi bezonos veturilon por sekvi lin. Bonŝance mi havis vetur-licencon kiun la estro devigis min akiri se mi volis ingresi en lian organizaĵon. Kial li volis ke la laborantoj povu veturi, tion mi ne scias, ĉar li neniam disponigis al ni aŭton kaj ĉiujn miajn moviĝojn mi faris metroe, buse aŭ trame, ĉiam pagante el mia poŝo.

Alia kion mi rimarkis tuj poste estis ke mia enketado estis senobjekta dum la matenoj, ĉar dum tiuj horoj li laboris en la oficejo. Apud la pordo, anonco diris tion tre klare: de la deka ĝis la dekdua. La domo estis en centra strato kaj, ĝuste fronte estis du perfektaj lokoj el kiuj rigardi, trinkejo kaj kafejo; el kiuj mi povis vidi tre bone la pordon.

La du unuaj tagoj, senrezultaj, sufiĉis por rimarki ke hejmo kaj oficejo estis unu kaj sama loko, ĉar je la

tagmanĝa tempo li ne eliris kaj vespere ĉiam li revenis por manĝi. Grandan parton de la posttagmezo li pasigis kun profesiaj aferoj. Inter la sepa kaj la sepa kaj duono estis la momento kiam li kredis la laboron finita. Li ofte vizitadis kafejon kie mi vidis lin renkontiĝanta kun viroj samaĝaj en pluraj okazoj: la amika rondo, kompreneble.

Komence mi timis ke povus esti malfacile identigi lin, ĉar en la domo estis kvar loĝejoj, du en la grundetaĝo kaj du en la unua etaĝo, sed nun la bonŝanco sin turnis al mi kaj, kiam mi vidis lin, mi tuj sciis ke ĉi tiu estas li, ĉar mi jam konis lin: li estis tiu knabo kiu akompanis Juna la tagon post kiu mi lasis ŝin ĉe la stratpordo en Les Corts, terurigite pro ŝiaj proponoj pri murdo. Mi sentis nenian surpriziĝon, kvazaŭ mi jam estus suspektinta tion, nur ke tiu kono ne eliris en la konscion. Tamen, necesas diri, ke la konfirmo de tiu fakto des pli kreskigis mian koleron kontraŭ la knabino. Kun cinika aplombo ŝi ŝovis sian kromviron sur mia nazo! Ĉar neniel ajn mi povis kredi ke ĉio okazis hazarde. Ĉiuj manovroj de Juna, de la paro, estis perfekte kalkulitaj, kaj tiun tagon ŝi volis provoki ĉe mi reagon kiu igu min toleri ŝiajn krimajn projektojn. Mi ne povis scii ke tiam mi bezonis ŝin

tiom ke, sen mia scio, mi pretis por ĉio ajn.

Sed nun ŝi pagos pro tio. La perfidita amo, la deziro kiun ŝi ne konsentis kontentigi, la iluzioj kiujn ŝi vekis kaj poste mortigis, la ĉiutaga mensogo al kiu ŝi sin liveris dum tuta monato, tiu nervozeco kiu nun detruis min, la gusto de cindro kaj galo kiu nun plenigas mian buŝon... Ĉion ŝi devos pagi. Fojfoje mi pensas pri la ideo devigi ŝin doni sin al mi, kaj poste kraĉi sur ŝin; en aliaj okazoj mi pensis donaci al ŝi kolosan batadon kiu lasos ŝin duonmortinta; ĝis mi venis al la ideo pri mortigo. Ĉu mi ne mortigis jam pro amo? Pli facile, ŝajne, povus esti mortigi pro malamo. En tiuj buĉaj momentoj mi diris al mi ke morto malrapida, tre malrapida, estus la plej konvena. Ke ŝi disponu pri tempo por suferi; rimarki, kio okazas al ŝi; ke antaŭ la lasta nokto ŝi komprenu ion kion ŝi ne rimarkis: ekzistas estuloj kiuj ne rezignas esti detruitaj kaj de la fundo de la propra despero estas kapablaj redoni baton pro bato kaj treni la ceterajn en la damnon. Dum tiuj tagoj, en mia interno laboris terura kaj malluma maŝino je plena rendimento. Kaj estis pli malbone ol mi estus imaginta, ĉar nur kruela dio povis fariĝi karno en mia brako, aŭ konduki ĝin, kiam finfine mi trovis ŝin. Ĉar ĉe la fino mi trovis ŝin.

Tio estis en la kvara tago. Ili povis renkontiĝi antaŭe, ĉar mi, ĝis la momento, ne pensis pri la ideo ke la renkontiĝoj povis havi lokon dumnokte. Eble ĉar ĝis tiam, dum la tempo de mia rilato kun Juna, ili ĉiam renkontiĝis posttagmeze, mi pensis ke tiuj estis la horoj de iliaj amordiboĉoj. Mi ne pripensis tion ĝis la vespero de la tria diurno, dum li estis en la kafejo kun siaj amikoj kaj tiam, anstataŭ retiri min en la momento kiam li eniris sian hejmon, mi parkumis la motorciklon kaj metis min en trinkejon.

La nokto estis longa, nefinebla, ĉar kiam restis unu kvarono ĝis la dekdua, tiam ŝajnis al mi ke la kafejestro komencis malŝati tiom longan restadon mian en lia kafejo. Li verŝajne jam konis min iomete, mi pasigis tie tri posttagmezojn, trinkante kafon, laktokafon, kaj kafon ankoraŭ. Ne estis tiom facile spioni homon, pri tio mi certigis min. Ĉi tie okazis ankaŭ ke ĉiuj sin konis; la klientoj sin salutis reciproke, parolis, trinkis kune. Nur mi estis sola. Fakte, mi kredas ke la situacio fariĝus nedaŭrigebla se tio etendiĝus tro longe. Mi sentis min evidenta, tiom

elstara kia muŝo en supra telero. Eble tio estis nur mia imagemo; aliflanke, la rigardoj kiujn ĵetis al mi la oftaj klientoj ne montris apartan suspekton: estas normale se ili atentigas fremdulon, eĉ se nur indiferente. Mi tamen sciis ke mia ĉeesto inter ili ŝuldiĝis al nekonfeseblaj celoj, kaj tial mi malfidis al ĉiuj rigardoj kiuj eskapis al mi; al la malmultaj interparoloj kiuj povus aludi min; al la afablaj vortojn de la estro, sub kiuj mi vidis kaŝitajn intencojn. Nenio simila al la stato havi kulpulan konsciencon. Sed, samtempe, mi rivelis min kontraŭ tiu ideo.

La kulpeco estas alia, mi diris al mi en tiu tria nokto, kiam forlasinte la trinkejon mi haltiĝis ĉe la stratangulo, preta atendi unu horon, pluan horon kaj duonon antaŭ ol lasi la labortagon finita. La krimo estis plenumita kaj ĝi komencas esti malnova, mi interkonsentis kun la honesta parto de mi mem kiu ne akceptis la krimon, kaj devigis tiun parton forgesi ĝin. Nun mi nur spionis, priserĉis, homon pli kulpan ol mi, kiu projektis tiun murdon kun malvarma sango, ne kiel mi, blindigita de luma korpo... Eble ankaŭ al li ĝi lumis, eble ankaŭ li ekstaziĝis same kiel mi, aŭ eĉ pli multe; sed la krimon, malgraŭ tio, oni kalkulis malvarme, ĉar inter li kaj mi estis malsimileco: Juna

estis lia, al li sin donis ŝi. Al mi, male, ŝi sin rifuzis.

Tamen, nenio el tio min trankviligis. Fakte, tagon post tago elmergiĝis en mi sentoj pli kaj pli konfuzaj, komplikaj, pli malfacile elnodeblaj. Iam mi kredis freneziĝi ĉar knabino lasis min kisi ŝin, kaj varmigis min per sia beleco, sed nun mi iĝos freneza pro manko de pacienco, pro trema deziro kaŭzi damaĝon, tioman kian oni kaŭzis al mi. Freneza pro timo ankaŭe, ĉar al tiu enueco kiun kaŭzis al mi ĉi rigardoj kaj interparoloj kiuj celis min, aldoniĝis la timo esti rekonita de li se la afero tro longe daŭros aŭ mi faros mispaŝon: mi ne povis scii ĉu tiun tagon kiam mi kruciĝis kun Juna sur la strato, ŝi diris al li: “ĉi tiu estas li”. Verŝajne ŝi diris tion al li. Ankaŭ estis la timo, pli kaŝita, sed pli forta, elĉerpi mian koleron antaŭ ol renkontiĝi kun ŝi front-al-fronte. Poste, tio evidentiĝis sensenca timo, ĉar ĉio okazis laŭ tute malsimila maniero.

La advokato Pol ne elhejmiĝis dum la tuta nokto en tiu diurno, sed la morgaŭon, je la deka kaj kvarono, vespermanĝinte, mi supozas, li fermis la stratpordon kaj malproksimiĝis al placeto kiu situis pli malsupre, kie mi jam rimarkis ke li parkumas la aŭton tie. Li preksaŭ eskapis de mia vido. La trinkejstro ĵus servis

al mi kafon, kaj mi fortrinkis ĝin duglute, varmegan. Bonŝance mi jam pagis ĝin. Mi ĉiam pagis la konsumaĵojn ĉe la momento de la servo. Malgraŭ tio, mi perdis minutojn kiuj povis estis tre valoraj se li ne estus haltinta por bruligi cigaredon antaŭ ol ŝalti la motoron, ĉar mi sekvis post li, je prudenta malproksimo. Dum miaj veturadoj mi alprenis la singardan rimedon surmeti motorciklistajn okulvitrojn, kaj duone kovri la vizaĝon per skarpo, kion la vetero, iom malvarmeta, tre nature rajtigis.

Ni veturadis tra la urbo kaj tiam, anstataŭ sin turni al Barcelono, kiel mi esperis kaj kiel li kutimis fari en la malmultaj okazoj kiam li uzis la veturilon, li sin direktis al la najbara urbo Badalona. Ni trairis la tutan avenuon de Alfonso la 13a, ni transiris la straton de la Kruco kaj, antaŭ ol atingi ĝian finon, la aŭto sin turnis al la avenuo de Martí Pujol, en tiu horo preskaŭ sen trafiko.

Alveninte mallongan straton transversan, pri kiu mi poste rimarkis ke ĝi estas la strato de Bruc, tien li kondukis la aŭton kaj parkumis ĝin. Mi pluiris ĝis la sekva transversa vojo, la strato de Girona, por retroiri rapide, nun piede. Nun li jam sin tiris sur la avenuo de Zumalcàrregui. Mi povis sekvi lin sen malfacilaĵoj,

ĉar la loko estis pli ĝuste malluma.

Pli ol unufoje mi laboris en Badalona, ĉar niaj prospektoradoj ne limiĝis ĉiam en la ĉefurbo, sed ili tre ofte inkluzivis la proksimajn urbojn, sed la laboro ne kundukis min al tiu kvartalo kiu al mi ŝajnis nova, ankoraŭ malabunde loĝata, kun multaj parceloj sen konstruaĵoj, inter modestaj domoj kaj iu ĵus konstruita apartamentaro.

Pol reiris malantaŭen, li transiris la straton kaj metis sin en unu el malaltaj domoj, kun pordo flankita de du fenestroj protektitaj per persienoj verdaj. La stratpordo estis malfermita, ĉar li nur puŝis ĝin, tiel ke verŝajne oni jam atendis lin. Kiam li malaperis mi estis kurinta kaj restis senmova, iom malprudente ĉe unu el la fenestroj. Mi aŭdis neniun bruon de tintilo, neniun signon pri akcepto. Tiam mi certiĝis ke mia serĉado jam atingis la finon.

Unu momenton poste mi antaŭeniris ĝis la pordo. La ekstera pordo ne restis tute fermita kaj mi povis distingi la enirejon, sen la plej eta profundeco, kaj la du ŝtupetojn kondukantajn al la interna pordo, el kiu eskapis iom da lumo, ĉar la gvatotruo estis malfermita.

Mi ne intencis enrompiĝi ĉe tiu momento. Unue

ĉar la certeco definitive estis relativa, ĝi ne staris sur objektiva datumo, sed nur sur pura intuicio; post ĉio, ĉiam povas okazi ke ili kverelis kaj li nur havis aventuron kun alia amikino. Necesis pensi pri ĉia eventualo. Due, mi ĉiam imagis trovi ŝin sola, ŝi kaj mi sen atestantoj, kaj pri tiu cirkonstanco mi ne rezignis. Pri li, ĉiuokaze mi povus zorgi poste.

Post kelka hezitado, mi supreniris al la enirejo kiun nur unu ŝtupo apartigis de la strato, mi fiksis la rigardon en la fendon de la gvatotruo, sed nur interne, trapasinte la antaŭĉambro, kie la lumo brulis, tie tranĉis mian vidon kurteno. Ne tro longe, ĉar kelkajn sekundojn poste la tolaĵo malfermiĝis kaj Juna penetris en la antaŭĉambron. Mia koro saltis ĝis la buŝo kaj flamo bruligis mian bruston. Sed mi ne perdis la kvietecon, ĉar mi rapide hastis al la strato kaj apartiĝis je kelkaj paŝoj, preskaŭ duone vidis ŝin, dum ono da tempo senfine mallonga, sed mi ne nur trafis la ŝancon pruvi ke tiu estis ŝi, sed ankaŭ rimarkis ke ŝi estas pli bela ol mi memoris. Tiom bela ke igis min plori.

La ekstera pordo fermiĝis. Mi aŭdis la frapon de ambaŭ klapoj kaj, tuj poste, denove pli profunde, pli forte, la interna pordo kiun ŝi krakigis malantaŭ si. Pol

estis alveninta.

Verŝajne li estus pasigonta la tutan nokton tie, kaj poste mi trovis min ne scianta kion fari. La strato ne proponis rifuĝejon, krom la anguloj kaj iu pordo kiu estis kelkajn metrojn for, sufiĉe taŭga por akcepti min. Sed ne plaĉis al mi la ideo pasigi la tutan nokton gardostarante. Anksiigis min la penso ke dum mi estis tie frostiĝante, ĉar la vento estis akre malvarma, ili komforte ripozis sur larĝa kaj mola lito, malaranĝita pro amorbatalo. Samtempe mi ne aprobis la ideon foriri...

Finfine mi decidis eniri trinkejon kiun mi trovis antaŭ ol atingi la alian angulon, kaj el kiu, do, mi ankaŭ ne povis observi la domon. Sed mi estos proksime. Mi sentis la malsaĝan neceson esti proksime. Antaŭ ol kaŝi min tie, mi iris serĉi la motorciklon kaj poste mi parkumis ĝin fronte al la trinkejo.

Sed la motorciklo ne restis longe, ĉar kiam mi estis ene mi rimarkis pli klare ke tiu decido resti proksime estas stulta, ke se mi volis renkonti ŝin sola, ĝis la posta tago tio ne eblos. “Mi revenos hejmen”, mi diris al mi.

Pagante la konjakon kiun mi ĵus trinkis, tamen

venis al mi alia ideo, kaj tial mi demandis al la kelnerino:

– Ĉu vi konas tiun knabinon kiu loĝas pli supre, antaŭ ol atingi la alian angulon, ĉe la domo kun persienoj verdaj?

– Sur kiu flanko? Estas du domoj kun persienoj verdaj, unu sur ĉiu flanko de la strato.

Mi ne atentis pri tiu detalo, sed mi diris:

– Sur ĉi tiu flanko.

– Ili estas novuloj –ŝi diris.

En la trinkejo estis nur unu oldulo kaj du knaboj, ĉiuj sidantaj ĉe la tabloj. La oldulo, sola, ŝajnis duondormanta, kaj la du knaboj trinkis vinon, fumis, babilis inter si kun bela akĉento de la sudo.

– Ĉu homoj? –mi ripetis–. Kiu loĝas krom ŝi? –mi demandis, ĉar precize tio interesis min.

– Neniu pli, laŭ mia scio.

– Ĉu ŝi estas kliento via?

– Preskaŭ ne. Ŝi nur venis unu fojon. Sed se vi celas ion, mi pensas ke vi malŝparas la tempon.

La tono diris pli multe ol la vortoj; ĝi estis tono obstina kaj ŝargita per malico.

– Kial vi diras tion?

– Ŝi fianĉumas, kaj estas edziniĝonta. Ŝi mem rakontis al mi... –ŝi okulumis al mi, ŝajnis pripensition, sed finfine la deziro diri estis pli forta–. Mi konfidas ke kun la sama knabo kiu ŝin vizitadas.

Mi ŝajnis min ne kompreninta. La virino ŝajnis amika de konfidencaj aŭ eble, nun konante min, ŝatis min, ĉar subite mi malkovris ke ŝia rigardo estis strange amikeca.

– Kial? Ĉu ne estas normale, ke li vizitas ŝin?

– Tute ne dumnokte –ŝi respondis.

– Ah!

– Dumtage neniu vidis lin.

Mi ridetis al ŝi, petole, kaj ŝi preskaŭ faris okulsignon al mi. Verŝajne ŝi aĝis tridek kvin aŭ tridek ses jarojn, ŝi aspektis freŝa, diketa.

– Mi riproĉas nenion –ŝi klarigis–. En tiu mondo ĉiu faras laŭ sia plaĉo.

Mi insinuis:

– Ankaŭ vi, klare...

– Mi estas vidvino, knabo! –ŝi ridis.

Mi komprenis ke, se mi volus, ne necesis reiri al

Barcelono. Sed kun mi hodiaŭ ŝi ne pasigus bonan nokton, kaj mi neniam ŝatis ke pagu virtuloj anstataŭ pekuloj.

– Vidvino vi ne estos unu tagon plu se vi ne deziras, certe –mi diris–. Dankon pro la informo. Bonan nokton.

Ŝi verŝajne pensis ke la junularo nuntempa ne estas tiom terura, kiel oni asertas, sed min distris aliaj problemoj kaj, kiel ajn, nun mi jam akiris tion kion mi serĉis. La dometo kun persienoj verdaj ne estis la loko kie ili renkontiĝis, sed la hejmo de Juna. Kaj tie ŝi loĝis sola.

Mi prezentis min tie la sekvan tagon vespere. Mia unua intenco estis iri matene, sed la motorciklo paneis, kaj mi devis treni ĝin ĝis la aŭtoriparejo kaj atendi ke oni malkovru, kio okazis, ĉar en tiu momento ili ne disponis pri alia veturilo. Post dek minutoj da esplorado ili diris ke mi revenu posttagmeze, sed kiam mi alvenis la motorciklo ankoraŭ ne estis preta, tiel ke mi nur perdis la tempon pro nenio: finfine mi devis veturi per buso.

Kiam mi frapis ĉe la pordo de la domo, jam krepuskiĝis. La gvatotruo estis daŭre malfermita sed la antaŭĉambra lumo estis malŝaltita kaj, de interne,

ne venis bruo. Mi eĉ ne aŭdis ŝiajn paŝojn proksimiĝantajn, ĉar, kiel mi vidis poste, ŝi uzis pantoflojn. Subite, do, mano malŝlosis la seruron kaj la pordo malfermiĝis. Mi ne scias, ĉu ŝi rigardis tra la gvatotruo, sed mi jam zorgis meti min flanken, kvankam la mallumo de la enirejo ne faciligis la identigon.

Kiel mi revis dum longa tempo, ni renkontiĝis unu fronte al la alia, ŝi estis surprizita kun larĝe gapantaj okuloj, kaj ŝia gesto malkaŝis konfuzon. Ŝi movis iom la manon, ĝin levis ĝis la vizaĝo, kvazaŭ por sufoki krion.

– Vi! – ŝi kriis.

Ŝia vizaĝo restis en la ombro, la tuta kapo profilita per deinterna lumo kiu iom blindigis min, sed mi vidis ŝin bone. Tiam Juna estis kun alta hararanĝo, senriproĉa, kvazaŭ preta por baldaŭa eliro, sed envolvita per negliĝo blua kaj blanka; la negliĝo ŝajnis havi propran vivon, ĉar ŝia koro verŝajne kuris kiel senbrida ĉevalo kaj pro hirtiga tremo kiu ĵetis la mamojn antaŭen.

Sen unu vorto, mi avancis al ŝi, kaj ŝi retroiris iomete, ĉiam kun la sama gesto, la sama esprimo. Kiam ŝi pasis sub la lumradio, tiam mi vidis ŝian

vizaĝon, pli puran, pli ravan ol iam, ŝiajn okulojn konfuzitajn, ŝian buŝon leĝere tremantan, duone malfermitan, kvazaŭ ŝi ne povus spiradi facile.

Mi ne scias, kion mi sentis. Mi plu avancis, kaj ŝi plu retretis.

– Xavier... –ŝi diris en la momento kiam la kurteno malfermiĝis malantaŭ ŝi.

La koridoro estis ombra, sed ne tute senluma, ĉar en la fono brulis alia lumo, al kiu ni proksimiĝis lante. Antaŭ ol atingi la lokon, mi malŝaltis ĝin. Mi ne povas diri, ĉu mi antaŭe proponis tion al mi. En tiu momento mi sciis nenion, ĉar en mi miksiĝis du sentoj kontraŭagaj, simile potencaj laŭ la ŝajno. Tiu furiozo malvarma kaj surda kiu antaŭas la frenezajn krevojn kaj la doloro kiu postas la gravajn perdojn. Doloro pli akra ol iam ajn, neimagebla, sed vera, premanta; la doloro kiun revivigis ŝia ĉeesto. Ĉar mi ne povis deteni min je ripetado ke ŝi estas bela, bela, bela... Nur ke nun sen iom da deziro. Ĉi tio estis stranga. Ĉio estis stranga, neatendita, konfuza, dum la premo pli kaj pli fortiĝis. Mi frapis ŝin por repuŝi ĝenan pezon, ĉar la batalo inter kontraŭaj sentoj ne estis tolerebla. La vangofrapo resonis preter la muroj kaj ĵetis ŝin al flanko pordo kiu malfermiĝis pro la kunpuŝiĝo.

Ŝi eligis ĝemon bestan kaj torporigitan kiu kunfandiĝis kun mia brua spirado. Sed unu momenton poste mi jam prenis ŝin je la brako kaj trenis ŝin ĝis la ĉambro en la fundo, saloneto, nova kaj komforta, kun granda divano ĉe kies piedoj etendiĝis felo blanka kaj haroza.

Ŝi nun kriis:

– Xavier, Xavier... Ne eblis fari alion, mi povas certigi vin, tute ne eblis!

Mi ankoraŭ ne malfermis la buŝon. Per bruska gesto mi ĵetis ŝin al la divano, sur kiun ŝi falis kvazaŭ pupo, duonkuŝanta, glitanta. La negliĝo malvolviĝis, kaj lasis vidi kombinaĵon kun tre pala verdo, per kiu ŝi sin vestis sube. Tiam mi diris:

– Fia putino!

Mi klinis min sur ŝin. La duone elmontrita karno estis bruna kaj varma kiel antaŭe, sed ŝi ne apartenis al mi. Kaj mi ne plu volis ŝin. Duonfalinta, lante restariĝanta malaplombe sub mia rigardo, sub mia minaca sinteno, tio ne plu estis korpo dezirinda, eble ĉar ĝi estis sub mia povo, sen kondiĉoj.

La mano leviĝis kaj falis denove por ke la vango paliĝu antaŭ ol ruĝiĝi kiel papaveto.

– Ne, Xavier!... Mi ne volis...

– Kion vi volis?

– Mi ne povis veni, li... Li minacis min.

Mi prenis ŝin je la brako, vringis ĝin kaj ŝi denove ĝemis.

– Diru la veron! Tion vi planis ambaŭ... Kiom vi ridis, ĉu ne? La malfeliĉulo...

– Ne, mi ĵuras... Mi volas vin, Xavier!

La alia mano frapis ŝin por la tria fojo. Kiam mi parolis denove, mi sentis miajn lipojn dikaj, misproporciaj, plenaj per densa salivo kiu preskaŭ ne lasis min teksti la paroladon:

– Diru la veron aŭ mi damaĝos vin!

– Li devigis min, mi...

– Ĉu vi planis geedziĝi?

– Xavier...

– Ĉu vi planis geedziĝi?

– Jes.

– Sed vi volis la monon de la onklo, kiel kun mi...

– Tio estis lia intenco.

Mi ne kredis ion. Mi ne sciis, kion mi kredu.

– Ĉu li ne enspezis sufiĉe da mono? Diru!

– Mi ne scias... Li volis tion.

– Kial ne faris li?

– Li devigis min –ŝi ripetis.

– Kial vi ne forlasis lin?

– Mi...

– Kial vi ne forlasis lin? –mi demandis pli laŭte.

– Li...

– Kial vi ne forlasis lin? –mi marteladis–. Tion diros mi. Ĉar vi amas lin. Vi amas lin tiel, kiel mi amis vin, kaj por li...

– Ne, Xavier, vere!

– Aŭ eble estis via ideo kaj preferis ŝpari lin por vi. Idioto, kia mi estis, povis fari pri la laboraĉon.

– Ne...

– Kiu elpensis la ideon?

– Li.

Iom pli forte mi vringis la brakon kiun mi ankoraŭ tenis.

– Kiu?

– Ĉi tio kaŭzas fortan doloron.

– Kiu?

– Mi ne scias...

– Kiu?

– Ni volis... Aj! –ŝi ĝemis.

– Kiu?

– Mi ne scias. Ambaŭ... Mi. Sed tiam mi ne konis vin, Xavier, mi ne sciis...

– Vi konatiĝis kun mi.

– Jam estis malfrue.

– Por kio?

– Li povis stukaĉi. Ĝis poste mi ne rimarkis.

– Silentu!

Mi delasis ŝian brakon, kaj kovris mian vizaĝon per la manoj. Mi ne povis elteni ŝin diranta ke estis ŝanco... Ŝiaj brakoj pezis sur miaj genuoj, la manoj avancis sur miaj femuroj, prenis la jakon.

– Xavier...

Mi rigardis al ŝi. Ŝi estis ĉe miaj piedoj, kun levita vizaĝo, sed humila.

– Mi ne edziniĝos, Xavier... Vi kaj mi... Mi amas vin, kaj nur vin... Mi ne povis scii...

– Silentu, Juna!

Sed mi ne plu kriis. En mia interno stulta voĉo ne ĉesis diri: “jes, jes, jes...”. Kaj tion ŝi rimarkis. Sed tiam la okuloj perfidis ŝin. Estis io tre mallonga, kvazaŭ triumfa fulmo kiu samtempe malkaŝis senliman malestimon. Ĉio renversiĝis, ekstere kaj interne. Dum kelkaj sekundoj mi ne povus diri, kie mi estas, mia kapo turniĝadis, mi sentis min tute forkondukita de malestimo des pli amara, des pli forta, ol tiu de ŝiaj okuloj. “Idioto! Idioto!”, mi diris al mi. Mi preskaŭ falis denove en la kaptilon.

La mano agis sola, sen konscia interveno de mia volo. Mi prenis ŝin je la kapharoj kaj ŝi restariĝis kun nova krio. Poste la korpo frapis kontraŭ la divanon, el kie ŝi rigardis min kiel besto kaptita, senespera. Sed la vortoj kiujn mi diris poste eble provizis al ŝi iom da espero, ĉar ŝia esprimo denove ŝanĝiĝis.

– Senvestiĝu –mi diris.

Ŝi tardis kelkajn sekundojn, ĝis ŝi venkis sian paralizon. Tiam ŝi malvolvis la negliĝon, sed la subveston demetis mi per energia forŝiro.

Neniam mi vidis ion tiom belan. Sed nun tio estis belaĵo muta, malamika, detruinda, se mi ne volis suferi denove damaĝon...

Kiam ŝi vidis la ponardon brilantan en la mano, la

okuloj gapegis kaj la buŝo hojlis:

– Ne!...

Ne estis tamen sufiĉe da tempo por fuĝi. Mi trafendis ŝian dekstran vangon vertikale. La alian, ne. Iu haste eniris la ĉambron. Fortaj, muskolaj brakoj tenis min de malantaŭe, vringis mian manartikon ĝis la ponardo falis sur la plankon. Poste mi vidis, ke estas du viroj.

Neniam mi tiome bedaŭris esti lasinta pordon malfermita. Sed kiel mi povus antaŭvidi?

La polico sekvis ŝin ekde la unua momento, kontrolante ĉiujn ŝiajn paŝojn. Tion ili rakontis al mi kiam mi estis kondukata al Barcelono, mankatenite, sidante inter ili, malantaŭ la nuko de la ŝoforo kiu eĉ unu fojon ne turnis la kapon.

Ŝajnis ke ili emis paroli. Ŝi ne donis al ili facilan taskon kaj nun ili malstreĉiĝis, fanfaronaj, sekuraj pri si mem. Por unu momento mi povis liberiĝi kaj fuĝi al la alia flanko de la tablo kie mi alproprigis seĝon, per kiu mi minacis ilin. Ili estis kun pistoloj, la pli malalta viro prenis la sian el la poŝo, sed ili ne estis pretaj uzi la pafilon dum ili povis submeti min.

– Ne faru stultaĵon! –avertis min la pli alta per tono senindulga kaj antipatia.

Mi ĵetis kontraŭ li la seĝon, sed li estis pli vigla ol aspektis, kaj evitis la ĵetaĵon ĝustatempe. La alia jam kuris flanke de la tablo, sed ankaŭ mi estis vigla kaj la akvo-kruĉo, plena kun floroj, maltrafis lin je kelkaj centimetroj.

Tiam mi restis sen rimedoj. Mi nun insultis ilin ĝis

la buŝo restis sen salivo. Juna daŭre sidis sur la divano, ĝemante, ne zorgante pri ŝia nudeco, kun la mano fiksita sur la vango, nun kun multa sango. Poste la alia viro helpis ŝin vestiĝi, kaj forkondukis ŝin al la dispensario.

Nun ĉio finiĝis. Ni veturis al Barcelono kaj ili klarigis ke proksime al la domo ĉiam deĵoris gvardisto. Li estis tre lerta, ĉar la antaŭan nokton mi ne distingis lin en la strataj ombroj. Li tamen vidis min, observis miajn manovrojn kaj eniris la trinkejon por pridemandi la kelnerinon. Post la interparolado kun ŝi, restis malmultaj duboj ĉu mi estis la komplico kiun ili serĉis, la fizika plenuminto de la murdo. Tial la postan tagon, hodiaŭ, tri agentoj en aŭto atendis proksime al la domo. Ili eniris malantaŭ mi, kiam mi tiris la knabinon en la salonon; el la koridoro ili spektis la scenon.

– Sed kial vi kontrolis ŝin? –mi demandis–. Ĉu vi ne kredis, ke temis pri sinmortigo?

– Neniam ni kredis tiun hipotezon.

– Kaj la ĵurnaloj, la fakaj revuoj...

La malalta viro ridis sarkasme.

– Oni publikigas tion, kion ni rakontas.

– Sed la morto ŝajnis sinmortigo –mi insistis.

– Jes, ĝi ŝajnis sinmortigo. Sed vi faris gravan eraron. Ŝajne vi ne sciis ke la dekstra mano de la kolonelo Virós estis paralizita pro vundo ricevita dum la milito, kaj el tiu vundo difektiĝis la muskoloj. Li povis helpi sin nur per la liva mano.

– Kaj la revolvero restis en tia pozicio, ke ĝin nur povis pafi la dekstra mano. Ĉu ŝi ne diris, ke li ne povas uzi la dekstran manon?

– Ne.

Ŝi parolis nur pri handikapita amikino. Sed ĉi tiu ne ekzistis.

– De la unua momento ni suspektis, ke temis pri murdo –daŭrigis la pli alta–, kaj ke devis temi pri laŭdire interna laboro. Fare de familiano.

– Pli konkrete, de la profitontino –klarigis la pli malalta.

– Ĉu ŝi?

– Jes, ŝi. Sed ŝin ŝirmis perfekta alibio, kaj ankaŭ lin, la advokaton, ŝian amanton. –Li faris mallongan paŭzon, rigardis min kaj aldonis: –povas interesi vin ke li ne havis rilaton kun la murdo, ke li ankoraŭ ne scias ion...

Mi moviĝis tiom bruske ke ili tuj prenis min forte. Sed mi intencis nenion. Mi ne povis, kun katenitaj manoj. Tio estis surprizo.

– Kiel vi scias?

– Preskaŭ de la unua momento ni instalas mikrofonojn en la domo. Neniam ili eldiris vorton kiu povus kredigi pri plano pripensita inter ambaŭ, sed tute male.

– Restas punkto kiun mi ne komprenas –mi diris–. Se ŝi sciis ke vi suspektis ŝin, ke vi ne kredis je la sinmortigo...

– Ŝi ne sciis. Ni lasis ŝin kredi ke ni mordis la hokon. Krom en la unua momento, kiam pridemandado ne estas evitebla eĉ se temas pri sinmortigo, kaj neniam plu ni ĝenis ŝin. La traserĉado kaj esplorado de la loĝejo, precipe de la skribejo, havis lokon kiam ŝi estis en la polickomisariejo.

La pli malalta denove aŭdigis sian rideton sarkasman kaj diris:

– Tiam ni malkovris vian eraron.

– Ĉu ankoraŭ alian? –mi demandis preskaŭ sen interesiĝo. Mi sentis min elĉerpita.

– Jes. Kial vi trinkis konjakon?

Verŝajne mi restis kun buŝo larĝe malfermita ĉar nun ridis ambaŭ. La situacio ne tuŝis ilin, ili sentis sin en bona stato, farante sian ĉiutagan laboron... Ili do povis ridi.

– Kiel vi malkovris?

– La esplorado pri la mebloj kaj objektoj en la skribejo, kie ni serĉis eventualajn fingrospurojn, malkaŝis ke estas konjako-botelo sen iu fingrospuro, kaj ne estas logike ke botelo preskaŭ malplena estas tiom pura. Vi purigis ĝin, ĉu?

Mi jesis mute. Mi devintus ne demeti la gantojn eĉ unu solan momenton. Sed nun jam ne gravis.

– Ne necesas diri –daŭrigis la pli alta–, ke nia konvinko ke temis pri murdo, plifirmiĝis. Vi estis lerta, sed ne sufiĉe.

– Ni sciis ke nur necesas atendi –diris la pli malalta–. Estis komplico kaj, frue aŭ malfrue, tiu aperos–. Li ridis. – Vi ja povas rimarki ke ni pravis.

– Ĉiel ajn –aldonis la alia–, ni ne kredis ke vi tiom longe malfruos. Sed hodiaŭ ni komprenis. Ŝi ne intencis dividi la profiton kun vi. Ŝi volis ke vi faru la laboron senkoste. Estas klare –li pripensis– ke da mono estis malmulte por kundividi.

– Mi levis la kapon kiun mi antaŭe malle vadis.

– Kaj kio pri ĉiuj ĉi posedaĵoj kaj akcioj, pri kiuj ŝi parolis al mi? Ne...

– Li ludis multe ĉe la borso. Kaj ne bonŝance. Mi kredas ke ĉi tio estis lia nura malvirto.

– Sed tion li ne povis ludi –mi diris aplombe–. Tio ne apartenis al li. Tio apartenis al lia unua edzino kaj li nur fruktuzis.

– Ĉio apartenis al li –insistis la altulo–. Lia unua edzino estis kabareda artistino sen groŝo en poŝo.

– Kial li postlasis ĉion al la nevino, do?

– Kiu nevino? –ambaŭ surpriziĝis.

– Ŝi... la nevino. Juna.

La malaltulo rigardis al sia kolego super mia kapo, kaj lin memorigis, kaj tiu memoris.

– Jes, estis nevino, nomita Juna, ĉu?

– Mi kredas ke jes. Ŝi nur loĝis kun ili en epokoj, kaj ŝi reiris al Almecelles, el kie estas la familio.

Mi rigardis unu kaj poste la alian, kvazaŭ spektante tenisan matĉon, ĝis mi ne plu povis min retenigi.

– Sed pri kiu vi parolas?

– Pri la nevino kiun vi menciis, la filino de fratino de sinjoro Virós.

Mi eligis voĉon feblan, ridindan:

– Kio do pri ŝi?

– Ĉu pri Caterina? Ŝi estis lia edzino.

– Caterina... –mi flustris.

– Caterina Freixes, jes.

Ŝi mensogis al mi ĝis la fino. Neniam ŝi diris unu solan veraĵon... Mi levis la katenitajn manojn por lasi la kapon ripozi sur ili. La alia, la malaltulo, frapis siajn femurojn pro amuziĝo kaj ekridis:

– Tion li ne sciis!

Kial mi agis tiel? Mi ne scias, sed iel mi devis senŝarĝigi min. Tial mi kraĉis al li:

– Kanajlo!

La mano, rapide kaj forte, frapis min sur la vizaĝo kaj la ringo vundis la lipon. Sango plenigis la buŝon. Kaj ankoraŭ nun mi konservas la signalon.